


EL *Popola*
ĈINIO

N-ro 2

FEBRUARO

1967





Ruĝaj gvardianoj ne timas longan marŝon.
Kristale klaras Jan-rivero,
Altegas la Pagoda Monto.
Ho, Jan-an Vin ni sopiradis

En tago kaj en nokta sonĝo.
Jen ni atingas vin je l' fino
Post longa marŝ' tra malfaciloj.

Prezidanto Maŭ

Senlime Zorgas Junan

Generacion

GIE GJUN

DE la unua akcepto de revoluciaj instruistoj kaj lernantoj kaj ruĝaj gvardianoj fare de Prezidanto Maŭ je la 18-a de aŭgusto, 1966, ĝis la oka akcepto, okazinta je la 25-a kaj 26-a de novembro, nia granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktilisto Prezidanto Maŭ akceptis sume dek unu milionojn da revoluciaj instruistoj kaj lernantoj kaj ruĝaj gvardianoj. Kaj la junaj revoluciaj batalantoj vidis Prezidanton Maŭ, la ruĝan sunon en nia koro.

En ĉiu fojo de akcepto, Prezidanto Maŭ donis senkompare grandajn kuraĝigon kaj forton al la junaj revoluciaj batalantoj kaj centmiliono revolucia amaso, kaj puŝis la bolantan movadon de granda proleta kultura revolucio al nova alta tajdo.

Ĉu ie kaj iam troviĝis iu revolucia gvidanto, kiu povis tiel vaste intervidiĝi kun popolamasoj? Ne, nenie kaj neniam oni trovis tian, ĉu en la ĉinaj aŭ alilandaj historiaj libroj. Kaj ĉu

estis iu revolucia gvidanto kiu kuraĝis iniciati kaj gvidi tian grandskalan revolucion movadon? Des pli ne.

Tio estas granda iniciato senprecedenca en la historio tiel de la ĉina revolucio kiel de la internacia komunisma movado. Tio estas granda iniciato senprecedenca en la homa historio.

Ho, nia estimata kaj amata gvidanto Prezidanto Maŭ! Nur plej granda proleta revoluciisto kaj plej granda genio, kia vi estas, havas tian grandan kuraĝon por tio.

Prezidanto Maŭ plej amas kaj plej fidas la amason kaj plej subtenas ĝian revolucion iniciatemon. Prezidanto Maŭ ĉiam restas kun la amaso, havas kun ĝi la saman spiron kaj sorton kaj tutkore kaj plenanime subtenas revolucionajn amasajn movadojn de la tuta Ĉinio kaj de la tuta mondo.

“La popolo, nur la popolo, estas la movforto de kreado de la monda historio.”



Nia granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktilisto Prezidanto Maŭ

Per sia granda praktikado, Prezidanto Maŭ eksplikis tiun klasikan faman eldiron. Kaj li starigis la plej brilan ekzemplon por la tutmondaj marksist-leninistoj, la tuta membraro de nia partio, ĉiuj niaj batalantoj kaj nia juna generacio.

Ho, nia estimata kaj amata gvidanto Prezidanto Maŭ, vi restas intime kun la centmiliono revolucia amaso, koro ĉe koro, kaj via pulso batas kune kun tiu de la centmiliono revolucia popolo. En via koro estas ĉiam la revolucia amaso, kaj vi restas ĉiam inter la popolamasoj.

Ni rememoru la kortuŝajn scenojn el la akceptoj faritaj de Prezidanto Maŭ al la junaj

revoluciaj batalantoj! Frumatene, kiam aŭro ekmontris sin, Prezidanto Maŭ, kiu diligente kaj pene laboris tutan nokton por la popolo de la tuta lando kaj tuta mondo, venis al la homplena Tian-anmen-placo por intervidiĝi kun la junaj revoluciaj batalantoj. En la brile iluminita nokto de festotago, Prezidanto Maŭ venis de sur Tian-anmen-pordego kaj eksidis sur la tero ĉe la Orakva Ponto por spekti la festajn artfajraĵojn kune kun la revolucia amaso. Sub la arde brilanta suno, Prezidanto Maŭ staris sur Tian-anmen-pordego dum 6-7 horoj, por rigardi la milionan armeon de kultura revolucio impone marŝanta tra Tian-anmen-placo. En la malvarma vintro, kiam la temperaturo falis ĝis nulo, Prezidanto

Maŭ ankoraŭfoje revuis la grandan kulturan revolucion armeon, en senkovrila aŭto, kontraŭ frosta norda vento. De mateno ĝis nokto, de somero ĝis vintro, Prezidanto Maŭ ĉiam inklinas al la amaso, kaj lia koro intime kuniĝas kun la koro de la revolucia amaso.

*Ĉi tiel grandaj estas
la ĉiel' kaj ter'
Tamen ne kiel estas
bono de l' Parti'.
Ja tiel intimegaj estas
patr', patrin',
Sed pli ankoraŭ estas
Prezidanto Maŭ....*

Tiuj simplaj versoj el popolkanto esprimis la profundan sentimonton de dekmilionoj da junaj revoluciaj batalantoj kaj centmilionaj revolucia amaso al Prezidanto Maŭ.

La popolo senlime amas Prezidanton Maŭ, kaj Prezidanto Maŭ senlime zorgas la popolon. La klasa sento inter Prezidanto Maŭ kaj la

revolucia amaso estas pli alta ol la ĉielo, pli profunda ol la maro, kaj ne apartigebla per mil montoj kaj dekmil riveroj. Ŝafistino sur stepo de Interna Mongolio, liberigita sklavo sur la altebenejo de Tibeto, fiŝistido ĉe la bordo de la Orienta Maro kaj ujugura junulo ĉe la piedo de Tianŝan-montaro, kiuj venis al Pekino fore de miloj da lioj, estas ĝuste por vidi la estimatan kaj amatan Prezidanton Maŭ tag-nokte sopiratan de diversnecianoj.

Kun la granda sentima spirito de marksismo, Prezidanto Maŭ subtenas kaj nutras ĉiujn revoluciajn novnaskitaĵojn. Ni retrorigardu kelkajn mondskuajn eventojn okazintajn ekde la granda kultura revolucio:

En la lasta tagdeko de majo, kiam Nie Juanzi kaj 6 aliaj kamaradoj de la Pekina Universitato publikigis la unuan revolucionan opini-afiŝon, nia estimata kaj amata Prezidanto Maŭ ĝin forte subtenis la unua.

Tiel, unu fajrero tuj transformiĝis en stepan incendion. Kiel flamanta brulego, la revoluciaj opini-afiŝoj trabruligas la tutan landon, ĉiam pli forte, tiel ke la vera vizaĝo de kontraŭ-revoluciaj reviziistoj estas tute malkovrita, kaj la demonoj kaj diabloj povas nenie trovi kaŝejon.

Kiam la ruĝaj gvardianoj estis ankoraŭ en burĝono ĵus sin elŝovanta, ilin subtenis la unua nia estimata kaj amata gvidanto Prezidanto Maŭ. Kun ĝojo Prezidanto Maŭ diris al la unua grupo de ruĝaj gvardianoj:

“Mi firme subtenas vin!”

Kvazaŭ printempa tondro la diro de Prezidanto Maŭ aŭdiĝis ĉie tra la lando ĝis la plej foraj anguloj. Prezidanto Maŭ metis sur sin la brakrubandon de ruĝa gvardio. Ekaperis tuj en la tuta lando sennombraj ruĝaj gvardianoj.

La junaj revoluciaj batalantoj ekscitiĝe diris: “Prezidanto Maŭ estas nia ruĝa komandanto, kaj ni liaj ruĝaj soldatetoj.”

De kiam la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj komencis grandskalan interkontakton, Prezidanto Maŭ akceptis ilin fojo post fojo, donante al ili ekstreme grandan kuraĝigon kaj subtenon. La granda demokratio de granda sinaŭdigo, granda disvolviĝo, grandliteraj opini-afiŝoj, granda debato kaj grandaj interkontaktoj antaŭenpuŝis la grandan kulturan revolucion de unu nova alttaĵdo al alia.

La ruĝaj gvardianoj naskiĝis en la flamoj de klasbatalo. Ili estas novnaskitaĵo aperanta sur la orienta horizonto, bravaj pioniroj de la granda proleta kultura revolucio en nia lando kaj la nova generacio nutrata de la penso de Maŭ Zedong. Ili estas kuraĝaj en penso, parolo, ago, sturmo kaj revolucio, komplete eliminis la kvar malnova-ojn (ideojn, kulturon, morojn kaj kutimojn) de la ekspluataj klasoj kaj plene starigas la kvar nova-ojn de la proletaro; ili forbalaas ĉiujn demonojn kaj diablojn, kaj plene frakasas la postrestintajn fortojn de la malnova mondo ĝis ruiniĝo. Ili multe levis la batalvolon de la revolucia popolo kaj faligis la arogantecon de imperiismo, moderna



Miloj kaj dekmiloj da okulparoj rigardas al Prezidanto Maŭ, miloj kaj dekmiloj da ridetantaj vizaĝoj direktiĝas al la ruĝa suno, kaj miloj kaj dekmiloj da ruĝaj koroj havas la komunan deziron: Eterne vivu Prezidanto Maŭ!

reviziismo, reakciuloj kaj ĉiuj malnovaj fortoj, kaj faris grandan meritplenan kontribuon al la patrolando kaj la popolo.

Ruĝaj gegvardianoj, junaj geamikoj: nia granda socialisma patrolando ne naskiĝis en paca medio, sed en grandaj ventoj kaj ondoj post longdaŭra kaj malfacila batalado. Ĝi estas gajnita per la freŝa sango de la sennombraj revoluciaj martiroj kaj konstruita persone de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Vi nepre ne forgesu la penigan kaj zigzagan revolucionan vojon kiun viaj patroj trairis sub la gvidado de Prezidanto Maŭ, kiam vi kun ĝojkrioj kaj saltoj preterpasis Tian-anmen-placon, revuete de Prezidanto Maŭ. Vi devas memori la fiere flirtantajn ruĝajn flagojn sur Gingang-montaro, la flamantajn kampadfajrojn sur la vojo de Longa Marŝo, la lamplu-

mojn de kavernaj loĝejoj de Jan-an kaj la intensajn batalojn de la Liberiga Milito kaj de la volontuloj en Koreio por helpi ĝin kontraŭ la usona imperiismo. Kiu gvidadis la ĉinan popolon ĉirkaŭiri rifojn kaj venki furiozajn ondegojn, estas neniu alia ol Prezidanto Maŭ. En ĉiu kriza momento, kiam la revolucio trafis malfacilojn kaj repuŝojn, ĉiam estis Prezidanto Maŭ, kiu montris al ni la direkton de la revolucio kaj gvidis ĝin de venko al venko, dank' al sia genia saĝo kaj ekstreme riĉa batalsperto.

Por preventi restariĝon de kapitalismo kaj elradiki reviziismon, tiel ke nia granda socialisma patrolando koloru ĉiam freŝe ruĝa, Prezidanto Maŭ persone iniciatis kaj gvidas la en historio senprecedencan, grandan proletan kulturan revolucion, kiu estas problemo de fundamenta graveco por la afero de la proleta



revolucio en miloj kaj dekmiloj da jaroj. Plenmano da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras obstine kapitalisman vojon, kaj reprezentaj personoj de la burĝa reakcia linio ege timiĝis de la amasa movado. Ili vane provis turni la direkton de la movado kaj direkti la lancpinton de batalo kontraŭ la amason. En la kriza momento, kiam la granda proleta kultura revolucio frontis al danĝero, estis denove nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kiu persone gvidis la aferon de ellaboro de la “Decido pri la Granda Proleta Kultura Revolucio”, kaj ĝustatempe returnis la direkton, por ke la ŝipego de la granda kultura revolucio revenu al la ĝusta vojo kaj en favora vento fluge navigu antaŭen fendante ondegajn.

Sen nombraj elokventaj faktoj pravas, ke la penso de Maŭ Zedong estas la fundamento de la venko de la revolucio. Por atingi ĝisfundan venkon de la revolucio de Ĉinio kaj la mondo, ni devas nepre konduki ĝis la fino la grandan kulturalan revolucion, kiu celas plene starigi la penson de Maŭ Zedong.

Prezidanto Maŭ diris: “La mondo estas via, kaj ankaŭ nia, tamen, ĝi finfine estas via. Vi junuloj, plenaj de vivfreŝeco, estas en la tempo de florado, kvazaŭ la suno je la oka aŭ naŭa horo en mateno. La espero estas metita sur vin.”

Prezidanto Maŭ diris ankaŭ: “Vi devas zorgi la ŝtatajn aferojn kaj konduki la grandan proletan kulturalan revolucion ĝis la fino!”

Tio estas la plej kora espero kaj admono de Prezidanto Maŭ al la ruĝaj gvardianoj kaj la juna generacio.

Sub la intima zorgado de Prezidanto Maŭ kaj la nutrado de la granda penso de Maŭ Zedong, niaj heroaj ruĝaj gvardianoj kaj juna generacio estas rapidege kreskantaj. Responde al la alvoko de kamarado Lin Biaŭ pri puŝo de la amasa movado de kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ al nova stadio, la vasta revolucia junularo levas nun novan alttajdon de kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ. De urboj ĝis vilaĝoj, de lernejoj ĝis kazernoj, ĉiuj studas verkojn de Prezidanto Maŭ kaj kantas kantojn kun tekstoj el vortoj de Prezidanto Maŭ, ĉie troviĝas tabuloj kun surskribitaj vortoj de Prezidanto Maŭ, kaj la tuta lando fariĝis granda lernejo de la penso de Maŭ Zedong. Ili studas verkojn de Prezidanto Maŭ kun demandoj en la koro, studas kaj aplikas ilin kreive, kombinas la studon kun aplikado, studas unue kion ili plej urĝe bezonas por rikolti tuj rezultojn, kaj penas plej energie en aplikado de ĉio studita. Ili studas kaj aplikas en batalado. En la spirito de lukto

por ĉiu minuto, ili detruas la penson pri individuo kaj starigas la ideon de kolektivo, eliminis la burĝan ideologion kaj starigas la proletan, por tutforte transformi sian mondkoncepton. La komunisma batalanto Ĉaj Jonghjang kiu tutkore dediĉis sin al kolektivo, estis ja elstara reprezentanto de la juna generacio de Ĉinio, rapide kreskanta sub la brilo de la penso de Maŭ Zedong. Li vivis kiel rekruto nur ok monatojn. Prenante la “tri malnovajn artikolojn” de Prezidanto Maŭ kiel sentencon, li forte detruis la penson pri individuo kaj plene starigas la ideon de kolektivo, malpermesante enlasi eĉ hareton da persona konsidero en sia kapo. Por defendi la grandan proletan kulturen revolucion, li senbedaŭre oferis sian vivon. Vasta junularo iras al la amasoj de laboristoj kaj kamparanoj por lerni de ili, responde al la alvoko de Prezidanto Maŭ. Disvolvante la revolucionan tradicion de la Longa Marŝo de la ruĝa armeo, ili formis “trupon de longa marŝo”, prenante la laboristojn kaj kamparanojn kiel siajn instruistojn kaj la kamparon kiel sian klasĉambron. Dum la interkontaktado per piedirado, ili persistis pri kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ, aŭskultas familiajn kaj vilaĝajn historiojn ĉe malriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj, lernas kaj dissemas la pensojn de Maŭ Zedong ĉie, kie ili alvenas, vaste kontaktante kun la amasoj kaj la socio por ekkoni la klasbatalon en socialisma socio. La vasta juna generacio penas hardi sin en fidindajn daŭrigantojn de la proleta revolucia afero kaj komunismajn novulojn kiuj plenanime servas al la komuno. La revoluciistoj de la maljuna generacio kaj la tutlanda popolo ĉiuj ĝojekscitiĝas kaj fieras pro tio. Estas pure sonĝo en hela tago, ke la imperiistoj revas meti la esperon pri paca evoluo de nia lando al kapitalismo sur nian venontan generacion.

Lun Mej, unu el la du heroaj fratinetoj sur la stepo kreskantaj nutrate de la penso de Maŭ Zedong, venis de Interna Mongolio al Tian-anmen-pordego, por esti revuata de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. La ruĝaj gvardianoj amase petas ŝin skribi sian nomon sur iliaj libretoj Cititaj Vortoj de Prezidanto Maŭ kiel memorafon.

La radoj de la historio flugrapide turnas. La tajdo de la granda proleta kultura revolucio envolvas la tutan landon, forlavante ĉiujn malpuraĵojn postrestintajn el la malnova socio kaj transformante la spiritan fizionomion de la socio kaj homoj.

Sub la saĝa gvidado de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la 700-miliona brava kaj laborema ĉina popolo kreas nun tute novan historion pri la kompleta sinrestarigo de la proletaro por esti plene liberigita! Tio estas ĝuste tia kiel Prezidanto Maŭ diris:

“Ni faras nun ekstreme gloran kaj grandan aferon neniam faritan de niaj antaŭuloj.

Nian celon ni devas nepre atingi.


Nian celon ni certe povas atingi.”

Lasu la milionulojn de la Wall-strato en Usono, la laboristajn nobelojn en Moskvo kaj ĉiujn demonojn kaj diablojn en diversaj anguloj de la mondo blasfemi histerie, la juna generacio kaj centmiliono revolucia amaso de Ĉinio grandpaŝe antaŭenmarŝos pli kuraĝe, sub la granda standardo de la penso de Maŭ Zedong!

Vivu la granda proleta kultura revolucio!

Vivu la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong!

Vivu Prezidanto Maŭ, la ruĝa suno en nia koro!



Iri la Vojon de Malnova Ruĝa Armeo

— Notoj pri la “Longmarŝa Ruĝgvardio” el Linzi

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ gvidis la ĉinan popolon en malfacilaj bataloj de la revolucio dum kelkdekoj da jaroj kaj kondukis sub sia komando la ruĝan armeon en la senprecedenca Longa Marŝo de 25,000 lioj, tiel li elkulturis grandan nombron da kernaj elementoj por la ĉina revolucio. Hodiaŭ, Prezidanto Maŭ, nia granda ĉefkomandanto, ree alvokis la junajn revoluciulojn pri tutvoje piedira intervizito kun la stilo de la Longa Marŝo, metante ege grandajn zorgon kaj esperon sur la revoluciajn gejunulojn kaj geknabojn.

Kun entuziasma respondo al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ, la vasta amaso de ruĝaj gvardianoj kaj revoluciaj instruistoj kaj lernantoj aktive faras la longmarŝostilan piediran interviziton. Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, ili rigore observas la tri ĉefajn regulojn de disciplino kaj ok punktojn de atento laŭ la ekzemplo de la malnova ruĝa armeo kaj vaste kontaktas kun la socio kaj la popolamaso; ili sin ekzamenas memkonscie en komparo kun la progresinta ideologio de la laborista kaj kamparana amasoj, penegas kulturi sin kiel ruĝajn daŭrigantojn de la proletaro. Sinsekvajn informojn pri kortuŝaj aferoj de ruĝaj gvardianoj en ilia piedira interkontakta vizito ni donos en la paĝoj de EPC.*

LA RED.

En la lasta tagdeko de oktobro, 1966, iu longmarŝa taĉmento el 13 revoluciaj instruistoj kaj lernantoj, kun senkompara amego al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj laŭ lia instruo de “Hardiĝo en vento kaj pluvo kaj spertiĝo pri sociaj aferoj”, piediris pli ol mil liojn trans montoj kaj akvoj, kaj venke atingis Pekinon. La sekvintan tagon, ili trafis la okazon, kiam Prezidanto Maŭ donis la sesafojan akcepton al diverslokaj revoluciaj instruistoj kaj lernantoj. Ĉe la granda gvidanto ili pasigis pli ol 7 feliĉajn horojn, starante sur la ŝtupara altano. Tiu taĉmento estas la “Longmarŝa Ruĝgvardio” de la Gingĝonga Agrokultura

Mezlernejo en Linzi-gubernio, Ŝandong-provinco.

PERSONE GUSTUMI LA AMARON SPERTITAN DE REVOLUCIAJ ANTAŬULOJ

Sufero kaj laciĝo estas la unua provo dum la piedira intervizitado. La sola vorto tenata de la junaj revoluciuloj de la “Longmarŝa Ruĝgvardio” kontraŭ tio estas lukti! Ili venkis unu post alia malfacilojn survoje, sinapogante sur la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, lernante de la heroeco esprimita en la frazo: “Malfacilon en la Longa Marŝo ne timas la ruĝa armeo”, kaj havante fortan volon por

esti ruĝaj daŭrigantoj de la malnovaj ruĝaj armeanoj.

Por hardi sin en la spirito sperti grandajn suferojn kaj rezisti kontraŭ lacegon, ili ĉiam serĉas memkonscie malfacilojn. Temas nun pri ilia ekmarŝo. Komence ili intencis ekiri en la luma tago. Poste ili opiniis, ke pli utile al ilia hardiĝo estas marŝi en la nokto, tial ili ekiris iunokte. Por lerni de la malnova ruĝa armeo prepari manĝon per provizore fiksita kaldrono survoje de la marŝado, ili kunportis ankaŭ grenojn kaj kuirilaron.

Tiun vesperon, ĉiu el ili surdorsigis 10-20 ĝinojn pezan tornistran, kaj ili eksurvojiĝis tirante platĉaron kun kaldrono kaj greno sufiĉa por manĝo en preskaŭ unu monato. Unu-spire la junaj revoluciuloj stumble iris 40-50 liojn. Iuj sin trenis sur ŝvelintaj kruroj kaj aliaj havis sangovezikojn sur la plandoj. Ĝuste tiam ili alfrontis aŭtovojon en riparado, kie ekpaŝante, iliaj piedoj jam falis en koton profundan je pli ol duona futo. Ĉu iri plu antaŭen aŭ ne? Iuj hezitis ĉe tio ĉi. Tiutempe, la politika asistanto elektita de ili gvidis aliajn reciti parkere la cititajn vortojn de Prezidanto Maŭ: “Estu firmdecidaj, sentimaj je ofero, kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon.” Ilia propagandisto direktis ĉiujn en kunkantado de “. . .vi junuloj. . .kiel la suno de l’mateno je l’ ok-aŭ-naŭa horo. Kaj espero metiĝas sur vin.” La granda penso de Maŭ Zedong donis al ĉiuj senlimajn kuraĝon kaj forton. Kun vigleco kaj braveco, la junaj revoluciuloj, tirante sian ĉaron kaj kriante la sloganon de “Malcedo signifas venkon”, ree marŝis antaŭen en grandaj paŝoj.

La unua venko de la marŝado kuraĝigis la junajn revoluciulojn por renkonti kun plena fido la provon de pli grandaj malfaciloj. Iun tagon ĉe tagiĝo, kiam ili sin preparis por ekiri, subite falis pluvo. Kaj la vetero neatendite malvarmegiĝis pro tio, ke la frostiga aero alfluadis suden. La lokaj komunumanoj konsilis al ili ekiri post la pluvo, sed la junuloj diris ekscitite: “Ĝuste tio ĉi estas la bona okazo por nin hardi!..” Ili atente envolvis la verkojn de Prezidanto Maŭ per sia pluvtuko kaj reekmarŝis kontraŭ la furioza vento kaj torenta pluvo. La pluvo pli kaj pli torente falis kaj la vento pli kaj pli forte blovis de 4-5a ĝis 8-9a

grado. Kutime du homoj jam sufiĉis por tiri la platĉaron, sed nun 5 aŭ 6 homoj estis bezonataj por tiri kaj puŝi ĝin. Ĉiu paŝo antaŭen foruzis tre grandan forton. Kun firma volo por batalo kontraŭ ventego kaj pluvego, ili kuraĝigis unu la alian: “Tian sufereton pro vento kaj pluvo de la naturo ni jam ne povas elporti, kiel ni povas rezisti kontraŭ la forta vento kaj pluvego de la klasbatalo, kaj konduki la grandan proletan kulturan revolucion ĝis la fino?”

Iun tagon, jam tagmeze, ili venis al vasta alkala kavejo sen vilaĝoj en la ĉirkaŭo de 40 aŭ 50 lioj. Ili haltis ĉitie kaj instalas sur la salalkala tero la kaldronon. Ili ekpreparis sian manĝon, uzante la lignaĵojn kolektitajn survoje kaj akvon elĉerpitan el la apuda rivero. La akvo boliĝis, sed kiam ili ĝin trinkis, ĝi gustis sala kaj amara. Ekpensante pri la malfacila vivo de la ruĝaj armeanoj, kiuj manĝis la herboradikojn kaj arboŝelojn dum sia Longa Marŝo, ĉiuj junaj revoluciuloj babilante kaj ridetante trinkis la amaran akvon kaj konsumis la manĝaĵon. Post tio, unu kunlernantino diris kun profunda emocio: “Ni estas gejunuloj, kiuj kreskis trinkante dolĉan akvon. Se ni ne persone gustumas la amaron, kiun niaj revoluciaj antaŭirintoj tiam spertis, kiel ni povas kompreni, ke la feliĉa vivo venas nefacile!”

“NI ESTAS SERVANTOJ DE LA POPOLO”

“Ni devas respekti la amason, kontakti kun la amaso, propagandi inter la amaso kaj helpi al la amaso fari, kion ni povas, por ke la amaso havu la senton, ke la lernantoj, kiujn Prezidanto Maŭ edukis, faras ĉion en servo al la popolo kaj por la revolucio.” Tio estas la tasko, kiun la “Longmarŝa Ruĝgvardio” difinis por si mem en la deklaro, kaj tio estas kion ili devas lerni de la malnova ruĝa armeo. Kiel ili diris, tiel ili faris.

Antaŭ sia ekmarŝo, la junaj revoluciuloj interkonsiliĝis: Kian donacon kun plena signifino ni donos al la amaso laŭvoje? Rezulte, ili aĉetis pli ol 1,200 ekzemplerojn da verkoj de Prezidanto Maŭ ĉiuj en aparta eldono per la monsumo, kiun ili ricevis de laboroj dum sia lernado. La libro de Prezidanto Maŭ estas vivradiko de la laboranta popolo, kaj vera trezoro kun netaksebla valoro! Kiom gajega kaj emociita estis ĉiu el la malriĉ-kampara-

noj, malsuperaj mez-kamparanoj kaj revoluciaj amasoj, kiam li ricevis la altvaloran donacaĵon el iliaj manoj!

La junaj revoluciuloj propagandis survoje la penson de Maŭ Zedong kaj la Decidon de la Centra Kamitato de KPĈ Koncerne al la Granda Proleta Kultura Revolucio. Ili propagandis en ĉiu ajn vilaĝo kaj ĉiu ajn domo, kiujn ili atingis. Iuj el ili redaktis por produkta brigado la nigratabulan gazeton, aliaj kunstudis kune kun komunumanoj la *Cititajn Vortojn de Prezidanto Maŭ*, kaj la triaj lernigis kamparanojn pri kantoj kun la cititaj vortoj de Prezidanto Maŭ kiel la tekstoj.



Revoluciaj junuloj de longmarŝa ruĝa gvardio laŭlegas vortojn de Prezidanto Maŭ antaŭ Tian-anmen-pordego.

Survoje, la junuloj, prenante Lej Feng kiel sian ekzemplon, memkonscie faris grandan nombron da bonaj aferoj por la amasoj. Malgraŭ ke kiom lacaĵ ili estis, tuj post kiam ili atingis unu lokon, ili demetis siajn tornistrojn kaj iris vektportori akvon, tondi harojn, balai kortojn por malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj kaj la familianoj de revoluciaj martiroj kaj armeanoj. Tra la tuta vojo, ili portis akvon kaj purigis kortojn por pli ol 650 familioj de malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj, kaj tondis harojn al pli ol 130 personoj, tial la amasoj nomis ilin “bonaj lernantoj de Prezidanto Maŭ”.

SEKVI LA EKZEMPLON DE P.L.A.

Dum la marŝado la junaj revoluciuloj, sekvante en ĉiuj aferoj la ekzemplon de la Popola Liberiga Armeo, rigore observis la tri ĉefajn regulojn de disciplino kaj ok punktojn de atento. Ili diris: “Ni estas servantoj de la popolo, kiuj havas la devon servi al la popolo, sed ne la rajton difekti la interesojn de la amaso!”

Trinkinte tason da bolinta akvo, la junuloj insistis pri ĝia pago. Estis kampaj rafanoj

plantitaj ĉe la vojrandoj, sed neniu elterigis unu por kvietigi sian soifon kvankam lia gorĝo kvazaŭ brulis.

Iun tagon kiam la junuloj atingis vilaĝon, ili loĝis en la domo de avo Ĝaŭ kaj brulkonsumis kelkajn faskojn da fojno. Poste ili laŭ-preze pagis, sed avo Ĝaŭ decideme malakceptis la pagon. En la dua tago, kiam ili estis foriron-taj, ili ŝtele metis la monon sub lian petrolan lampon. Sed, kiam ili jam iris 4 aŭ 5 liojn, avo Ĝaŭ kuratingis sur biciklo. Kun larmoj flagrantaj en la okuloj, li riproĉis ekscitite: “Foruzinte kelke da fojnfasketoj, vi pritraktis min tiel malintime, vi vere ne komprenis la korsenton de ni malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj!” La junaj revoluciuloj profunde kortuŝiĝis, tamen, ili klarigis kun pacienco: “Ni estas junaj ruĝaj soldatoj de Prezidanto Maŭ kaj rezervitoj de la liberiga armeo. Ni dankas vin pro via bonvolo, sed ni ne devas malobei la tri regulojn de disciplino kaj ok punktojn de atento!” Aŭskultinte tion, avo Ĝaŭ povis nur akcepti la monon. Jam foren la junuloj marŝis dume li restis tie svingante la manon por saluti ilin.

La junaj revoluciuloj portis kun si notlibron. Kiam ili atingis unu vilaĝon, ili petis kritikon kaj opinion pri si de la loka produkta brigado kaj la amaso de komunumanoj. Sed, oni legis el tiu dika notlibro nur tiajn varmajn laŭdojn: “Promesplenaj junuloj!” “Vere ruĝaj soldatetoj de Prezidanto Maŭ vi estas!”

ESTU ELEMENTA LERNANTO DE LABORIST-KAMPARANAJ AMASOJ

Sur la vojo de longmarŝado, ili vidis, ke en ĉiu domo troviĝas la portreto de Prezidanto Maŭ, kaj en kampoj kaj laborlokoj ĉie staras tabuloj kun cititaj vortoj de Prezidanto Maŭ. Iuj komunumanoj povas parkere reciti la cititajn vortojn de Prezidanto Maŭ pli flue ol ili. Ĉie en la vasta kamparo regas la densa politika atmosfero kaj leviĝis la studa entuziasmo de la laborist-kamparanaj amasoj, kio profunde impresis la junajn revoluciulojn kaj plie kuraĝigis ilin studi diligente la verkojn de Prezidanto Maŭ. Ili sin ekzamenis kaj faris inter si parkerajn recitadojn pri cititaj vortoj de Prezidanto Maŭ. Kiam ili atingis sian kampadejon, ili persistis en skribado de notoj pri la studo. Ili uzis, kion ili lernis, kaj rikoltis bonan kaj tujan efikon, kvazaŭ ombro vidiĝas tuj post starigo de stango. Ankaŭ la senkompare profunda klasa sento al Prezidanto Maŭ de la malriĉ-kamparanaro kaj malsupera mez-kamparanaro multe infektis kaj edukis la junajn revoluciulojn.

Unu vesperon, la junuloj tranoktis ĉe iu produkta brigado. Eksciinte, ke ili iros al Pekino por vidi kaj saluti Prezidanton Maŭ, la komunumanoj ege ekscitiĝis. Iu maljuna malriĉ-kamparano, pli ol 70-jara, kun malmiopaj okulvitroj, skribis leteron en tiu sama nokto kaj petis ilin kunporti ĝin al Prezidanto Maŭ. La sekvintan tagon, ankoraŭ ne estis tagiĝo, li hasteme venis por diri adiaŭ al ili kaj ripete alparolis: “Nepre hurau ‘Vivu Prezidanto Maŭ!’ multfoje por mi maljuna malriĉ-kamparano, kiam vi atingos la pordegon Tian-anmen. Estas la plej granda feliĉo por ni malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj, ke li, nia amata, longe longe vivas.” En alia vilaĝo, kelkaj malriĉ-kamparaninoj kiuj eksciis, ke lernantinoj

brodas ĉe lampa lumo flagon prezentota al Prezidanto Maŭ, insistis ilin helpi en brodado. Brodante, ili diris el sia profunda koro: “Ĉiu kudrero kaj ĉiu fadeno ankaŭ montras la ardan amon al la granda gvidanto fare de ni, malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj!”

Kiam ili venis al iu ajn vilaĝo, ĵus demetinte sian tornistran, ili jam estis sieĝitaj de multaj malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kiuj demandis pri ilia farto. Kaj poste ili helpis la junulojn en kuirado de manĝaĵoj. Ĉiuj donis al ili bonegajn zorgojn; eĉ kiam ili misvojis, la loka malriĉ-kamparano aŭ malsupera mez-kamparano senlace kondukis ilin ĝis la vasta vojo. Sed kiam ili esprimis dankojn al tiuj kamparanoj, ĉiam la samon la komunumanoj diris: Ni faras ĉion laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, se vi volas danki, danku do Prezidanton Maŭ, nian amatan. Ili kortuŝiĝis profunde pro tia bonega virto de la malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Survoje de sia longa marŝado, la junaj revoluciuloj sekvante la instruojn de Prezidanto Maŭ malfiere lernis de la amasoj de laborist-kamparanoj, kaj el tiuj ili ĉerpis nutrojn. Ili kun firmeco deziris plibone koni la socion kaj la amason en la longmarŝo-stila piedira intervizito, kaj tutkore servi la popolon, uzante la penson de Maŭ Zedong por ĝisfunde remuldi sian ideologion kaj senton kaj sin hardi en daŭrigantojn de la revolucio vere kompetentajn kaj kun la stilo de la malnovaj ruĝarmeanoj!

* La “tri ĉefaj reguloj de disciplino kaj ok punktoj de atento” estas la disciplino fiksita de kamarado Maŭ Zedong por la Ĉina Ruĝa Laborist-kamparana Armeo en la Dua Enlanda Revolucia Milito. Ĝi konsistigas gravan enhavon de la politika laboro de la ruĝa armeo, kaj ludis grandan rolon en la konstruado de la popola armeo, ĝusta traktado de la rilatoj inter oficiroj kaj soldatoj interne de la armeo, inter la armeo kaj popolo kaj difino de ĝusta politiko de la popola armeo al militkaptitoj. La Ĉina Popola Liberiga Armeo ĝis nun disvolvas tiun gloran tradicion. La tri ĉefaj reguloj de disciplino estas: (1) Ĉiu ago estu laŭ komando; (2) Ne prenu de la amaso eĉ unu kudrilon aŭ unu fadenon; (3) Ĉion militakiritan apartenigu al la kolektivo. La ok punktoj de atento estas: (1) Parolu afable; (2) Aĉetu aŭ vendu juste; (3) Redonu kion oni pruntis; (4) Kompensu, kion oni difektis; (5) Ne batu aŭ insultu alian; (6) Ne difektu grenplantaĵojn; (7) Ne flirtu kun virinoj; kaj (8) Ne turmentu militkaptitojn.

Caj Jonghiang —

Komunisma Batalanto en Fidela Gardo de Granda Kultura Revolucio

ANTAŬ LA GALOPANTA TRAJNO

La epoko de Maŭ Zedong estas epoko, en kiu herooj lavange aperas. En la lastaj jaroj, sin trovis en nia lando sennombraj herooj kaj heroaj kolektivoj, kiaj Lej Feng, Vang Gje, Oŭjang Haj, Maj Hiande, Liu Jinggjun, putodrila trupo n-ro 32111, kiuj disradias pompan brilon de komunismo. Kaj nun en la granda proleta kultura revolucio senprecedenca en la ĉina historio, aperis alia komunisma batalanto Caj Jonghiang, kiu tutkore servis nur al la komunaj interesoj, savis aliulojn per sia vivo kaj fidele gardis tiun revolucion.

Estis oktobro en 1966. Tagnokte trakturadis trajnoj unu post alia, sur la Kiantanggiang-pontego de Ĝegiang-provinco, kiu ligas la sudorientan Ĉinion kun Pekino, la centro de la granda proleta kultura revolucio de la tuta lando. En la vagonoj estis plene portataj junaj ruĝaj gvardianoj. Kun la sento de senlima amego al la Komunista Partio de Ĉinio kaj granda gvidanto Prezidanto Maŭ, ili veturis al Pekino, por akiri revolucionan forton kaj lerni revolucionajn spertojn ĉe Prezidanto Maŭ, kaj poste revenis de Pekino portante la torĉon de la granda proleta kultura revolucio al siaj hejmlokoj por ke tie ĝi dissendu helan lumon.

La 10-an de oktobro, je 34 minutoj post la 2-a, frumatene, en maldensa nebulo kaj profunda mallumo, la trajno n-ro 764 speciala por ruĝaj gvardianoj alkuris norden al la pontego, ekirinte de la urbo Nanĉang, Gianghi-provinco, kun rapideco de 60 kilometroj por ĉiu horo. Tiam la 18-jara armeano Caj Jonghiang garddeĵoris ĉe la pontkapo. Sub la prilumo de la lokomotivo subite li trovis, ke granda lignopeco kuŝas sur la trako, pli ol 40 metrojn sude de

sia posteno. Evidente, tio estas subfosa agado de klasa malamiko. En tiu kriza momento, tiu juna armeano tuj sturmis renkonte al la galopanta vagonaro. Rimarkinte ke homfiguro rapidas al la lokomotivo, la veturigisto tuj faris la urĝan bremson, sed la trajno ankoraŭ forte puŝiĝis antaŭen pro inerteo. Caj Jonghiang flugrapide sinĵetis sur la trakon, enbrakigis la grandan lignopecon kaj desaltis dekstren, sen konsidero pri sia propra danĝero. Ĝuste kiam la baraĵo sur la trako estas forigita, trapasis la trajno. Nun ĝi sekure haltis sur la pontego. La ruĝaj gvardianoj estis savitaj, kaj la pontego protektita. Sed, nia granda proleta revolucia batalanto tamen heroe oferis sian vivon sub la puŝego de la galopanta trajno!

FORTO VENAS DE LA PENSO DE MAŬ ZEDONG

La ĵus 18-jara junulo Caj Jonghiang aliĝis al la Armeo nur ok monatojn. Li tutkore zorgis la komunajn interesojn kaj savis aliajn per sia vivo. De kie venas lia nobla virto kaj komunisma spirito? La respondo estas nur unu: La penso de Maŭ Zedong estas la fonto de la forto.

Li naskiĝis en familio de malriĉ-kamparano kun terura sufero kaj profunda klasa malamo. Dum lia infanaĝo, la gepatroj rakontis al li la klasajn subpremadon kaj ekspluatadon en la malnova socio. Ekde tiam li jam starigis al si la volon ke li fariĝu liberiga armeano post sia plenkreskiĝo por faligi la usonan imperiismon, ekstermi ĉiujn subpremantajn kaj ekspluatantajn reakciulojn kaj gardi la regpotencon de la popolo. Kiam li havis nur 12 jarojn, li jam sekvis la milicanojn de sia vilaĝo plenumi asig-nitan taskon. Estante 14-jara li kuraĝe faris



Kamarado Caj Jonghiang

lukton kontraŭ kontraŭrevoluciulo vizaĝalvizaĝe. Kaj 17-jara li sin anoncis por peti enarmeigon.

Kiam li lernis en elementa lernejo, li plej ŝatis legi la tekston kaj kanti la kanton de *Ruĝas la Oriento*, kiu prikantas Prezidanton Maŭ. Kiel forte li amas Prezidanton Maŭ!

Post sia aliĝo al la Popola Liberiga Armeo, la granda lernejo de la penso de Maŭ Zedong, li aktive respondis la alvokon de kamarado Lin Biaŭ kaj faris decidon ke same kiel la veteranoj li nepre studos la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskultos la vortojn de Prezidanto Maŭ, agos laŭ la instrukcioj de Prezidanto Maŭ kaj estos bona armeano de Prezidanto Maŭ. Kiam en lia roto iris la socialisma eduka movado, li rememoris la historion de sia familio kaj akuzis pri la abomeninda malnova socio. En la kunveno li diris kun ekscitiĝo: “Mian ekziston mi dankas tute al Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ estas ruĝa suno en mia koro.”

Iutage, en lia roto, oni pretis distribui al la kamaradoj la libretojn *Cititaj Vortoj de Prezidanto Maŭ*. Tiam li ĝuste suferis de grava malvarmumo kaj kuŝis sur la lito, sed li pene sinlevis kaj iris por mem preni la libron. Li diris: “Tio estas granda ĝojiga afero. Mi nepre mem iru.” Post la ricevo de la libro li rigardis ĝin kiel trezoron, ĉiutage portis ĝin kun si kaj ĝin legis ĉiam kaj ĉie. Li ofte diris al siaj batalamikoj: “Estus tolereble por mi sen manĝo, sed absolute netolereble sen lego de la

verkoj de Prezidanto Maŭ eĉ dum unu tago! Li montris mirindan persistemon en siaj diligenta studado kaj serioza aplikado de la verkoj de Prezidanto Maŭ. Li ofte diris al siaj kamaradoj: “Mi sentas lumon en mia koro kaj energion en mia korpo post kiam mi studis la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj aŭskultis liajn vortojn. Mi decidis, ke mi studos la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj sekvos lin revolucii dum mia tuta vivo!”

Nokte, kiam li gardstaris ĉe la pontego, rigardante al la trembrilantaj steloj, li verkis la jenan kanton:

*Steloj belas kaj briladas sur ĉiel’,
Ĉiuj sin direktas al la Norda Stel’.
Sed pli luma estas Prezidanto Maŭ —
La unika stel’ en mia kor’.*

*Steloj belas en trembril’,
Mi rigardas sur pontego kun sopir’
Al Pekino, al la Prezidant’,
Sur Tian’ anmen — nia granda la savant’.*

PRENI ĜANG SIDE KIEL SIAN EKZEMPLON

Caj Jonghiang rapide kreskis sub la nutrado de la penso de Maŭ Zedong. Kiam li trovis ĝenaĵojn en sia ideologio, li ĉiam sin komparis kun Ĝang Side, kiun Prezidanto Maŭ laŭdis en la artikolo *Servu al la Popolo*, por fari al si memkritikon. Li postulis sin tiel agi kiel instruis Prezidanto Maŭ en tiu artikolo: “Niaj trupoj ekzistas ekskluzive por la liberigo de la popolo, kaj laboras senrezerve por la intereso de la popolo.” Nelonge post kiam li aliĝis al la Armeo, li pensis en si naive: Tre bone estus, se mi fariĝos gardisto de iu estro, kiu spertis multmultajn batalojn, tiam mi povos lerni de li revoluciajn tradiciojn. Kaj direkti tankon aŭ aŭtomobilon estus ankaŭ bela okupo de mi ŝatata. Kontraŭe al liaj revoj, la gvidanta kamarado asignis lin gardi la Kiantanggiang-pontegon, tial li iom ĉagreniĝis. Sed, studinte *Servu al la Popolo*, li eksciis ke Ĝang Side bone faris ĉian ajn laboron kiam oni asignis al li. “Heroo estas Ĝang Side”, li diris ekscitite, “mi devas tiel servi al la popolo kiel li.”

De tiam Caj Jonghiang laboris devkonscie same kiel Ĝang Side. Li gardis la pontegon

kaj ĝin li ankaŭ amis. Li diris al sia batalamiko: “Mi nepre ne lasos aĉulon ĵeti sur la pontegon unu ŝtoneton, eĉ se ĝi estus tiel malgranda kiel kuglo.” Iun nokton, ĵus reveninte post sia deĵoro, li jam demetis sian veston kaj estis preta enlitiĝi. Tiam li informiĝis pri tio ke io suspektinda troviĝas ĉe piliero de la pontego. Li tuj ellitiĝis kaj la unua antaŭkuris por fari traserĉon inter la fragmitoj altaj je pli ol homa staturō. Li skribis en sia taglibro ripetfoje: “Mian junecon mi volas dediĉi al la pontego kaj al la popolo.”

Ankaŭ prenante Ĉang Side kiel ekzemplon, li tutkore servis por la komunaj interesoj kaj al la popolo, kaj zorgis la kolektivon kaj aliajn kamaradojn pli ol sin mem. En ferioj aŭ ripozhoroj, li ĉiam konkure balais la postenan budon kaj necesejon. Dum fizika laborado en varmaj tagoj, li ofte cedis la pajlĉapelon, ventumilon kaj trinkan akvon al aliaj kaj mem toleris volonte la soifon kaj brulan varmon de la suno. Li ofte diris: Mi sentas min ĝoja kaj feliĉa, kiam mi kontribuis pli multe da energio kaj plenumis pli multe da taskoj por la revolucio kaj popolo.

“TRI MALNOVAJ ARTIKOLOJ” — TREZORO POR REVOLUCIO

Kelkajn tagojn antaŭ sia martiriĝo, Ĉaj Jonghiang verkis kune kun sia batalamiko versaĵon laŭdantan tri artikolojn de Prezidanto Maŭ, kiujn li ofte studis, t. e., *Servu al la Popolo*, *Rememore al Norman Bethune* kaj *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo*. Ili estas tre popularaj en Ĉinio kaj estas kutime nomataj “Tri Malnovaj Artikoloj”.

Lia versaĵo tekstas jene:

*La tri artikoloj estas ja trezoroj,
Nemalhaveblaj por la laborpopolanoj,
Ĉar ĉiu fraz' el ili, saĝa kaj instrua,
Akrigas al ni niajn vid- kaj pens-organojn.
Ho, tre tre karaj tri artikoloj,
Mi firme tenos vin en koro,
Kiam mi scias vin apliki,
Plej ruĝos mia koro, plej klariĝos mia vido
Por bone vidi l' vojon kaj direkton,
Kaj revolucii energie kun memfido.*

Per tiu versaĵo li montris sian sperton en ideologia remuldo kun la “Tri Malnovaj Artikoloj” kiel sentenco. Laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ en tiuj artikoloj, li faris ĉion eblan por forigi la egoismon kaj starigi al si la kolektivismon. Li ĉiam postulis sin tiel, kiel diris Prezidanto Maŭ en la tri artikoloj: Oni “ekzistas ekskluzive por la liberigo de la popolo”, “laboras senrezerve por la interesoj de la popolo” kaj havas “ekstreme respondeceman senton al la laboro” kaj “ekstreme varman koron al kamaradoj kaj la popolo”. Neniam li memkontentiĝis kiam li faris bonojn, kaj atinginte sukcesojn li ĉiam klopodis por trovi siajn mankojn.

Iun tagmezon, li ripozis, ĉar li estis tre laca pro milita ekzerco en kelkaj sinsekvaj noktoj. Subite li aŭdis gruntadon kaj rimarkis ke jam estas tempo por manĝigi la porkojn. Sed li pensis ke certe estas iu kiu prizorgos tion, do li daŭrigis sian ripozon. Tamen la porkoj ankoraŭ gruntadis. Li pensis plie: Preterlasi la laboron kaj mem resti senfare, ĉu tio estas “ekstreme respondecema sento al la laboro”? Ĉu tio povas esti konsiderata kiel “labori ekskluzive kaj senrezerve por la interesoj de la popolo”? Li tuj iris manĝigi la porkojn.

La verkoj de Prezidanto Maŭ kaj parto de la libroj pri herooj, kiujn Ĉaj Jonghiang legadis antaŭ sia morto.



Fininte la laŭdindan laboron, li iris al la subplotonestro kaj tamen faris memkritikon. Li diris: “En mia kapo ankoraŭ troviĝis la vorto ‘maldiligenteco’ antaŭ ol mi manĝigis la porkojn.” Tio montras, ke li ne toleris iometon da egoismo en sia koro.

Dimanĉe, li ricevis permeson eliri por ion aĉeti. Sur la returna vojo, li vidis ke kelkaj laboristoj transportis karbon. Li alpaŝis por ilin helpi kaj tiel li forgesis reveni al sia roto en la difinita horo. La subplotonestro kritikis lin pro lia prokrastita reveno. Komence li konsideris tiun kritikon maljusta kaj iom ĉagreniĝis. Li do elprenis sian libreton *Cititaj Vortoj de Prezidanto Maŭ* kaj foje-refoje legis la frazon: “Ĉar ni servas al la popolo, sekve ni ne timas, ke aliaj kritikis niajn mankojn, se ni tiajn havas.” (el *Servu al la Popolo*) Finfine venis al lia kapo la ideo: Tute egale kiom ajn multe da bonaĵoj mi faris, por ĉiu okazo, mia malfruiĝo estas malprava. Poste, sciinte pro kio li malfruiĝis, la subplotonestro laŭdis lin pri lia helpemo al aliaj kaj faris antaŭ li memkritikon. Sed li diris: “Vi kritikis ne mian meriton sed mian malfruiĝon. Vi pravas!” Li prenis la kritikon kiel la plej grandan klasan amon donitan al si de la kamaradoj kaj memkonscie remuldis sian ideologion per la “Tri Malnovaj Artikoloj” kiel armiloj.

El la artikolo *Rememore al Norman Bethune*, li lernis la internaciisman spiriton de Bethune kaj starigis al si firman volon “gardi sur la pontego kaj teni la tutan mondon en sia sino”. Foje, kiam li iris sur la pontego kune kun sia batalamiko ŝultro ĉe ŝultro, li diris: “La pontego kondukas norden al Pekino kaj sudokcidenten al Vjetnamio. Prezidanto Maŭ ordonis min gardi la pontegon, tio signifas gardon de la proleta regpotenco de nia patrio kaj subtenon al la monda revolucio.” Li ĉiam ligis sian laboron kun la revolucio de la ĉina kaj monda popoloj.

STURMANTO KAJ GARDANTO DE LA GRANDA KULTURA REVOLUCIO

Ĉar Caj Jonghiang sin armis per la penso de Maŭ Zedong, frakasis la egoismon kaj stariĝis la kolektivismon, tial, en la granda proleta kultura revolucio, li povis stari kuraĝe sur la plej antaŭa batalfronto kaj ludis rolon de stur-

manto en kritiko de burĝa ideologio kaj gardanto de la penso de Maŭ Zedong.

Post kiam la gazetaro malkaŝis la krimagojn de la kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj elementoj pri ilia malica atako kontraŭ la penso de Maŭ Zedong, li tuj refutis al ili kun indigno la senhontajn klaĉojn per multaj faktoj en la kondamna kunveno. Li ankaŭ skribis artikolojn en la murgazeto por kritiki la kontraŭpartiajn kaj kontraŭsocialismajn filmojn *Marŝado kontraŭ Vento en Mil Lioj*, *Du Familioj*, *Kaptado de Rekrutoj* kaj aliajn fiteatraĵojn. Ĉiuj lin laŭdis: Caj Jonghiang estas vere sturmanto por kritiki la malnovan mondon.

Samtempe, li ankaŭ plenforte propagandis la penson de Maŭ Zedong. Li ofte verkis kaj prezentis teatraĵojn, kiuj kantas la grandan Komunistan Partion de Ĉinio, grandan gvidanton Prezidanton Maŭ kaj la ĉiamvenkan penson de Maŭ Zedong. Kiam la ruĝaj gvardianoj forbalais la malnovajn ideojn, kulturon, morojn kaj kutimojn, kaj ĉiujn demonojn kaj diablojn, li verkis poemojn en sia taglibro por varme laŭdi iliajn revoluciajn agadojn. Inter liaj verkoj troviĝas la jena:

*Vastega estas la arme' de ruĝaj gvardianoj,
Armitaj per la pens' de Maŭ Zedong,
Sonore tontras la revoluciaj batalkantoj,
Panike fuĝas vane la demonoj en la mond'.*

*La ruĝaj gvardianoj kun firmega volo
Batalas brave por proleta penso kontraŭ
burĝ-ide',*

*Ke komunismo brilu por eterne,
Kaj la malnova mondo falu en pere'.*

La vivo de Caj Jonghiang estas mallonga sed brilplena dum kiu li servis al la popolo ekskluzive kaj senrezerve. Kreskante sub la nutrado de la penso de Maŭ Zedong, li faris multon da bonoj utilaj al la popolo kaj la revolucio sur sia ordinara laborposteno; li sentime oferis sian vivon en la kriza momento por savi siajn klasfratojn. Li mortis por la interesoj de la popolo kaj lia morto estas pli peza ol la monto Tajŝan.

Nun la popolo de nia tuta lando karmemoras lian morton kaj sekvas lian ekzemplon antaŭenmarŝi sur la vojo de la granda proleta kultura revolucio ĉiam laŭ la direkto montrita de Prezidanto Maŭ.

Ŝultro ĉe Ŝultro

Batalas kun Ni

la Fremdlandaj Amikoj en Pekino

EN la nova alttajo de la mondkua, granda proleta kultura revolucio, multaj fremdlandaj specialistoj en Pekino, kiuj helpas nin en konstruado, fervore laŭdas kaj aktive subtenas tiun ĉi grandan revolucion, kaj esprimas senliman revolucionan pasion por kune defii la malnovan mondon ŝultro ĉe ŝultro kun la ĉina popolo. Sube estas kelkaj kortuŝaj anekdotoj.

OPINI-AFIŜOJ DE FREMDLANDAJ SPECIALISTOJ

Unue, ni citu kelkajn fragmentojn el la opini-afiŝoj skribitaj de fremdlandaj amikoj!

Pli ol kvindek-jara **angla amiko Michael Shapiro** laboris en Ĉinio jam 17 jarojn. Post la komenciĝo de la granda kultura revolucio, li dufoje skribis en sendormaj noktoj malfermitajn leterojn plenajn de revolucia pasio al la ĉinaj kamaradoj en sia institucio. Li elmetis multajn pensindajn demandojn, dediĉante sian ruĝan koron de proleta revoluciisto:

“Kiel komunisto, mia vivo strikte ligiĝas kun mia laboro en Ĉinio... ‘Vivo estas batalo!’ Mi treege deziras partopreni la batalon de la vivo por

Cejlonaj amikoj surportas la brak-rubandon de ruĝa gvardio kaj varme laŭdas la revolucionan agadon de la junaj revoluciuloj.



la interesoj de la proleta afero, kaj kontribui mian parton en la batalo.

“Ni decidis fari nian tutan eblon por ke niaj infanoj kreskiĝu bonaj proletaj revoluciuloj kaj bonaj idoj en la epoko de Maŭ Zedong. Ankaŭ ni mem devas transformi niajn pensojn kaj kutimojn, kaj ludi indan rolon en la granda kultura revolucio...”

La belga amiko Henri Dethier kaj lia edzino Monique Pairoux, kiuj venis labori en Ĉinio en 1965, publikigis samtempe du revoluciajn opini-afiŝojn. Tiujn opini-afiŝojn la ĉinaj gekamaradoj, kiuj laboras en la sama institucio kiel ili, konkure kopiis, kaj multaj eĉ larmis de emocio dum la kopiado. La belgaj geamikoj skribis:

“Ni ne volas esti flankuloj, sed same kiel vi ĉiuj, batali kune kun la revoluciaj kamaradoj de Ĉinio kaj la tuta mondo, por la venko de komunismo, elimino de imperiismo kaj reakciularo kaj abolo de ĉiuj ekspluataj sistemoj de homo per homo!

“Ni venis al Ĉinio ne por mono, sed por helpi la ĉinan popolon. Mono povas nur degenerigi ĝian posedanton.”

La usona amiko Eleanor Chaidin, franca amiko Chanal kaj du aliaj belgaj amikoj Lucien Pary kaj Arlette Beaufort esprimis en sia komuna opini-afiŝo la decidon kune antaŭenmarŝi kun la ĉinaj kamaradoj en la granda kultura revolucio, kaj ilian senliman amon kaj senliman fidon al la penso de Maŭ Zedong:

“Ni venis de diversaj lokoj de la mondo. Ni decidis ke: (1) ni pli energie transformos nian ideologion, revoluciigos nin kaj starigos la proletan mondkoncepton; (2) pro tio, ni sisteme studos la penson de Maŭ Zedong kaj klopodos studi kaj apliki ĝin kreive; (3) ni ĉiam traktos la asignitan al ni laboron kun la sinteno meti politikon en komando... Por venki niajn komunajn malamikojn — la usonan imperiismon, modernan reviziismon kaj ĉiujn reakciulojn, kaj por ke la penso de Maŭ Zedong venku en la tuta mondo, ni batalos ŝultro ĉe ŝultro kun la ĉina popolo!”

Estas multaj tiaj revoluciaj opini-afiŝoj. En la tempo kiam multaj fremdlandaj amikoj publikigis la revoluciajn opini-afiŝojn kaj faris revoluciajn iniciatojn, iuj el ili pendigis enkadritajn portretojn de Prezidanto Maŭ en labor- kaj dorm-ĉambroj, kaj algluis ĉe apude kopiojn de eldiroj de Prezidanto Maŭ mem skribitajn. Iuj meminiciate organizis studrondon por studi verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj ilin legas ĉiutage kaj diskutas periode. Ili diris: “La verkoj de Prezidanto Maŭ estas la

vero kiu gvidas la mondan revolucion. Ni devas ilin studi ĉiutage kaj aŭskulti ĉiuvorte.” Iuj fremdlandaj amikoj proponis nomi la domegon, en kiu ili loĝas, “Domego de Norman Bethune”, montrante ke ili ĉiuj volas fariĝi internaciismaj batalantoj laŭ la modelo de Norman Bethune. Ili skribis la vortojn “por la revolucio” sur la skribaj maŝinoj uzataj dum laborado, kaj laboras pli energie kaj diligente. Iuj fremdlandaj amikoj verkis tutan nokton post la laboro, por prezenti al sia popolo la grandan signifon kaj venkan situacion de la granda kultura revolucio de Ĉinio; aliaj tradukadis sub la lampolumo verkojn de Prezidanto Maŭ ĝis profunda nokto, por ke ili aperu en ilia propra lando. Ili diris: “Ni devas rapide disvastigi la voĉon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ tra la tuta mondo!”

LA GRANDA KULTURA REVOLUCIO DE ĈINIO KONCERNAS LA SORTON DE LA MONDO

Pro kio la diverslandaj amikoj montras tiom ardan revolucionan pasion dum la granda kultura revolucio de nia lando? Ni ricevis ĉiam pli profundan komprenon lastatempe, el la ardaĵaj paroloj de multaj fremdlandaj specialistoj dum nia kontaktado kun ili.

Iu amiko el azia lando diris: “La granda kultura revolucio de Ĉinio estas grava historia afero kiu koncernas la sorton de la tuta mondo. Kun Ĉinio kiel la ĉiam ruĝa revolucia standardo, estos espero por la revolucio de la tuta mondo!”

Iu afrika amiko diris: “La granda kultura revolucio de Ĉinio estas granda iniciato en la monda historio. Ĝia venka antaŭenmarŝo nerefuteble deklaras al la tutmonda revolucia popolo, ke estas necese konduki tiun ĉi grandan revolucion en la ideologia sfero, se oni volas por ĉiam teni revolucionan junecon.”

Iu latinamerika amiko diris: “La granda kultura revolucio de Ĉinio estas la plej granda, plej profunda kaj plej ĝisfunda revolucio. Post tiu ĉi granda revolucio, Ĉinio, la centro kaj bazloko de la monda revolucio, certe fariĝos pli potenca, kaj certe pli forte subtenos la revoluciajn movadojn de Azio, Afriko, Latinameriko kaj la tutmonda popolo.”

Kiam ni vizitis **la italan specialiston Manlio Dinucci** en lia laborĉambro, plena de profunda amo, alten rigardante al la portreto de Prezidanto Maŭ, kiun li persone pendigis sur la muro, kaj montrante la cititajn vortojn de Prezidanto Maŭ de li mem skribitajn ambaŭflanke, la itala amiko diris al ni kun emocio: “La granda proleta kultura

revolucio de Ĉinio, persone iniciatita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, estas la plej bona garantio por Ĉinio venke finkonstrui socialismon kaj transiri al komunismo. En tiu granda revolucio, la malnova mondo estas ĝisfunde enterigata kaj la nova mondo estas prospere disvolviĝanta, kaj la nova generacio de proletaro estas edukata. La granda kultura revolucio havas grandegan signifon tiel por Ĉinio kiel por la tuta mondo.”

NENIAM ŜANĜIĜOS LA KOLORO DE LA ŜTATO DE LA ĈINA PROLETARO

Same kiel ĉiuj revoluciuloj de la tuta mondo, multaj fremdlandaj amikoj rigardas la novan Ĉinion sub la brilo de la penso de Maŭ Zedong kiel la esperon de la tutmonda popolo. Ĝuste pro tio, ili zorgas la hodiaŭon kaj des pli la morgaŭon de Ĉinio. Ili alte taksas la aŭdacajn pionirojn en la granda kultura revolucio — la ruĝan gvardion kaj aliajn revoluciajn junularajn organizaĵojn.

Jemena amiko Saleh Dahhan estas poeto. Kiam la ĉefurbaj ruĝaj gvardianoj en la unua tago forbalais la “kvar malnova-ojn” sur la stratoj, li estis profunde infektita de la revolucia spirito de

la junaj revoluciaj batalantoj, kaj kun neretenebla emocio verkis en la tago unu poemon prikantantan la ruĝan gvardion. Li skribis: Ĉinaj junaj batalantoj, lernantoj de Maŭ Zedong! Vi defendas la ruĝan morgaŭon kaj la aferon de la glora Partio kaj la mondon de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj de Maŭ Zedong-a Ĉinio en la granda oriento!

Kvankam la **brazila amiko Jayme Marthins** ne estas poeto, tamen li per la poezia lingvo laŭdis, ke la ĉina granda kultura revolucio kreas kaj edukas nun tutan generacion da novaj junuloj kaj sennombrajn daŭrigantojn de la revolucia afero de la proletaro. Li al ni diris: “Por la centmilionoj da novaj herooj armitaj per la penso de Maŭ Zedong kaj aperontaj en la mondo, la steloj en la firmamento prezentas nur negrandan nombron. Tiuj ĉi novtipaj herooj por ĉiam brilos kiel la steloj en la ruĝa kosmo de proletaro!”

Novzelanda amiko Douglas Lake el Oceanio kaj **usona amiko Israel Epstein** el la Norda Ameriko, same alte taksis la revolucian spiriton de la ruĝaj gvardianoj kaj la junularo de Ĉinio. Lake diris: “La apero de la ruĝaj gvardianoj kaj ilia revolucia

Fremdlandaj specialistoj en Pekino sin hardas per fizika laboro en kamparo. Ili starigis ĉe la kampo tabuleton kun vortoj de Prezidanto Maŭ, el kies instruoj ili ĉerpas senliman forton. Ili kaj studas kaj laboras.



agado signifas ne nur ke plifortiĝos socialismo en tiu generacio de Ĉinio, sed ankaŭ ke la proleta ŝtato de Ĉinio neniam ŝanĝos sian koloron. La tutmonda revolucia popolo, kiu oponas kontraŭ la usona imperiismo, ricevos pligrandan subtenon de Ĉinio, la revolucia bazloko de la mondo.” Epstein montris: “La ĉina revolucia junularo estas neniam tiel plena de entuziasmo kaj batalvolo kiel hodiaŭ. Ili havas ne nur revolucionan entuziasmon sed ankaŭ la penson de Maŭ Zedong kiel orientilon. En sia koro ili tenas kaj la ĉinan revolucion kaj la tutmondan revolucion. La sola kriterio, kiun ili havas en la koro por distingi pravon disde malpravo, estas la penso de Maŭ Zedong, la intereso de la proletaro kaj la intereso de la revolucioj de Ĉinio kaj la mondo.”

ĈINIO FARIĜAS GRANDA LERNEJO DE LA PENSO DE MAŬ ZEDONG

Karaj kamaradoj-legantoj, permesu ke ni ĉi tie prezentu al vi la studrondon pri la verkoj de Prezidanto Maŭ organizitan de parto el fremdlandaj specialistoj en Pekino kaj iliajn emociajn agadojn. Kiam la membroj de la rondo studis la verkon de kamarado Lin Biaŭ *Vivu la Venko de Popola Milito*, por pli bone mastri la brilan penson de Prezidanto Maŭ pri popola milito, ili vizitis la Revolucionan Militan Muzeon de Ĉina Popolo kvardek fojojn sinsekve, kaj poste diskutis sennombrajn fojojn lige kun la studo kaj vizito. Iutage, ni vizitis membron de la studrondo, **cejlandan amikon Vannithamby Kanthaswamy**.

Tiu vestis sin en simpla kacia uniformo, kun insigno de portreto de Prezidanto Maŭ sur la brusto. Kiam li parolis pri la granda signifo de la granda kultura revolucio iniciatita de Prezidanto Maŭ kaj la neelĉerpebla potenco de la penso de Maŭ Zedong, lia parolado entuziasme fluis nehaltigeble.

Li diris: “Prezidanto Maŭ estas la plej granda marksist-leninisto, la plej granda revoluciisto kaj la plej granda genio en la nuna epoko. Prezidanto Maŭ estas la granda gvidanto kaj ĉefkomandanto de la monda revolucio. Li resumis la spertojn de la komunismaj movadoj de Ĉinio kaj de la tuta mondo, elmetis la teorion pri kontraŭdiroj, klasoj kaj klasbatalo en la socialisma socio, iniciatis la nunan grandan proletan kulturan revolucion, kaj tiel garantiis deradike ke Ĉinio fariĝos nekonkerebla citadelo kaj bazloko de la monda revolucio.”

Li diris ankaŭ: “La penso de Maŭ Zedong estas la kulmino de marksism-leninismo kaj estas ankaŭ la brila stelo gvidanta vojon de la monda

revolucio. En la nuna granda kultura revolucio, Ĉinio fariĝas granda lernejo de la penso de Maŭ Zedong. La subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj de la tuta mondo vidas la grandan rolon ludatan de la penso de Maŭ Zedong en la afero de la ĉina popola revolucio, kaj ĉiam pli kredas senhezite, ke nur la penso de Maŭ Zedong povas gvidi la proletan revolucion de la mondo al venko!


LA BRILO DE LA PENSO DE MAŬ ZEDONG LUMIGAS LA TUTAN MONDON

Multaj fremdlandaj amikoj, kiujn ni kontaktis, ofte kun plej granda entuziasmo kaj per plej belaj vortoj, aplaudis la grandan penson de Maŭ Zedong, kaj montris ke la penso de Maŭ Zedong estas la fonto de ĉiuj venkoj. **Nigerlanda amiko Hamidu Idrissa** el la batalanta Afriko, foje kaj refoje ripetis al ni en la ĉina lingvo, dum ni vizitis lin: “Navigadon en maro oni dankas al direktilisto!” Li ankaŭ recitis en la ĉina la tekston de la kanto *Navigadon en Maro Oni Dankas al Direktilisto*, kaj al ni montris, ke ne nur la ĉina granda kultura revolucio kaj la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado entute ne povas disiĝi de la granda direktilisto Prezidanto Maŭ, kaj dependas de la ĉiamvenka penso de Prezidanto Maŭ, sed ankaŭ la tutmonda revolucio ne povas disiĝi de la gvidado de la granda direktilisto Prezidanto Maŭ, kaj bezonas la lumigadon de la brilo de la penso de Maŭ Zedong.

Hamidu Idrissa persistas je studado de verkoj de Prezidanto Maŭ ĉiutage, kaj povas parkeri multe da trafaj eldiroj de Prezidanto Maŭ. Li diris al ni, ke post la studado de verkoj de Prezidanto Maŭ, li kaj multaj afrikaj amikoj ĉiuj sentas grandan intimecon. Kvankam Prezidanto Maŭ neniam estis en Afriko, tamen ŝajnas al ili, kvazaŭ li persone vizitis Afrikon, ĉar multaj problemoj priparolitaj de Prezidanto Maŭ ja treege konformas al la reala stato de Afriko. Kun ekstrema sincereco la afrika amiko diris al ni: “Ni tre tre dankas al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, ĉar li donis al la revoluciaj popoloj de la tuta mondo la plej efikan, plej fortan ideologian armilon.” “La penso de Maŭ Zedong estas la plej alta orientilo de la ĉina revolucio, kaj ankaŭ estas la plej alta orientilo de la monda revolucio. Post la nuna granda kultura revolucio, la penso de Maŭ Zedong pli brile radios, lumigante la vojon sur kiu antaŭenmarŝas la revoluciaj popoloj de la tuta mondo! Tio estas la plej granda feliĉo kaj la plej ĝojinda informo por la revoluciaj popoloj de la tuta mondo.”

“Vivu la granda penso de Maŭ Zedong!” Tiu frazo senĉese eĥas ĉie tra la tuta mondo.

La Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato konstante organizis siajn studentojn partopreni politikan movadon por ke ili pli intense hardu sin kaj lernu de la laboristaj kaj kamparanaj amasoj. Tiu ĉi foto montras, ke la studentoj partoprenas la kunvenon kunvokitan de diversaj rondoj de Janan por kontraŭstari la dissplitigan kaj kapitulacian agadon de Kuomintang.



Ekspozicio pri la Historio de Kangda Multe Vizitata de Revolucia Amaso



La Ĉina Popola Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato estis starigita sub la rekta gvido de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ mem prezidis la Edukan Komitaton de tiu ĉi universitato kaj elektis k-don Lin Biaŭ kiel ĝian rektoron kaj politikan komisaron. Jen estas foto de Prezidanto Maŭ kaj k-do Lin Biaŭ.

KOMENCE de la 1-a de aŭgusto 1966, la ekspozicio pri la historio de la Ĉina Popola Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato (aŭ mallonge dirite, laŭ prononco de la ĉinaj ideografiaĵoj: Kangda) estis aranĝita, unu post la alia, en diversaj lokoj tra la tuta lando. Revolucia amaso en nombro de miloj kaj dekmiloj vizitis ĝin kaj ricevis profundan edukon.

La Ĉina Popola Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato estis plej novtipa, plej revolucia kaj plej progresema lernejo, starigita en 1936 sub la rekta gvido kaj intima prizorgo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ. Tiam Ĉinio troviĝis ĝuste en la antaŭvespero de la granda kontraŭjapana nacia

revolucia milito. La starigo de Kangda, konforme al la nova situacio de la revolucia batalo, celis al la kulturado de grandnombraj kontraŭjapanaj revoluciaj kadroj. Kangda estas tipa ekzemplo pri la kompleta efektivigo de la eduka ideologio de Prezidanto Maŭ kaj modelo de proletara eduko. La tradicio de Kangda estas glora tradicio de la proletara eduko de nia lando. La kerno de tiu tradicio estas alte teni la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, elstarigi politikon, preni la verkojn de Prezidanto Maŭ kiel fundamentan instru-materialon, studi, efektivi kaj dissemi la penson de Maŭ Zedong kaj armi la vastajn revoluciajn kadrojn per la penso de Maŭ Zedong. Prezidanto Maŭ persone ankaŭ prenis sur sin la prezidantecon de la Eduka Komitato de

Kangda. Li persone faris lekciojn kaj raportojn, kaj li elektis sian plej intiman batalamikon k-don Lin Biaŭ kiel rektoron kaj politikan komisararon de tiu universitato. La eduka orientilo de Kangda difinita de Prezidanto Maŭ mem estas: firma kaj korekta politika direkto, penema kaj modesta laborstilo, kaj elaste flekseblaj kaj facile adapteblaj strategio kaj taktiko. La lerneja stilo de Kangda

estas: unuiĝo, streĉiteco, seriozeco kaj vicleco. La kerno de la eduko de Kangda estas politika eduko, remuldo de ideologio, plialtigo de la proletara konscio de la lernantoj kaj paŝo-post-paŝa starigo de granda revolucia idealo kaj proleta mondkoncepto. La principo de ĝia edukado estas kombiniĝo de teorio kun praktiko, malmulteco sed eliteco. Ĝia eduka metodo tre kreiva donis grandan atenton al la disvolvo de la aktiva studemo de la lernantoj, emfazis la inspirigan metodon kaj kontraŭis la metodon de englutigo, postulis la kuniĝon de la gvidantoj, instruistoj kaj lernantoj, aparte atentis pri la organizado de la lernantoj por lerni kaj hardiĝi en klasa batalo kaj produkta batalo kaj efektivigis la kombiniĝon de teo-

rio kun praktiko, kuniĝon de eduko kun produkt-laboro kaj kuniĝon de intelektuloj kun la laborista kaj kamparana amaso. La instruistoj, oficistoj kaj lernantoj unuflanke diligente studis kaj aliflanke persistis en produktado. Ili mem fosis kavernojn, konstruis domojn por la universitato, ekspluatis virgan teron por kulturi legomojn, ŝpinis kaj teksis.


La serio da instrukcioj difinis korektajn direkton kaj vojon por la eksterordinara proletarigo kaj eksterordinara batalpretigo de Kangda.

Dum la naŭ jaroj ekde 1936, kiam ĝi stariĝis, ĝis 1945, kiam ĝi alinomiĝis al la Milita kaj Politika Universitato de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, en Kangda kaj ĝiaj 12 branĉaj lernejoj, starigitaj unu post alia en diversaj kontraŭjapanaj bazlokoj, estis

kulturitaj pli ol cent mil revoluciaj kadroj, kiuj estas fide-laj al la Partio kaj la afero de proletara liberigo kaj faris grandan kontribuon al la venko de la revolucia milito de la ĉina popolo. Dank' al la energia disvastigo de k-do Lin Biaŭ, la eduka orientilo kaj lerneja stilo, kiujn Prezidanto Maŭ mem difinis por Kangda, jam fariĝis hodiaŭ bonega stilo, kiun komune lernas kaj disvolvas la tuta armeo kaj la diversaj rondoj kaj profesiuloj de la tuta lando. La gvida ideo, principo, enhavo kaj metodo de edukado de Kangda starigis brilan ekzemplon por la proletara edukado de nia lando.

La ekspozicio pri la historio de Kangda okazigita en diversaj lokoj de la lando konsistis el kvar partoj: 1-a, starigo sub la rekta gvido de la Centra

Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ; 2-a, unuigo, eduko kaj remuldo de junaj intelektuloj per la penso de Maŭ Zedong; 3-a, lernado kaj batalado en la postfronto de la malamiko; 4-a, partopreno en la movadoj de stilreĝustigo kaj produktado, sinpretigo por reatako. Ekspozitaj estas pli ol 300 revoluciaj objektoj kaj fotoj, kiuj



Surskribo farita de Prezidanto Maŭ en 1939 por la Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato okaze de la produkta movado: "Nun oni kaj lernas kaj produktas, kaj en la estonteco oni kaj militos kaj produktos. Tio estas la stilo de la Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato. Per tio oni povos venki ĉian ajn malamikon."

sisteme montris la brilan proceson de la naskiĝo kaj kresko de Kangda, vive kaj komplete prezentis la grandan edukan ideologion de Prezidanto Maŭ. Inter la ekspozitaĵoj estis serio da gravaj instrukcioj fare de CK de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ al Kangda kaj multaj aŭtografaj surskriboj de Prezidanto Maŭ. Estis multaj grandaj verkoj de Prezidanto Maŭ skribitaj dum la periodoj de la Dua Enlanda Revolucia Milito kaj de la Kontraŭjapana Rezistmilito, kiuj estis sian-tempe fundamenta instru-materialo de Kangda, kaj inter ili kelkaj estis paroladoj faritaj de Prezidanto Maŭ en Kangda. Inter la ekspozitaĵoj estis ankaŭ bildoj kaj fotoj, kiuj spegulis la studon, batalon, fizikan laboron kaj revolucionan kulturan aktivadon de la lernantoj, kaj fotoj pri la vizito de eksterlandaj amikoj kaj iliaj varmaj laŭdoj al Kangda.

Dum la ekspozado senĉese faris viziton la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj, armeanoj, revolucionaj instruistoj kaj lernantoj, ruĝaj gvardianoj kaj revolucionaj kadroj en diversaj lokoj. En Ŝanhajo la ekspozicio daŭris dek tagojn kaj akceptis pli ol cent mil vizitantojn. Multaj revolucionaj instruistoj kaj lernantoj vojaĝis kelkcent liojn kaj venis al la provinca ĉefurbo por viziti la ekspozicion. La ĝenerala opinio de la vizitintoj estas, ke la rememorigo pri la revolucia tradicio de Kangda en la alttajo de la granda proleta kultura revolucio estas plej viva, plej profunda kaj plej kreiva leciono pri la penso de Maŭ Zedong, kaj tio pliprofundigas la senliman amon, senliman kredon kaj senliman

adoron al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong.

Vizitinte la ekspozicion multaj revolucionaj instruistoj kaj lernantoj okazigis kunsidojn. Ili diris kun ekscito: “La granda eduka ideologio de Prezidanto Maŭ estas plej sagaca kaj plej korekta. Kangda estas la plej novtipa, plej revolucia kaj plej progresema lernejo en la mondo, kaj ni nepre prenas ĝin kiel ekzemplon, decideme iras la vojon de Kangda, starigas lernejojn laŭ ĝia modelo, frakasas ĝisfunde la malnovan eduksistemon kaj ĉiam flirtigas la ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong sur la pozicio de proleta edukado.” Multaj revolucionaj junuloj fiere diris: “Ni iros definitive la vojon de Kangda. Lasu la imperiistojn kaj modernajn reviziistojn plori. Ni, la juna generacio, ĉiam estos ruĝaj daŭrigantoj de la proletara revolucia afero.”

Multaj komandantoj kaj batalantoj de la Popola Liberiga Armeo kaj la instruistoj kaj lernantoj de militaj lernejoj kaj institutoj, vizitinte la ekspozicion, unuanime diris, ke ili firme respondos la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ kaj faros la armeon granda revoluciigita lernejo. Ekprenante ŝpaton ili kapablas kulturi teron. Ekprenante martelon, ili kapablas labori. Ekprenante pafilon, ili kapablas batali. Ekprenante plumon, ili kapablas kritiki la burĝaron. Ili ĉiam estos fidelaj al Prezidanto Maŭ kaj al la penso de Maŭ Zedong, kaj ili defendos la feran landon de la proletaro tiel, ke ĝi neniam ŝanĝu sian koloron dum la senfinaj venontaj generacioj.



La edukaj principoj de la Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato estas “kombiniĝo de teorio kun praktiko” kaj “malmulteco sed eliteco”. La studentoj unuflanke studas teoriojn kaj aliflanke praktikas.



Instruistoj kaj lernantoj de la mezgrada profesia fako en kunveno pri studo kaj apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ.

Nova “Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato” Hodiaŭ

— pri la Tarim-a Agriga kaj Agrikultura Universitato

EN 1958, estis fondita la Tarim-a Agriga kaj Agrikultura Universitato de la Produkta kaj Konstrua Korpuso de Hingiang-a Milita Regiono en la centro de Tarim-a Agriga Regiono. La universitato estas de revolucia tipo laŭ la ekzemplo de la Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato.¹

Dum la pasintaj ok jaroj, per la penso de Maŭ Zedong, estis kulturitaj en tiu ĉi universitato ĉirkaŭ mil novtipaj laboruloj, kiuj kun proleta konscio kapablas fari laboron kaj mensan kaj fizikan.

Ĉi tie la instruistoj, kadroj kaj lernantoj instruas kaj lernas dum fizika laboro kaj kreskas en la

La lernantoj de la klaso 65 de akvoutiliga fako iras al la kampoj fari praktikadon.



ventegoj kaj ondegoj de klasa batalo, kovrante sian tutan korpon per koto.

VERKOJ DE PREZIDANTO MAŬ, DEVIGA KURSO

En la komenco de la fondiĝo de la universitato iuj kontraŭstaris la lernadon de la verkoj de Prezidanto Maŭ, pretekstante, ke “la politika kurso necesigas sisteman instruadon pri la scio de sociaj sciencoj”. Fakte tio celis nuligi klasan edukon al la lernantoj kaj forlasi la batalon pri reformo de mondkoncepto.

En 1963, la partia komitato de la universitato kritikis tiun ĉi “pure akademian” absurdaĵon, havantan nenion komunan kun la proleta politiko, kaj decidis, ke la verkoj de Prezidanto Maŭ fariĝu deviga kurso por ĉiuj instruistoj kaj lernantoj. La instruistoj de politika kurso manĝas, loĝas, fizike laboras kaj lernas kune kun la studentoj, lernas kaj lernigas la verkojn de Prezidanto Maŭ direkte al la aktualaj pensoj de la lernantoj. De 1964 la verkoj de Prezidanto Maŭ ankaŭ estas alprenataj kiel fundamenta instrumaterialo por la kurso de patrolingvo. En la klasĉambroj, dormejoj, manĝejoj kaj sur kampoj troviĝas tabuletoj, sur kiuj estas cititaj vortoj de Prezidanto Maŭ. Kien oni venas, tie oni lernas, kaj tiel fariĝis movado, en kiu la verkoj de Prezidanto Maŭ estas legataj de ĉiuj homoj en ĉiu tempo kaj aplikataj en ĉiu afero.

En la amasa movado de kreiva lernado kaj kreiva aplikado de la verkoj de Prezidanto Maŭ,

la instruistoj kaj studentoj de la universitato resumis la spertojn de ideologia remuldo de la intelektuloj en tio ke oni devas batali kontraŭ “mi-ismo” en ideologio, kontraŭ “maldiligenteco” en laboro, kontraŭ “timo” en fizika laboro kaj kontraŭ “malfacileco” en lernado. Oni devas, en efektiveco, konduki revolucion, remuldi la ideologion kaj labori en la limregiono dum sia tuta vivo.

MATURIĜO EN KLASBATALO

Plenmano da burĝaj reprezentantoj en kaj ekster la universitato malice kalumniis la Tarim-an Agrigan kaj Agrikulturan Universitaton kiel “neregulan lernejon” kaj atakis, ke la studentoj kulturitaj de tiu ĉi universitato havas nur “tarim-an nivelon” (t. e., malaltan nivelon, ĉar Tarim estas baseno). Ili kriaĉis, ke la partoprenado de lernantoj en politikaj aktivecoj kaj produktaj laboroj estas “ekstraj impostoj” en instruado. Rilate al tiu ĉi proleta revolucia universitato ili praktikis “nerekonismon”, tiel ke dum iu periodo la universitato ne havis novajn lernantojn kaj renkontis multajn malfacilojn.

Ĉu estas “neregula” tiu ĉi agriga kaj agrikultura universitato? La revoluciaj instruistoj kaj lernantoj opiniis, ke ĉiu lernejo, kiu estas fondita laŭ la penso de Maŭ Zedong, estas regula kaj havas antaŭ si vastajn perspektivojn, kaj ili subtenas ĝin, dum ĉiu lernejo, kiun la burĝoj rigardas kiel “regulan”, certe degeneros, kaj ili devas ĝin detrui.

Per nerefuteblaj faktoj la revoluciaj instruistoj kaj studentoj frakasis la aserton pri “tarim-a



nivelo". En 1964 iu "aŭtoritatulo" de plantado de morusarboj venis al Tarim kaj senŝanĝe disvastigis en Tarim-a Agriga Regiono sian sperton pri kulturo de morusarboj sur salalkala tero, akiritan en Ĉengde, Hebej-provinco, situanta je miloj da kilometroj fore. La unuan fojon neniu ĝermo aperis, la duan fojon la morusaj arbidoj havis "kalvan kapon" kaj la provo finiĝis per malsukceso. Dum la sama tempo, la instruistoj kaj studentoj de la fakultato pri silkraŭpa bredado kaj morusarba kulturado de tiu ĉi universitato kreis altproduktan rekordon de kreskigo de pli ol 40, 000 morusarbidoj po muo sur vasta areo de salalkala tero.

Praktiko estas la plej bona atesto, kiu montras, ke la antaŭa estas "nivelo" fanfaronita de la burĝaj "aŭtoritatuloj" dum la lasta estas vera "tarim-a nivelo". La batalantoj de la Popola Liberiga Armeo sinokupanta pri agrigado kun fiero diris: "La tarim-a nivelo estas tre alta kaj tre bona!"

Prezidanto Maŭ diris: "Nia politiko de edukado devas ebligi, ke la edukatoj povu disvolviĝi samtempe morale, intelekte kaj fizike, kaj fariĝu kleraj laboruloj kun socialisma konscio." La burĝaj reprezentantoj, kiuj kalumniis la organizadon de lernantoj por partopreni politikajn aktivecojn kaj produktajn laborojn kiel ŝarĝon per "ekstraj impostoj", celis kulturaj daŭrigantojn de la burĝaro kaj reviziismo kaj pretigi kadrojn por efektivi la restarigon de kapitalismo. Tiu ĉi provoko, vane provanta ŝanĝi la direkton de la edukado, estis ĝisfunde malkaŝita kaj kritikita de

multnombraj revoluciaj instruistoj kaj lernantoj. La universitato persistas en la elstarigo de politiko, en la armado de la menso de la instruistoj kaj lernantoj per la penso de Maŭ Zedong kaj en partoprenigo de produkta laboro. La Tarim-a Agriga kaj Agrikultura Universitato akiris la laŭdon de la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Ili diras ke la studentoj estas lernantoj kun "tri kapabloj": ili kapablas fari penigan laboron, kapablas intime kunvivi kun la laboristoj kaj kamparanoj kaj kapablas solvi praktikajn problemojn en produktado. La revoluciaj instruistoj kaj lernantoj varme amas tiun ĉi universitaton kaj laŭdas ĝin kiel "reviviĝon de la Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato" kaj "revolucion fornegon".

Tiu ĉi universitato multe atentis pri klasa edukado al la instruistoj kaj lernantoj. Ĉiujare estas lanĉita politika movado. Dum la lastaj kelkaj jaroj estis disvolvigitaj tie politikaj kaj ideologiaj movadoj de "du rememorigoj kaj kvar kontroloj",² "akuzoj kontraŭ la krimoj de la usona imperiismo kaj Ĉiang Kajŝek", "rememorigo pri la pasintaj suferoj kaj penso pri la nuna feliĉo" kaj "reĝustigo de ideologio". Precipe la nun disvolviĝanta movado de granda proleta kultura revolucio multege plialtigas la klasan konscion de la vastaj amasoj de instruistoj kaj lernantoj. Ricevinte klasan edukon en diversaj formoj, multaj lernantoj diris, ke tio, kion ili plej profunde komprenas post eniro en tiu ĉi universitato, ne estas kulturaj morusarbojn kaj bredi silkraŭpojn, nek

planti maizon kaj kotonarbojn, sed neniam forgesi klasan suferon kaj klasan batalon.

KREI ĈION PER LA PROPRAJ MANOJ

En la komenco de la starigo de tiu ĉi universitato sur la pratempa dezerto, la instruistoj kaj lernantoj agrigis kaj prilaboris la teron per siaj manoj kaj tri “trezoroj” (vekto, korbo kaj kantuman³), jungis la sablon kaj alkalon, hakis arbojn kaj faris brikojn, kaj tiel ili per siaj propraj manoj konstruis unu domon post alia por sia universitato. Ili tranoktis sub la libera ĉielo. Iliaj klasĉambroj troviĝis inter la poploj. La nuntempa “Tarim-a Agriga kaj Agrikultura Universitato” estas kvazaŭ la antaŭa “Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato”.

En la unua jaro post ĝia fondiĝo la universitato jam efektivigis memprovizon rilate al grenoj, manĝebla oleo, viando kaj legomoj. Ĝis nun la instruistoj kaj studentoj jam kulturebligis pli ol 5,000 muojn da virga tero, produktis pli ol 4,000,000 ĝinojn da grenoj kaj 450,000 ĝinojn da sensemigita kotonono, konstruis mem domojn kun plankspaco de pli ol 14,000 kvadrataj metroj kaj starigis ĝardenojn de fruktoj kaj morusarboj, bredejon por bonrasaj ŝafoj, fabrikon de flankaj produktaĵoj kaj kampojn por scienca eksperimento. Ekde la pasinta jaro ili ankaŭ efektivigis memprovizon de bezonataj stipendioj pere de produktado. Kun optimismo la respondeculo de tiu ĉi universitato diris, ke ili efektivigos memprovizon rilate al ĉiuj elspezoj de la tuta universitato nelonge post kelkaj jaroj.

En la periodo kiam nia lando renkontis provizoran ekonomian malfacilon, aperis en kaj ekster la universitato fitendenco kontraŭ memprovizo per produktado. Kelkaj burĝaj intelektuloj asertis, ke la laboristoj laboras, la kamparanoj kulturas kaj la lernantoj lernas: tio estas “socia divido de laboro”, sistemo devenanta de antikveco, kaj sekve estas nature, ke la laboristoj kaj kamparanoj liveras al la lernejoj rizon, farunon, legomojn kaj viandon. Ili oponis la alvokon de Prezidanto Maŭ: **“Eklaboru mem por sufiĉigi la vestojn kaj manĝaĵojn”**. Ilia celo estis protekti siajn privilegiojn kaj oponi la redukton de la tri grandaj diferencoj — diferencoj inter laboristoj kaj kamparanoj, inter mensa kaj fizika laboro kaj inter urbo kaj kamparo. Sed la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj firme staris kontraŭ tiu fitendenco kaj defendis la grandan penson de Prezidanto Maŭ pri sinapogo sur la propraj fortoj kaj peniga batalo kontraŭ malfaciloj. La vastaj amasoj de revoluciaj instruistoj kaj studentoj diris, ke forlasi mem-provizadon per produktado signifas forĵeti la revolucionan spiriton

de la Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato kaj Nannivan⁴ kaj la gloran tradicion de la Popola Liberiga Armeo. Nia universitato estas komunisma labora universitato laŭ la modelo de la Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato, kaj ni devas nepre persisti ĉe la vojo de revolucio kaj la direkto de komunismo.

SKRIBI AŬTORITATAJN DISERTACIOJN DUM FIZIKA LABORO

La revoluciaj instruistoj kaj studentoj de tiu universitato rompis la fremdlandajn rutinojn kaj malnovajn ŝablonojn de la antaŭa instrumaterialo, faris provojn paŝon post paŝo kaj akumulis spertojn dum praktiko, kaj komencis starigi novan instruan sistemon surbaze de la politiko de kombino de eduko kun produktaj laboroj kaj konforme al la specialaj trajtoj de la Tarim-a Agriga Regiono.


La lernantoj de tiu ĉi universitato estas ne nur lernantoj sed ankaŭ kamparanoj kaj laboristoj. Ili lernas tion, kion ili faras en la produkta laboro. La instruantoj estas ne nur instruistoj sed ankaŭ kamparanoj kaj laboristoj. Ili okupiĝas pri tio, kion ili instruas. La klasoj de diversaj specialaj fakoj estas organizoj ne nur por lernado sed ankaŭ por produktado. Ĉiu klaso estas produkta grupo, kiu respondecas pri la produkta laboro de kelkcent muoj da maizo, kotonono, tritiko kaj rizo, de prilaboro de la tero ĝis rikoltado kaj draŝado. La tuton de tiuj taskoj plenumas la lernantoj kaj instruistoj.

Kiam la instruistoj sin interligis kun la produkta laboro kaj ilia scio deveninta de libroj sin submetis al la ekzameno de la praktiko, la senenhava, unuflanka, nepraktika instrumaterialo treege malmultiĝis, la lernoperiodo multege malplilongiĝis kaj la kvalito de instruado plialtiĝis. La lernantoj akiris scion plenan kaj solidan. Resuminte sian sperton en produkta praktiko, la lernantoj verkis disertaciojn servantajn por gvidi la produktadon kiaj: “50 Reguloj pri Printempa Irigacio” kaj “Resumo sur la Draŝejo”. Ili ankaŭ propramane kulturis maizon kaj kotonarbojn k. a. kaj kreis altproduktajn rekordojn. La tuto de kelkmil muoj da maizo, kotonono kaj rizo kaj ilia bredado de silk-raŭpoj kaj brutoj estas altproduktaj ekzemploj por la tarim-a regiono. Tio estas aŭtoritata disertacio de la proletaro, verkita de la tuto de la revoluciaj instruistoj kaj studentoj de tiu ĉi universitato per ŝvito kaj laboremaj manoj.

DISVOLVI LA GLORAN TRADICION DE LA KONTRAŬJAPANA MILITA KAJ POLITIKA UNIVERSITATO

Kiel granda lernejo de la penso de Maŭ Zedong, la Tarim-a Agriga kaj Agrikultura Universitato

En decembro de 1958, du monatojn post la stariĝo de la Tarim-a Agriga kaj Agrikultura Universitato, la instruistoj kaj lernantoj iris al la montaro por produkti feron kaj ŝtalon. Jen la junulara sturm-grupo dispecigas ercojn.



En la unua jaro post la stariĝo de la universitato oni rikoltis pli ol 500,000 ĝinojn da greno kaj efektivigis plenan memprovizon de greno.



kulturaj generacio da novtipaj laboruloj ĉi-flanke disvolvita. De la lastaj kelkaj jaroj la diplomitoj de tiu ĉi universitato troviĝas ĉie sur la ambaŭ bordoj de Tarim-a Rivero kaj ĉe la piedo de Kunlun-montaro. La plejmulto de ili estis asignita labori en la rotoj (en organizo responde al produkta grupo): Iuj laboras kiel politikaj instruantoj aŭ direktantoj, rot-estroj aŭ ploton-estroj, dum aliaj kiel teknikistoj, kontistoj aŭ agrikulturaj laboristoj. Ili ĉiuj estas ordinara laborantoj partoprenantaj en fizika laboro. Tiu generacio de novuloj kapablas fari teknikan laboron kaj sin okupi pri administrado kaj fari politikan kaj ideologian laboron. Antaŭnelonge la lernantoj de klaso 65 (1) de agronomia fakofakultato iris al la Venka Agrikulturejo n-ro 14 por starigi tie modelon. Kiam ili venis al la roto, ili unue starigis modelon pri la reliefigo de politiko. Kune kun la laboristoj de la agrikulturejo, ili studis la verkojn de Prezidanto Maŭ, kritikis la burĝaron kaj starigis la stilon de tri punktoj kaj ok vortoj⁵. La laboristoj de la agrikulturejo laŭdis la labor-grupon de la universitato kiel grupon de propagando pri la penso de Maŭ Zedong, grupon de disvastigo de la stilo de tri punktoj kaj ok vortoj kaj grupon de disvastigo de progresinta tekniko.

Tiu generacio de novuloj posedas kaj teorion kaj praktikon. La batalantoj de la agriga armeo diris: “La studentoj de tiu ĉi universitato havas neelĉerpeblan energion, ili vektoportas same pezan ŝarĝon, marŝas same rapide kaj manipulas *kantuman* same lerte kiel ni, kaj cetere ili ne havas la intelektulan arogantecon”.

Tiu generacio de novuloj estas lerta ne nur en kulturaj sed ankaŭ en militaj aferoj. Kiam ili manipulas la plumon, ili kapablas kritiki la burĝaron, kaj kiam ili ekprenas la pafilon, ili kapablas batali por defendi la limregionon de sia patrio. La instruistoj kaj lernantoj de tiu ĉi universitato ĉiuj partoprenas milican trejnadon, kaj la tuto de sportaj lecionoj estas anstataŭita per militsportaj lecionoj. La lernantoj kaj lernantinoj ĉiuj kapablas ĵeti grenadojn kaj pafi.

Nun la granda proleta kultura revolucio estas vigle leviĝanta en tiu ĉi revolucia universitato. Plenmano da reprezentantoj de la burĝaro jam estis malkovritaj de la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj. Multaj klasoj kaj multaj lernantoj kun batalpasio skribis al la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ kaj amase postulis, ke ĉio neracia en la malnova edukistemo estu komplete reformita ne nur en

formo sed ankaŭ en enhavo. Kiam la granda instrukcio antaŭnelonge donita de Prezidanto Maŭ, ke la Popola Liberiga Armeo devas esti granda lernejo, atingis la Tarim-an Agrigan kaj Agrikulturan Universitaton, la tuto de instruistoj, lernantoj, laboristoj kaj oficistoj diris kun grandega emocio: “Ni decideme heredos kaj disvolvigos la tradicion de la Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato, firme plenumos la grandan instrukcion de Prezidanto Maŭ, komplete enterigos la edukistemon de la burĝaro kaj transformos nian universitaton en grandan lernejon de la penso de Maŭ Zedong, por ke ni estu harditaj en fidindajn daŭrigantojn de la proleta revolucia afero.”

1. Ĝi estis la plej revolucia kaj plej progresema universitato de plej nova tipo, starigita sub la rekta gvido de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito. Prezidanto Maŭ estis, samtempe, la prezidanto de la Eduka Komitato de tiu ĉi universitato. K-do Lin Biaŭ estis rektoro kaj politika komisaro de tiu ĉi universitato.

2. Du rememoroj signifas rememoron pri klasa suferego kaj rememoron pri nacia suferego. Kvar kontroloj estas kontrolo pri starpunkto, kontrolo pri batalvolo, kontrolo pri laboro kaj kontrolo pri klasa deveno.

3. Terkultura instrumento uzata en Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, Ĉinio, por plugi aŭ fosi teron.


4. Dum la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito la japanaj agresantoj kaj la kuomintanga reakciularo efektiviĝis militan kaj ekonomian blokadon ĉirkaŭ la Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a Limregiono. En tiu malfacila momento Prezidanto Maŭ faris la grandan alvokon: “**Eklaboru mem por sufiĉigi la vestojn kaj manĝaĵojn**”. Sekve disvolviĝis grandioza movado de memprovizo per produktado en la kontraŭjapanaj bazlokoj kaj gerilaj regionoj, kie oni militis kaj samtempe sin okupis pri produktado, tiamaniere venkis la ekonomiajn malfacilojn. La 359-a Brigado de la Okavoja Armeo, kiu tiam estis en tiu regiono, firme plenumis la instrukcion de Prezidanto Maŭ, klopodis pri terkulturado kaj produktado en Nannivan kaj fariĝis modelo en la grandprodukta movado de la dirita limregiono. Tiu spirito de kuraĝa lukto kontraŭ malfaciloj kaj sinapogo sur la propraj fortoj estas nomata revolucia spirito de Nannivan.

5. La bona laborstilo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Prezidanto Maŭ resumis ĝin per tri punktoj kaj ok vortoj. La tri punktoj estas: firma kaj korekta politika direkto, penema kaj modesta laborstilo kaj elaste fleksebla strategio kaj taktiko. La ok vortoj signifas: unuiĝon, streĉitecon, seriozecon kaj viglecon.

Neelĉerpebla Potenco de la Penso de Maŭ Zedong

Popolanoj de la plagita areo kunportas tabulojn kun vortoj el verkoj de Prezidanto Maŭ kaj antaŭenmarŝas sur la vojo de socialismo kun vigla spirito kaj ekzaltita batalvolo.






La armeo kaj la popolo kune studas verkon de Prezidanto Maŭ.

En marto, 1966 okazis fortega tertremo en Hingtaj-regiono, Hebej-provinco, Ĉinio. La Ĉina Popola liberiga Armeo, kiu formiĝis el gefiloj de la popolo, tutkore servis al la popolo de la plagita areo ĝin helpante en sin-savado el la katastrofo, rekonstruado de la hejmloko kaj restarigo de produktado. Ili aktive propagandis la penson de Maŭ Zedong, organizis la popolon de la plagita areo por kreive studi kaj apliki la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj alportis plej grandan forton al ĝi por venki la katastrofon.

“La vortojn de Prezidanto Maŭ ni obeas, kaj ni kuraĝas grimpi monton de glavo kaj trairi maron de fajro kaj ni ne timas eĉ se la ĉielo falus kaj la tero enkaviĝus.” La popolo de la plagita areo armita de la penso de Maŭ Zedong strebis al prospero sin apogante sur la propra forto, rekonstruis sian hejmlokon kaj disvolvis produktadon. En tre mallonga tempo jam aperis en la vilaĝoj aro kaj aro da novaj domoj, kaj en la kamparo ruliĝis ondoj de tritiko. La vastaj amasoj de malriĉ-kampanoj kaj malsuperaj mez-kampanoj senlime amas Prezidanton Maŭ, senlime fidas al la penso de Maŭ Zedong kaj persiste agas laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ, kaj ili kreis, sur tiu ĉi peco de tero, bildon pli novan kaj pli belan.

La armeo kaj la popolo kune studas verkojn de Prezidanto Maŭ, kune batalas kontraŭ la natura katastrofo kaj kune okupas sin pri produkta laboro. La komunumanoj diris: “La Liberiga Armeo, alsendita de Prezidanto Maŭ, donis sian tutan koron al ni malriĉ-kampanoj kaj malsuperaj mez-kampanoj.”





La domoj falis, sed ne la volo. La tero ŝanceliĝis, sed ne la homo. La popolo de la plagita areo armita de la penso de Maŭ Zedong venkis la malfacilojn unu post alia kaj akiris riĉan rikolton de tritiko.

Kondamno kontraŭ la Bombado al Hanojo Fare de la Usona Imperiismo kaj Celebro pri la 6-a Datreveno de la Fondiĝo de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio

LA nova milita “eskalado” de la usona imperiismo per sinsekva, freneza bombado al Hanojo kaŭzis senkomparan indignon ĉe la vastaj laboristaj, kamparanaj, soldataj kaj revoluciaj amasoj de nia lando. En la 15-a de decembro, 1966, la Ĉina Registaro publikigis deklaron por forte kondamni la usonan imperiismon pro ĝia bombado al Hanojo. Poste, en la 18-a de decembro, okazis granda kunveno, kiun partoprenis pli ol 100,000 junaj ruĝaj gvardianoj, komandantoj kaj batalantoj de PLA, laboristoj, popolkomunumanoj, kadroj de diversaj institucioj en Pekino kaj alilandaj amikoj el dekoj da landoj, troviĝantaj en la ĉefurbo. La kunveno indigne faris kondamnon kontraŭ la krimego de la usonaj rabistoj, kiuj bombadis Hanojon, la ĉefurbon de Vjetnamio, kaj varme celebris la grandan venkon akiritan de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio dum ĝia 6-jara ekzistado.

Antaŭ la malfermo de la kunveno sennombraj homoj alte tenis portretojn de Prezidanto Maŭ kaj tiujn de Prezidanto Ho Chi Minh kaj venis al la kunvenejo el diversaj direktoj kun nekalkuleblaj slogan-tabuloj kaj ruĝaj flagoj. Fojon post fojo ili ĥore deklamis la

eldirojn de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ pri la revolucia vero:

“La subpremataj popoloj kaj nacioj absolute ne devas dependigi sian liberiĝon de la ‘prudento’ de imperiismo kaj ĝiaj lakeoj; ili povas akiri venkon nur pere de plifortigo de sia unuiĝo kaj persistado en batalo.”
“Unuiĝu la popoloj de la tuta mondo kaj venku la usonajn agresantojn kaj ĉiujn ĝiajn lakeojn! La tutmondaj popoloj devas havi kuraĝon, kuraĝi batali, ne timi malfacilojn kaj sturmi antaŭen unuj tuj post aliaj. Tiamaniere, la tuta mondo certe apartenos al la popoloj kaj ĉiuj diabloj estos ekstermitaj.”

La kunvenantoj senĉese kriis laŭte batal-sloganojn pri helpo al Vjetnamio kontraŭ la usona imperiismo, kun levitaj brakoj, plene elmontrante la proletan internaciisman batalamikecon inter la ĉina kaj vjetnama popoloj.

Kiam la partiaj kaj ŝtataj gvidantoj Ĝoŭ Enlaj kaj aliaj, reprezentantoj de ruĝaj gvardianoj kaj diversaj rondoj, Tran Tu Bing, ambasadoro de la Vjetnama Demokratia Respubliko al Ĉinio kaj Nguyen Minh Phuong, aganta estro de la konstanta delegacio de la



La kunvenejo

Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio al Ĉinio, suriris la podion, leviĝis sinsekve kaj la firmamenton vibrigante la krioj de sloganoj, kiaj: “Vivu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!” “Vivu Prezidanto Ho Chi Minh!” “Saluton al la herooa vjetnama popolo!” “Saluton al la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio!” “La 700-miliona ĉina popolo ĵuras esti forta apoganto de la vjetnama popolo!” “Unuiĝu la tutmondaj popoloj por faligi la usonan imperiismon!”

Kiam la prezidanto de la kunveno Guo Moĵuo, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Rerezentantoj kaj prezidanto de la Ĉina Pac-Komitato finis sian inaŭguran paroladon, Ĉen Ji, membro de la Politika Buroo de CK de KPCĈ kaj vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, en la nomo de la Komunista Partio de Ĉinio, Ĉina Registaro kaj ĉina popolo,

esprimis plej altan estimon al la 31 milionoj da vjetnamaj fratoj, kiuj batalas sur la fronto kontraŭ la usona imperiismo, kaj esprimis plej varman gratulon al la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio. Li diris: “En nia lando nun progresas en plena ardo la granda proleta kultura revolucio. Tio estas la plej fundamenta sinpretigo al la batalo de la ĉina popolo por subteni la vjetnaman popolon kaj oponi la disvastigon de la agresa milito fare de la usona imperiismo.” Li refoje esprimis la firman decidemon de la ĉina popolo, kiu alte tenas la grandan ruĝan standardon de marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong, en la subtenado al la vjetnama popolo en ĝia nancisava batalo kontraŭ la usona imperiismo. Li diris: “La 700-miliona ĉina popolo estas fortega apoganto al la vjetnama popolo, kaj la vastega teritorio de Ĉinio estas fidinda postfronto por la vjetnama popolo. Meze de ĉiaj ajn furiozaj

En Konstruado**DENSE VICIĜAS ELEKTRAJ PUMP-STACIOJ ĈE DONGTING-LAGO**

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj kreive studante kaj aplikante la verkojn de Prezidanto Maŭ, milionoj da komunumanoj ĉe Dongting-lago en Hunan-provinco plene disvolvis sian aktivecon en la socialisma konstruado. En la daŭro de iom pli ol du jaroj (de 1964 ĝis junio 1966) ili sukcesis konstrui grandskale elektre irigaciajn konstruaĵojn.

Nun sur la vasta fekunda ebena ĉe Dongting-lago interplektiĝas elektraj retoj, ĉie kruciĝas kanaloj, dense staras la fostoj de elektrokondukiloj kaj ĉie dissemiĝas pumpstacioj. En la fama grenejo, t. e., la vasta ebena de Dongting-lago kun 466,000 hektaroj da kampoj, riĉrikolto estas jam garantiata eĉ en malfavoraj kondiĉoj de trosekeco kaj troa pluvado.

MODERNA TUNELBAKEJO POR PORCELANAĴOJ DE GINGDEĜEN

La laboristoj kaj funkciuloj en la Porcelana Fabriko de Gingdeĝen, kreive studante kaj aplikante la verkojn de Prezidanto Maŭ, lasttempe konstruis, laŭ la principo fari multe, rapide, bone kaj ekonomie, tri 97-metrajn modernajn tunel-bakejojn por ĉiutagaj porcelanaĵoj kaj sukcese efektivigis provan produktadon.

Tia tunelbakejo havas la superecon de grandkvanta produktado, konsumo de kompare malmulta varmo, altkvalito de produktaĵoj, bona laborkondiĉo por laboristoj kaj konveneco por mekanikigi la produkton. La jara produktokvanto de tiaj bakejoj estas tri-ĝis kvar-oble pli granda kompare kun tiu de la malnovtipaj bakejoj.

PLIPRODUKTO DE BREDEJO DE GENERAJ ŜAFOJ DE GONNAJS EN HINGIANG

Refojan pliprodukton de ŝafoj gajnis pasintajare la Bredejo de Generaj Ŝafoj de Gonnajs, la bazo de produkto de la fajnlanaĵaj ŝafoj de Hingiang. La pliprodukta proporcio de tiu specio de ŝafoj atingis 43%, kaj meznombra procento de postvivaj naskitaj ŝafoj multe kreskis, ekzemple tiu de la virŝafoj de la klaso speciala unua kreskis je 15% kompare kun tiu de la pasinta jaro.

La bonspaciajn fajnlanaĵajn ŝafojn de Hingiang, kiujn ĉi tiu ŝafobredejo sukcesis elkulturi, oni disvastigis jam nun tra la tuta lando.

kaj timigaj ondegaj, la ĉina popolo armita per la penso de Maŭ Zedong nepre restos en unuigo kun la vjetnama popolo kaj batalos kune kun ĝi ĝis ĉiuj usonaj agresantoj estos komplete forpelitaj el la teritorio de Vjetnamio.” Lia parolado estis fojon post fojo interrompita de ardaĵ slogankrioj tra la kunvenejo. Oni laŭte kriis: “Ĝisfunde frakasu la konspiron de ‘eldevigo de paco per bombado’ fare de la usona imperiismo kaj ĝiaj komplikoj!” “Firme oponu la falsan subtenon kaj veran perfidon fare de la sovetia reviziisma gvidanta klico!”

Ambasadoro Tran Tu Binh kaj Nguyen Minh Phuong ankaŭ parolis en la kunveno. Ili esprimis dankon pro la senegoisma kaj efika subteno, donita de la ĉina popolo, kaj la kredon ke la vjetnama popolo, kiu iras de venko al venko, certe venkos fine la usonajn agresantojn.

La reprezentantoj de la ruĝaj gvardianoj, la Ĉina Popola Liberiga Armeo, la laboristoj kaj kamparanoj ankaŭ forte kondamnis en siaj paroladoj la krimregon de la usona imperiismo, kiu freneze bombadis Hanojon kaj la Ĉinan Ambasadorejon en Vjetnamio. Ili diris: “La ĉina popolo estas jam preta en ĉio. Se la vjetnama popolo nur tion bezonos, kaj la granda gvidanto Prezidanto Maŭ donos la ordonon, ni tuj kuros al la fronto por ekstermi la usonajn agresantojn. Ni batalos ŝultro ĉe ŝultro kun la vjetnama popolo kaj entombigos la komunan malamikon de la tutmondaj popoloj en la maron de popola milito.”

La kunveno pasigis cirkuleran telegramon por kondamni la bombadojn faritajn de la usona imperiismo kontraŭ Hanojo, gratulan telegramon pri la 6-a datreveno de la fondiĝo de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio kaj konsolan telegramon al la personaro de la Ĉina Ambasadorejo en Vjetnamio. 43 latin-amerikanoj kaj hispanoj laborantaj en Pekino ankaŭ publikigis en la kunveno deklaron subtenantan la batalon de la vjetnama popolo.

La kunveno fermiĝis meze de la slogankrioj: “Ĉerte triumfos Vjetnamio kaj certe malvenkos la usona imperiismo!” “Vivu la granda unuigo de la tutmondaj popoloj!” “Vivu la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong!”

La Sudvjetnamaj Armeo kaj Popolo Kreis Bonegan Situacion per Sia Luktado

— En la unuaj 11 monatoj de 1966, ili ekstermis pli ol centmil usonajn armeanojn kaj pli ol centmil puparmeanojn kaj detruis ĉ. dumil malamikajn aviadilojn —

En la jaro 1966, la armeo kaj popolo de la suda parto de Vjetnamio kreis, per heroa kaj malceda batalado, bonegan situacion senprecedencan. La usona imperiismo ĵetis pli ol kvaronon de sia ter-armeo kaj grandkvantan mar- kaj aer-armeon en la batakampon de Sudvjetnamio, sed turni la situa-

La vasta aero en la nordo de Vjetnamio fariĝis kremaciejo por la usonaj aeraj rabistoj. Jen, alia usona aeroplano estas faligita, kaj la heroaj batalantoj huras levante siajn pafilojn.



cion de malvenko ĝi ne povis. Disvolvante la potencon de popola milito, la heroaj armeo kaj popolo de la suda parto de Vjetnamio grave vundis la usonan imperiismon kaj metis ĝin en elĉerpiĝon de ĝiaj fortoj kaj konfuzan senelirecon, kaj ili metis firman bazon por gajni pli grandan venkon en la estonteco.

LA MAŜO ĈIRKAŬ LA KOLO DE LA USONA IMPERIISMO PLI KAJ PLI STREĈIĜIS

Prezidanto Maŭ diris: “La usona imperiismo tro longe etendis siajn brakojn. Agresante ĉiun lokon, ĝi metas novan maŝon ĉirkaŭ sian kolon.” Ĝuste per sia agreso al Vjetnamio la usona imperiismo mem metis grandan maŝon ĉirkaŭ sian kolon, kaj donis la alian ŝnurfinon de la maŝo al la popoloj de Vjetnamio kaj la tuta mondo. Ju pli ĝi baraktas per pligrandigo de la agresiva milito, des pli streĉiĝas la maŝo.

1966 estis la jaro, en kiu la usona imperiismo faris frenezan reatakon kontraŭ la vjetnama popolo, ankaŭ jaro, en kiu ĝi trafis amaran malvenkon en la agresiva milito kontraŭ Vjetnamio. En tiu jaro, ĝi uzis alterne la du kontraŭ-revoluciajn taktikajn manierojn: unuflanke, ĝi sendis pli multe da trupoj al Sudvjetnamio kaj pli-ol-duobligis la forton de siaj agresivaj trupoj, frontigis sin mem en sanga batalo de granda “forbalao”; pli barbare bombis la nordan parton de Vjetnamio, kontinue eskaladis en sia milito de agreso kaj aliflanke, en koluzio kun la reviziisma kliko de Sovetunio, ĝi ludis foje kaj refoje la trompajon de “paca intertraktado”, vane klopodis kaŝi sian krimon pligrandigi la militon per la fumekrano de “paca intertraktado” kaj vane klopodis

elpremi situacion de “paca intertraktado” per ĉantaĝo pligrandigi la militon por akiri ĉe la tablo de intertraktado tion, kion ĝi ne povis akiri sur la batalkampoj.

La heroa vjetnama popolo tamen ne estas timigebla, nek trompebla. Nenian fantazion pri la “prudento” de la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj ili havas, la “belajn parolojn” de la usona imperiismo ili ne kredas, kaj ĝian minacon ili ne timas, sed per decidema batalado ili frakasis la militan ĉantaĝon de la usona imperiismo

kaj la intrigon de “pacigo per milito”, “pacigo per bombado” kaj “pac-logo per bomb-ĉesigo” de Usono kaj Sovetunio en komploto.

Dum grandnombra plimultigo de la agresaj trupoj fare de Usono, ili plue disvolvis la popolan gerilon, kaj ŝanĝis sian landon en neeskepeblan kaptilon por la usonaj rabistoj. La ĉeffortaj trupoj de la liberigaj armitaj fortoj, la lokaj trupoj kaj la milicaj gerilaj taĉmentoj strikte kunagis, aktive atakis la malamikon sur la vasta batalkampoj per sia ege fleksebla taktiko kaj ekstermis multege da efektivaj fortoj de la malamika armeo. Ekde januaro ĝis la fino de novembro, 1966, la armeo kaj popolo de Sudvjetnamio mortigis, vundis kaj kaptis sume pli ol 233,000 personojn de la malamika armeo, inkluzive de pli ol 100,700 usonaj agresantoj, kaj faligis aŭ detruis pli ol 1900 malamikajn aviadilojn. Tio montris, ke la nombro de la ekstermitaj usonaj armeanoj en 11 monatoj de 1966 egalas proksimume al pli ol duono de la pliigita usona armeo en la sama periodo de 1966 (181,000 personoj), kaj egalas al pli ol kvinoblo de la suma nombro (19,200 personoj) de la usonaj armeanoj ekstermitaj en la tuta jaro de 1965.

BANKROTIS LA STRATEGIA PLANO DE LA BLANKA DOMO KAJ LA PENTAGONO

Antaŭ dudek jaroj, kiam la usona imperiismo instigis sian lakean grupon de Ĉiang Kajŝek lanĉi grandan ofensivon kontraŭ la liberigitaj regionoj de Ĉinio, Prezidanto Maŭ montris, ke “ili tro



La vjetnamaj armeo kaj popolo kaptis viva, en la nordo de Hanojo, unu usonan aeron rabiston leŭtenanton.

alte taksis sian forton kaj tro malalte taksis tiun de la revolucio, aventurisme eksplodigis la militon kaj tial falis en la kaptfoson, kiun ili mem aranĝis. La strategia intenco de nia malamiko komplete malsukcesis.” Hodiaŭ, ĝuste tia estas la situacio, en kiu sidas la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj en Sudvjetnamio.

Kun nuklea armilo en la mano, la usona imperiismo stulte konsideris sin “eksterordinare potenca”, “nevenkebla en la mondo”, mem opiniis ke kiam ĝia “atuta trupo” suriras la batalkampojn en Sudvjetnamio, ĝi jam povos “repreni la iniciaton”, “rapide konkeri Sudvjetnamion” kaj realigi sian belan sonĝon pri porĉiama okupado de Sudvjetnamio. Sed, la milita situacio de 1966 montris, ke ĝi jam falis en la kaptilon, kiun ĝi mem faris, kaj ĝia strategia intenco komplete vaniĝis.

La usona imperiismo anticipis pri rapida batalo kaj rapida solvo per alpremo de la grandnombra armeo. Sed la rezulto estis ĝuste mala, ju pli forte ĝi baraktas, des pli profunden ĝi falas en la marĉon de Sudvjetnamio. Ekbatalante ĝi faris sian geston por devigi la armeon kaj popolon de Sudvjetnamio batali laŭ ĝia taktiko, sed la rezulto estis ĝuste mala, la sudvjetnamaj armeo kaj popolo devigis ĝin turniĝi sekvante la flekseblan taktikon, kiun ili uzis kaj ĉie agi en pasivo kaj esti batata. La usona imperiismo intencis utiligi la “altan flekseblecon” de sia armeo, centriĝi fortojn por fari grandan “forbalaon”, “ĉirkaŭekstermi” la ĉefan forton de la liberigaj armitaj



Heroa artilerio de la Sudvjjetnama Liberiga Armeo, kiu faris meritplenan atakon kontraŭ iu usona aerodromo.

fortoj, kaj detrui la liberigitan regionon. Sed enirinte Sudvjjetnamion, ĝia trupo jam dronis en maro de la popola milito kaj ne sciis kion fari. Ĝi ne povis ne dismeti siajn trupojn por gardi la strategiajn bazlokojn, gravajn punktojn, kaj la trafikajn liniojn, kio reduktis multe ĝian moveblan forton por batalo, kaj malgraŭ foj-refoja pliigo de ĝiaj trupoj, ĝi ankoraŭ sentas akran nesufiĉon de la fortoj por la agresa milito. Malgraŭ ke ĝiaj trupoj estis moderne ekipitaj por forbalaado eksteren, sed ili fariĝis blindaj kaj surdaj sur la batalkampo, ĉie ili estis batataj kaj falis en situacion de pasiveco. La usona imperiismo volis fondi stabilan postfronton en Sudvjjetnamio, sed pli kaj pli arde flamis la indignego de la popolo kontraŭ Usono en la regiono regata de la usonaj agresantoj kaj ĝiaj pupoj, en la urboj okupataj de la malamiko armita batalo ĉiam pli grandigita kaŭzis, ke la malamiko ne povas trovi lokon sekuran por ĝi. La usona imperiismo fuŝe kunmetis sian tiel nomatan planon de "pacigo en vilaĝoj", ĝi tamen ne povis esti efektivigata pro forta kontraŭstaro de la sudvjjetnama popolo. Ĉiufoje kiam la usona trupo iris al batalo, ĝin trafis malvenko senescepte, kio ŝancelis ankaŭ la reĝimon de la pupo-kliko kaj rapidigis ruiniĝon de la puparmeo. En 1966, la nombro de dizertintoj de la puparmeo estis multe pli granda ol tiu en 1965. Laŭ la statistiko, ekde la jarkomenco de 1966, la dizertintoj el la

puparmeo meznombriĝis ĉiumonate 15,000 personojn, t. e., en unu jaro, la nombro de forkurintoj egalas preskaŭ al kvarono de la tuta forto de la pupa armeo.

LA PAPERTIGRO USONO PLENE MONTRIS SIAN VERAN ASPEKTON SUR LA BATALKAMPO EN SUDVJETNAMIO

Prezidanto Maŭ diris: "La imperiismo estas forta ekstere sed malforta interne." "La usona imperiismo kaj la diverslandaj reakciuloj ĉiuj estas paperaj tigroj. Tion pruvis la batalo de la ĉina popolo, kaj pruvas nun la batalo de la popolo de Vjetnamio." En 1966, la plurfojaj bataloj inter la usona imperiismo kaj la heroaj armeo kaj popolo de la suda parto de Vjetnamio ripete pruvis, ke tiu estas vere papera tigo forta nur ekstere sed malforta interne.

Vintre de 1965 kaj printempe de 1966, dum la seka sezono, la usonaj agresantoj furioze lanĉis sian atakon de tiel nomata "seksezona ofensivo", pelis sur la batalkampon ĉiujn moveblajn fortojn de sia "elita" trupo en Sudvjjetnamio kaj uzis ĉiajn modernajn ekipaĵojn kaj mortigilojn krom atomarmilo, vane intencante "neniigi" ĉefajn trupojn de la liberigaj armitaj fortoj. Sed, rezulte, ili suferis ankoraŭ pli pezan malvenkon. En la seka sezono de kvin monatoj (de novembro,

1965 ĝis marto, 1966), la armeo kaj popolo de la suda parto de Vjetnamio ekstermis sume 114,000 personojn de la malamika armeo, el kiuj troviĝis 43,000 de la usona agresarmeo kaj alilandaj komplikaj trupoj.

Post la mizera fiasko en seka sezono, la usona armeo, tuj sekve, malvenkegis ankaŭ en la sezono de pluvoj. Tiam la liberiga armeo, en strikta ligo kun la lokaj trupoj kaj gerilaj taĉmentoj, malgrandigis la ringon de sieĝo por ekstermi la usonajn agresantojn, donis neniun paŭzon al la malamiko, sed kontinue atakis ĝin, kaj faris serion da belaj operacioj de ekstermado. Samtempe, la armeo kaj popolo de la suda parto de Vjetnamio vaste faris geriladon, kio devigis la malamikon disloki siajn trupojn kaj agi en pasivo. Kaj per malgrandaj operacioj kaj senĉesaj atakoj kiel siaj ĉefaj rimedoj, ili konsumadis gluton post gluto la efektivajn fortojn de la malamiko. Laŭ unuapaŝa statistiko, en la pluva sezono ekde la fino de aprilo ĝis oktobro 1966, la armeo kaj popolo de la sudo de Vjetnamio ekstermis sume 21 batalionojn kaj batalgrupojn de la uson-pupa kaj komplika armeoj, inter kiuj estis 7 infanteriaj batalionoj kaj 3 tanko-kirasaŭtaj batalgrupoj de la usona agresarmeo. En la tria sezono sola, 21,000 personoj de la usona agresarmeo estis ekstermitaj, kiuj egalas al du kvinonoj de la usona armeo ekspedita al Sudvjetnamio en la tria sezono.

Post la alveno de la nova seka sezono en la vintro de 1966 kaj printempo de 1967, malgraŭ la usonaj agresaj trupoj en Vjetnamio pliiĝis ĝis 380,000 personoj kaj la pliiĝo ankoraŭ daŭras poste (komence de la seksezono en 1965, la usona armeo nombris nur iom pli ol 160,000 personojn), ĝia nova "seksezona reatako" renkontis fortan kontraŭbaton jam ĉe komenco. La armeo kaj popolo de Sudvjetnamio forte rebatis la malamikon sur ĉiu kampo de batalo kaj ruinigis ĝiajn plurfojajn "forbalaojn". En la sola periodo de la 27-a de oktobro ĝis la 26-a de novembro, 1966, la armeo kaj popolo de Sudvjetnamio jam sume ekstermis 11,400 malamikojn, inter kiuj troviĝis 5700 usonaj agresantoj.

En la pasinta jaro, la usona imperiismo vete sendis multon sur la batalkampon en Sudvjetnamio, sed ĝi malvenkis pli terure ol en iu ajn alia jaro en la pasinteco. La fanfarone nomitaj de ĝi "plej elitaj" "atutaj trupoj", ekzemple, ĝia unua kavaleria divizio, unua infanteria divizio k. a. ĉiuj estis forte batitaj, kaj iuj armeopartoj pli-ol-duone pereigitaj.

LA USONA IMPERIISMO RAPIDAS AL PLENA MALVENKO

Prezidanto Maŭ diris: "Subfosado, malsukceso, denove subfosado, denove malsukceso, kaj tiel ĝis pereco — jen estas logiko de imperiismo kaj ĉiuj reakciuloj en rilato al la afero de popolo, kaj ili neniam iros kontraŭ tiu ĉi logiko."

La usona imperiismo jam suferis pezan kaj mizeran malsukceson, kaj rapidas al plena malvenko. Sed, ĝi ne volas ĉesi post sia malvenko kaj baraktas freneze en agonio. Post la Manila Kunveno de si kunvokita en oktobro, 1966, por kovi plivastigon de la agresita milito, la usona imperiismo pliekspedis al Sudvjetnamio pli ol 30,000 agresarmeojn, por fari novan militan aventuron. La usona imperiismo ankaŭ fabrikis publikan opinion per senĉesa klaĉado por surtera atako kontraŭ la nordo de Vjetnamio. Krome, en pli intensa koluzio kun la reviziisma gvidanta grupo de Sovetunio, senskrupule ĝi klopodas efektiviĝi la intrigon de "pacigo per bombado". Ekde la unuaj tagoj de decembro, usonaj rabistaj aviadiloj kvarfoje bombadis Hanojon, la ĉefurbon de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio, alprenis ege seriozan agadon de "eskalado" kontraŭ la vjetnama popolo, kaj vane intencis krei per bomboj situacion de "paca intertraktado".

Sed, nefaligeblaj de timo estas la 31,000,000 herooj popolanoj de Vjetnamio. Aktive respondante al la batalalvoko de Prezidanto Ho Chi Minh kaj la Naciliberiga Fronto de l' Sudo de Vjetnamio, ili puŝas nasisavan batalon kontraŭ la usona imperiismo al nova alta tajdo, kaj firme decidis venki la usonajn agresajn rabistojn. La vjetnama popolo estas vera muro el fero, kontraŭ kiu la usona imperiismo povos nur rompi la kapon kaj verŝi sangon per sia frapado, kaj fine ĝi trafos kompletan malsukceson.

Trupo de la Usona Aera Kavaleria Divizio de Usono ricevis de la sudvjetnama popolo fortegan baton kaj disfalis.



Sinsekvaj Venkoj de Ĉinio

sur Industria Fronto

ALTE tenante la grandan ruĝan standardon de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de nia lando elmontris eksterordinaran entuziasmon dum la movado de la senprecedenca, granda proleta kultura revolucio. Ili firme tenis la revolucion kaj stimulis la produkton, tiel ke kreiĝis nova situacio de plenampleksa antaŭensalto en industria produktado. La novaj atingoj sur la industria fronto tre vive kaj elokvente pruvas, ke homoj, kiuj armis sin per la penso de Maŭ Zedong, estas ne nur la plej granda batalforto, sed ankaŭ la plej granda produktforto.

ANTAŬTEMPA SUPERPLENUMO DE JARPLANO FARE DE ANŜAN-A ŜTALA KAJ FERA KOMPANIO

Ĝis la 3-a de decembro 1966, la Anŝan-a Ŝtala kaj Fera Kompanio, kiu estas unu el la plej grandaj ŝtalaj kaj feraj entreprenoj, antaŭtempe superplenumis la unuajaran ŝtatan planon de ŝtalmaterialo, ŝtalingoto kaj gisaĵo de la Tria Kvinjara Plano. Ĝi akiris elstarajn sukcesojn en la plialtigo de la kvalito de ŝtalmaterialo, en la disvolvo de ĝiaj specoj kaj en la redukto de ĝia produktkosto. La kvanto de novaj produktoj sukcese provfaritaj preskaŭ duobliĝis. La produktkvanto de ordinara malalta aloja ŝtalo pliiĝis kvinoble, kaj tiel efektiviĝis plenampleksa antaŭensalto en produktado. Krome, la instalaĵoj troviĝis en senprecedence bona stato. En tiu jaro estis ankaŭ grandkvante kreitaj novaj teknikoj, novaj teknologioj, novaj instalaĵoj kaj novaj materialoj. La plejparto de la teknikaj kaj ekonomiaj normoj por fer- kaj ŝtal-produktado atingis la progresintan nivelon de la mondo.

La kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ estas la baza kaŭzo, kial la Anŝan-a Ŝtala kaj Fera Kompanio antaŭtempe plenumis kaj superplenumis la jaran produktplanon. La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj opinias, ke la

penso de Maŭ Zedong estas la sola korekta gvid-principo por la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando, kaj estas fonto de la sukcesoj de ĉiuj niaj entreprenoj. Se la homoj aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ, la maŝinoj aŭskultas la vortojn de la homoj. Se ni nur vere studas kaj aplikas bone la penson de Maŭ Zedong kaj agas laŭ la penso de Maŭ Zedong, ni ĉiam kaj ĉie venkos.

MULTAJ NOVAJ PRODUKTOJ DE AŬTOMO- BILAJ FABRIKOJ EN ĈANGĈUN KAJ ALILOKE

En la 25-a de novembro 1966, la Unua Aŭtomobila Fabriko en Ĉangĉun antaŭplenumis je 36 tagoj kaj superplenumis la unuajaran ŝtatan planon de aŭtomobila produkto de la Tria Kvinjara Plano. La produktkvanto de aŭtomobiloj pliiĝis je 36.3% kompare kun tiu de 1965. La kvalito de la aŭtomobiloj stabile plialtiĝis, kaj la produktkosto kaj la konsumo de kruda materialo rimarkinde malplialtiĝis ol en la jaro 1965. Krome estis sukcese provfabrikitaj novaj produktoj kia la novtipa, altklasa aŭtomobilo "Ruĝa Flago" kun progresinta internacia nivelo, tri specoj de ŝarĝaŭtoj, du specoj de kampaj aŭtoj, du specoj de grandaj aŭtobusoj kaj ses specoj de motoroj por novtipaj ŝarĝaŭtoj.

La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Unua Aŭtomobila Fabriko en Ĉangĉun persistis pri elstarigo de proletara politiko kaj senĉese disvolvis la batalon inter la du ideologioj kaj du vojoj en 1966. Tio estis la baza garantio por ĉiuj iliaj sukcesoj. En 1966, sub la puŝado de la granda proleta kultura revolucio, ili plue levis altan tajdon en la kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ, kritikis la erarajn teoriojn pri "partikulareco de entreprenoj", "produktado kiel la centro" kaj "materio en komando", kaj unuecigis per la penso de Maŭ Zedong la pensojn kaj agadojn de la laboristoj kaj oficistoj de la tuta fabriko, ri-



8-tunaj ŝarĝaŭtoj produktitaj de Ĝinan-a Aŭtomobila Fabriko estas pretaj por livero.

gardante ĉiun el siaj konkretaj laboroj kiel servon al la ĉina revolucio kaj la monda revolucio. En la pasinta jaro la laboristoj kaj oficistoj de la tuta fabriko mem fabrikis pli ol 400 specialajn instalaĵojn por propra uzado, efektivigis pli ol 3,000 teknikajn renovigojn, solvis centojn da malfacilaĵoj en malfortaj punktoj de la produktado kaj tiel antaŭenigis ĝin al plialta nivelo. Ili pene laboris en la daŭro de 188 tagoj kaj fabrikis du aŭtomatajn galvanizajn maŝinojn kun monda progresinta nivelo.

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, la vastaj amasoj de laboristoj kaj oficistoj de la Ĝinan-a Aŭtomobila Fabriko projektis kaj provfabrikis en la daŭro de 100 tagoj la unuan 10-tunan, mem-malŝarĝan, ambaŭ-direkte veturantan kamionon en nia lando.

LUOJANG-A LAGRA FABRIKO — UNU FABRIKO LUDAS ROLON DE DU

La Luoĵang-a Lagra Fabriko solvis en 1966 aron da teknikaj problemoj kun progresinta nivelo de la sesdekaj jaroj, kaj antaŭtempe kaj plene superplenumis la tutjaran ŝtatan planon. La produkta kvanto, specaro kaj kvalito ĉiuj konsiderinde kreskis aŭ plialtiĝis ol en 1965. Nun la sinteza

produkta kapablo de tiu ĉi fabriko jam centprocente superis tiun de la originala plano, kaj komencis ludi la rolon de du fabrikoj.

La produkta praktiko de la Luoĵang-a Lagra Fabriko en 1966 denove pruvas nekontesteble, ke la produktado dependas de homoj kaj la homoj dependas de sinarmo per la penso de Maŭ Zedong. Kun la penso de Maŭ Zedong ĉio iras jam glate. En la pasinteco, kiam la forĝejo de tiu ĉi fabriko produktis lagroringojn per forĝmaŝino fabrikita eksterlande, ĉiu forĝita objekto finproduktiĝis nur post du aŭ tri forĝbatoj. La laboro estis peza, malaltefika kaj ne bonkvalita, kaj ne povis kontentigi la postulojn de la produktado. Ili decidis mem trovi novan forĝmetodon. Kiam ili renkontis malfacilojn en eksperimento, ili studis la verkojn de Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ diris, ke **“faru firman decidon, timu nenium oferon kaj konkeru ĉiujn malfacilojn por akiri venkon.”** Tio multe plifortigis ilian kuraĝon kaj fidon pri la konkero de malfaciloj. Post kelkdek-foja eksperimentado ili fine sukcesis krei novan teknologion de forĝado kaj per unu forĝbato produkti du forĝitajn objektojn, kaj la kvalito estas eĉ pli bona ol tiuj produktitaj per la forĝmaŝino.

La tuta fabriko solvis en 1966 pli ol 700 grandajn kaj mezgrandajn novajn teknikajn problemojn,



La utiliga koeficiento, procento de konsumita koakso kaj la kvalito de la gisaĵo produktita de la altforno n-ro 9 de Anŝan-a Ŝtala kaj Fera Kompanio jam atingis la plej progresintan nivelon de la mondo. Jen la laboristoj legas "Vortojn de Prezidanto Maŭ" antaŭ sia deĵoro.

parto el kiuj havas progresintan nivelon de la sesdekaj jaroj.

RADRINGA FABRIKO FIRME TENAS REVOLUCION KAJ STIMULAS PRODUKTON

La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la unua radinga fabriko en nia lando decideme sekvis la alvokon de Prezidanto Maŭ firme teni la revolucion kaj stimuli produkton dum la granda proleta kultura revolucio kaj direktis sian altan entuziasmon levigintan en la kultura revolucio al la produkta laboro. Ili antaŭtempe plenumis la produktan planon de vagonaj radingoj kaj radoj por 1966. La kvalito de la produktoj plialtiĝis, la kosto rimarkinde reduktiĝis kaj la specoj plimultiĝis.

Post la plenumo de la produktplano por 1966, la laboristoj kaj oficistoj de tiu ĉi fabriko sekvis la instruon de Prezidanto Maŭ: "Ne faru senpreparan batalon", koncentris siajn fortojn por ekzameni kaj ripari la produktajn instalaĵojn kun alta revolucia fervoro por renkonti la novan produktan taskon de 1967.

REVENO DE JUNECA VIVFORTO EN JUMEN-A OLEKAMPO

La produkta plano de kruda oleo de Jumen-a Olekampo por 1966 estis antaŭtempe superplenu-

mita, kaj ĝia produktkosto rimarkinde malplialtiĝis.

La Jumen-a Olekampo estas malnova olebazo de nia lando. En 1966, prenante la Ĉinan Popolan Liberigan Armeon kiel ekzemplon, la vastaj amasoj de la laboristoj kaj oficistoj de tiu ĉi olekampo persistis ĉe kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ dum la granda proleta kultura revolucio, akcelis la revoluciigon de sia ideologio kaj de sia entrepreno, faris serion da sciencaj eksperimentoj kaj reĝustigoj rilate al ekspluato de la olekampo en ĝia posta periodo konforme al la trajtoj de malnova olekampo, efektivigis paŝopostpaŝan ŝanĝon de la fizionomio de la olekampo kaj tiel revenigis la junecan vivforton de tiu ĉi malnova olekampo en ĝia posta periodo de ekspluato. En tiu jaro, dank' al la kampanjo de amasa analizado pri la oleputoj, oni ekhavis fundamentan ideon pri la leĝoj de la dislokiĝo de oleaj tavoloj, trovis la ĉefan kontraŭdiron de ekspluato de la olekampo en la posta periodo, faris du grandajn kampanjojn de laŭtavola akv-enigo kaj laŭtavola oleprodukto kaj por konkeri malfacilegojn, kaj tiel aperigis novan situacion de stabileco en produktkvanto, premo kaj akvoenteno ĉe la olekampo. La ĉiutaga produktkvanto de la krudoleo en Ŝijoŭgoŭ-regiono plialtiĝis je 47 procentoj kompare kun tiu en la pasinteco kaj kreis la plej altan nivelon de la lastaj kelkaj jaroj.

Plej Abunda Rikolto de Grenoj en Ĉinio depost Liberiĝo

LA totala produktkvanto kaj la pomua produktkvanto de grenoj en nia lando en 1966 konsiderinde plialtiĝis kompare kun tiuj de 1965, kiu estas jaro kun tre bona rikolto, kaj tiel montriĝis la plej abunda rikolto dum la 17 jaroj depost Liberiĝo.

Rimarkinda trajto de la grenproduktado de nia lando en 1966 estas ĝenerala pliprodukto kompare kun la stato de 1965, ĉu en la sudo, kie la ĉefa grenplantaĵo estas rizo, ĉu en la nordo, kie ĉefe troviĝas la neakvumitaj grenplantaĵoj. La skalo de pliprodukto en la nordo estas videble pli granda ol tiu en la sudo. En la tuta regiono de la nordo, rezulte de la grandarea kaj grandskala pliprodukto, la stato de malalta produktado de la grenoj el neakvumitaj kampoj jam malaperis, kaj ŝanĝiĝis la historia situacio de "transportado de sudaj grenoj al la nordo". La apero de tiu ĉi nova okazaĵo kun granda signifo klarigas, ke la grenproduktado de nia lando prezentas treege vastan perspektivon de disvolviĝo.

En 1966 okazis kompare seriozaj naturkatastrofoj en la sudo kaj nordo de nia lando. En la nordo, ne malmultaj lokoj sin trovis en serioza sekeco en printempo kaj somero. En la sudo, la vetero estis malvarma kaj pluvoza en printempo, kaj sekeco daŭris de la somero ĝis la aŭtuno. En parto de la norda kaj suda regionoj okazis fiinsekta minaco, precipe en ne malmultaj lokoj en la Nordoriento kaj Nordo multe pli serioza estis la detruo fare de la arme-vermoj. Krome, en

iu regionoj de la lando respektive aperis naturkatastrofoj de torenta pluvo, tajfuno, hajlo kaj tertremo. Tiamaniere estiĝis multaj malfaciloj por la grenproduktado. Tamen, la grado de detruo de la naturkatastrofoj en la lasta jaro estis nur meza en la daŭro de la 17 jaroj depost la Liberiĝo. La katastrofa areo aŭ la detruita areo estis pli malgranda ol tiu en la trijara periodo de grandaj katastrofoj. Tio klarigis, ke post la komunumigo la komunumoj efektiviĝis sian superecon kaj daŭre entreprenis la bazan konstruadon sur la kamparo, kiu siavice rezistis la naturkatastrofojn. Sed la plej grava estas tio, ke la vasta kamparana amaso kaj la kamparaj kadroj de nia lando senĉese armas siajn kapojn per la penso de Maŭ Zedong, firmvole studas la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj agas laŭ la instrukcioj de Prezidanto Maŭ, plene ludigante la rolon de "homo kiel la unua faktoro". Ili ne timas la ĉielon, nek la teron, nek laciĝon, nek suferon. Kaj ili kuraĝas batali, venki kaj havigis al si abundan rikolton de grenoj, dependante de sia aŭdaca revolucia spirito.

Prezidanto Maŭ instruis al ni: "En la kampoj de la batalo por produkto kaj scienca eksperimento, la homaro faras konstantan progreson kaj ankaŭ la naturo trapasas konstantan ŝanĝon; ili neniam restas sur la sama nivelo. Tial, la homaro devas konstante resumi sperton kaj fari novajn eltrovojn kaj novajn inventojn, novajn kreaĵojn kaj novajn progresojn." En la vintro de 1965 kaj

en la printempo de 1966, la vasta kamparano ĝenerale faris plenan resumon pri spertoj de la grenproduktado en la pasinteco, kaj pere de tio ili komprenis, ke ili devis senĉese ŝanĝi la fizionomion de la kampoj, okupiĝi pri la baza konstruado sur la kamparo, disvolvi la renovigan movadon de agrikultura tekniko kaj komplete efektivigi la “okpunktan ĉarton por agrikulturo” elmetitan de Prezidanto Maŭ, surbaze de la konkretaj kondiĉoj de diversaj regionoj. Rezulte de tio, ĉu en la sudo aŭ en la nordo, la nivelo de sterkado kaj kampa mastrumado, la progresinta tekniko pri profunda plugado kaj densa plantado, la enkonduko de altkvalitaj semoj, la protektado de plantoj, la plivastigo de agrikultura mekanikigo, la renovigo de sistemo de terkulturo — ĉio ĉi tio multe pliprogresis kaj pliboniĝis kaj ludis gravan rolon en la akcelado de la granda pliprodukto de grenoj.

La venko de la rezisto kontraŭ naturkatastrofoj kaj la pliprodukto de grenoj en nia lando

en 1966 estas venko de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong kaj venko de la firma observado de la instrukcioj de Prezidanto Maŭ fare de la vastaj amasoj kaj kadroj. Prezidanto Maŭ antaŭlonge montris, ke **“La socia ekzisto de la homoj decidas ilian ideologion. Kiam la korekta ideologio, kiu reprezentas la progresintan klason, estas posedita de la amaso, ĝi fariĝos materia forto, kiu remuldas la socion kaj la mondon.”** La plenamplaksa, eksterordinare abunda rikolto de grenoj en 1966 estas rezulto de la forigo de burĝa ideologio kaj starigo de proleta ideologio kaj rezulto de kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ fare de vastaj kamparanaj amasoj dum la granda proleta kultura revolucio.

Nun la kamparana amaso en diversaj lokoj de nia lando plialte tenas la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj klopodas por antaŭenigi la agrikulturan produktadon de 1967 al pli nova stadio surbaze de tiu de 1966.

La popolkomunumanoj kaj PLA-anoj ĝoje rikoltas la malfruan rizon.



La Kemia Cementa

Tekniko de Ĉinio

Atingis la Progresintan

Nivelon de la Mondo

ALTE tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, rompante fremdlandajn rutinojn kaj persistante ĉe la spirito de sinapogo sur la propraj fortoj, iuj akvoutiligaj inĝenieraj institucioj kaj sciencaj esploraj institutoj kunlabore sukcesis fabriki novan kemian cementilon kaj unuan pumpilon de kemia cementado en nia lando, kaj tiel levis la teknikon de kemia cementado de Ĉinio al la progresinta nivelo de la mondo.

Tiu kemia cementilo havas viskozecon eĉ pli malaltan ol la akvo. Pumpe injektita en fendaĵon de roko aŭ betono malpli larĝan ol haro, ĝi rapide penetras en ambaŭ flankojn de la fendo je profundo de 3 ĝis 6 milimetroj, kaj kvazaŭ nito fikse kunigas la fendaĵon. Tiu nova produktaĵo havas gravan signifon por flegado kaj riparado de betonaj akvoutiligaj konstruaĵoj, domoj, pontoj, fervojaj bazoj, kajoj, antikvaj ŝtonaj objektoj k. s.

La meza aĝo de la personoj, kiuj partoprenis la provadon kaj faradon de tiu kemia cementilo, estas nur 25 jaroj. Pliparto el ili komencis laboron nur antaŭ nelonge, kaj havis neniun sperton en produktado de tia kemiaĵo; mankis al ili ankaŭ tiurilata materialo. Kiam ili entreprenis la laboron, iuj burĝaj teknikaj "aŭtoritatuloj" en la lando faris sian plejblon por obstakli la provadon, dirante ke "iuj fremdaj landoj jam sin okupis longe pri tiu afero, sed atingis nenan signifan rezulton, kaj kion vi ja povos atingi?" Tamen, tiuj obstakloj kaj la sennombraj malfaciloj renkontitaj en la laboro neniel povis timigi la revoluciulojn kiuj havas grandajn kaj bravajn aspirojn. Estante kuraĝaj en ĉio, ili decidis perdi neniom la gloron de la ĉina popolo, kuratingi kaj superi la mondan progresintan nivelon kaj persisti en la eksperimentado.

Dum la eksperimentado la esploristoj penis studi kaj apliki kreive la verkojn de Prezidanto Maŭ. En la komenco ili faris esploradon dum certa tempodaŭro en laboratorio, sed la progresado estis malrapida, kaj la atingo malmulta. Kun tiu problemo ili studis la verkon de Prezidanto Maŭ, kaj laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, ili iris al iu akvoutiliga konstruejo kaj faris eksperimentadon surloke kune kun la laboristoj, konkerante diversajn malfacilojn.

Tiu kemia cementilo estas kontraŭa al akvo kaj oksigeno. Kiel solvi tiun ĉi problemon? Dum la eksperimentado ili plurfoje malsukcesis. Poste ili akiris grandan inspiron en studado de "Pri Praktiko" kaj "Pri Kontraŭdiro", ŝanĝis la labormetodon klopodi senlige kaj unuflanke konsideri sole pri la kvalito de materialo, kuraĝe aplikis novajn rimedojn alidirekte kaj puŝis la eksperimentan laboron grandpaŝe antaŭen.

La kemia cementilo estis fine sukcese farita. Tamen, malgrandaj fendaĵoj en betonaĵoj estas ĝenerale pli mallarĝaj ol 0.3 mm., kaj sen speciala pumpilo, la kemia cementilo ne povas esti enigita en ilin. La partia komitato de la akvoutiliga konstruejo asignis la taskon de farado de tia pumpilo al ties ripara fabriko, kiu estas malgranda fabriko kaj nebone ekipita, kaj por kiu la tasko estis malfacila. Tamen, la laboristoj, teknikistoj kaj kadroj, kiuj partoprenis la laboron, studis verkojn de Prezidanto Maŭ, liberigis sian penson, disvolvis la spiriton kuraĝi pensi, kuraĝi iniciati kaj kuraĝi revolucii, efektivigis plenan kunlaboron, kaj post pli ol cent provoj ili sukcesis fabriki la unuan pumpilon por kemia cementilo de nia lando en iom pli ol 20 tagoj, kaj tiel garantiis la ĝustatempan kaj grandskalan utiligon de la kemia cementilo en la produktado.

Ekonomia kaj Komerca

Ekspozicio

de Ĉinio en Japanio

LAŭ la interkonsento subskribita de la amikaj komercaj organizoj de Ĉinio kaj Japanio, por antaŭenpuŝi la interkompreniĝon, plifortigi la amikecon kaj akceli la popolan komercadon inter la du popoloj, okazis en Japanio la Ekonomia kaj Komerca Ekspozicio de Ĉinio, de la 1-a ĝis la 21-a de oktobro de 1966 en Kitakjuŝu kaj de la 19-a de novembro ĝis la 11-a de decembro en Nagoja. La nombro de la vizitantoj de la du ekspozicioj atingis kune pli ol 3,700,000. Tio kreis la plej altan rekordon de la nombro de vizitantoj en iu ajn internacia ekspozicio okazigita en Japanio fare de diversaj landoj de la mondo.


La Ekspozicio radianta la brilon de la penso de Maŭ Zedong okazis en la alta tajdo de la granda

proleta kultura revolucio de Ĉinio. Ĝi montris la grandegajn atingojn en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de la nova Ĉinio dum 17 jaroj, spegulis la brilan sukceson akiritan de la 700-miliona ĉina popolo armita per la penso de Maŭ Zedong, sub la gvido de la penso kuraĝi revolucii kaj kuraĝi venki. Ĝi entute montris pli ol 10,000 ekspozitaĵojn, inkluzive de diversspecaj precizaj ilmaŝinoj, aŭtomobiloj, traktoroj, precizaj aparatoj, produktaĵoj de kemia industrio, agrikulturo kaj malpeza industrio, kaj multaj diversaj metiartaĵoj.

La Ekspozicio vaste tiris al si la japanan popolon. Dum ekspozado ĉiutage de la mateno ĝis la vespero

La Ekonomia kaj Komerca Ekspozicio de Ĉina Popola Respubliko estas solene inaŭgurata en Kitakjuŝu, Japanio.





Ĉe la fermo de la Ekspozicio, la gastoj kaj gastigantoj krias "Vivu Prezidanto Maŭ!" "Vivu la batala amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Japanio!"

miloj kaj miloj da vizitantoj, junaj kaj maljunaj, svarmis de ĉiuj flankoj al la ekspozejo, i. a., tiuj kiuj venis kolektive el aliaj lokoj de la lando. En la unua tago de ĝia ekspozado en Nagoja aperis senprecedenca homsvarmo. Ĝin vizitis pli ol 160,000 rigardantoj. Tio plene montris, ke la japana popolo senlime amas Prezidanton Maŭ Zedong kaj novan Ĉinion, ke la amikeco inter ĉina kaj japana popoloj ĉiam pli profundiĝas en la koron de la popolo. Prezidanto Maŭ diris: "En Japanio, escepte de la prousonaj monopol-kapitalistoj kaj militaristoj, la vasta popolo estas nia vera amiko." La entuziasma vizitado de la japana popolo al la ekspozicioj plene pravigis la ĝustan aserton de Prezidanto Maŭ.

La japana popolo de diversaj tavoloj amase laŭdis la socialisman Ĉinion kaj la senkomparan potencon de la penso de Maŭ Zedong post ilia vizito. Iu vizitanto skribis en la notlibro de la Ekspozicio: "La mirindaj atingoj de la ĉina popolo, kiu sekvas la grandan penson de Maŭ Zedong, donis al ni japana popolo grandan forton. Ni profunde sentas, ke ankaŭ ni devas klopodi por pli frue finkonstrui belan socion." Alia vizitanto kun entuziasmo diris, ke la Ekspozicio "sentigas min pri la grandeco de marksism-leninismo kaj la grandeco de la plej altnivela marksist-leninisto de la nuna epoko — Prezidanto Maŭ Zedong kaj de la Komunista Partio de Ĉinio".

La vasta vizitataro de Japanio laŭdis ke ĉiu ekspozajo estas nova frukto akirita en la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento de la 700-miliona ĉina popolo armita per la penso de Maŭ Zedong.

Dum ekspozado, en la ekspozejo ĉiam regis ĝojiga amikeca atmosfero. Por kontentigi la bezonojn de vizitantoj, la kultura domo de la Ekspozicio aranĝis legejon de verkoj de Prezidanto Maŭ, kien senĉese venis legantoj dum la tuta tago. La plej multe venditaj el ĉinaj libroj estis la *Cititaj Vortoj de Prezidanto Maŭ* kaj aliaj verkaĵoj de Prezidanto Maŭ. Multaj vizitantoj aĉetis la *Cititajn Vortojn de Prezidanto Maŭ*. Multaj vizitantoj skribis en la notlibro: "La penso de Maŭ Zedong estas la komuna trezoro de la monda popolo." "Vivu la penso de Maŭ Zedong!" ktp.

La Ekonomia kaj Komerca Ekspozicio de Ĉinio sukcese fermiĝis je la 11-a de decembro. La estro de la ekspozicia delegacio okazigis tiuvespere solenan bankedon. Ĝin ĉeestis la respondeculoj de la Japana-Ĉina Amikeca Asocio (Ortodoksa), Japana Tutlanda Asocio por Helpo al EKEĈ, Mez-Japana Asocio por Helpo al EKEĈ, Ĉefoficejo de Japana-Ĉina Amikeca Asocio (Ortodoksa) de Ajĉi-gubernio kaj urba registaro de Nagoja kaj pli ol 2500 aliaj diversrondaj japanaj amikoj el diversaj lokoj de la lando.

Granda Venko de la Aziaj Popoloj, Kiuj Disvolvas Memstare Sian Fizikan Kulturon



Sportistoj de pafado Tran Anh el Vjetnamio (la unua de dekstre), kiu plurfoje partoprenis en pafado kontraŭ usonaj aeraj rabistoj kaj Manivon el Laoso (la dua de dekstre), kiu partoprenis kaj glorie vundiĝis en kontraŭsona batalo, rigardas kun profunda sento la portreton de Prezidanto Maŭ, al kiu ili havas senliman respekton kaj amon.

LA Unua Azia Sportkunveno de Nove Emerĝintaj Fortoj okazis de la 25-a de nov. ĝis la 6-a de dec., 1966 en Pnompeno, la ĉefurbo de Kamboĝo.

Tiu ĉi sportkunveno estas novtipa, sinteza internacia sportkonkurso, kiun la popoloj de nove emergintaj fortoj en Azio unuafoje aranĝis memstare kaj sendepende kaj per kiu ili rompis la kontroladon kaj monopolon de imperiismo super la afero de internacia fizika kulturo. Ĝi estas granda venko de la aziaj popoloj, kiuj memstare kaj sendepende disvolvas sian sportan aferon.

La okazigo de la Unua Azia Sportkunveno de Nove Emerĝintaj Fortoj estis unuanime akceptita en la Fondiĝa Kunveno de la Azia Komitato de la

Sportkunveno de Nove Emerĝintaj Fortoj okazinta en sept., 1965 en Pekino. Ekde tiu tempo, la usona imperiismo kaj ĝiaj sekvantoj intrigis por ĉiel malhelpi kaj subfosi ĝin. Sed, ilia malnobla konspiro foje-post-foje trafis hontindajn fiaskojn. La okazigo de la Unua Azia Sportkunveno de Nove Emerĝintaj Fortoj en la fiksita tempo donis pezan baton al la usona imperiismo kaj diverslandaj reakciuloj.

Pli ol du mil sportistoj el dek sep landoj kaj regiono en Azio partoprenis la konkursadon. Ili estas sportistoj el la jenaj landoj kaj regiono: Kamboĝo, Ĉinio, Vjetnamio, Laoso, Koreio, Mongolio, Pakistano, Nepalo, Cejlono, Palestino, Sirio, Irako, Jemeno, Indonezio, Libano, Japanio k. a.

En Konstruado

ŜPRUC-GRAVURADO POR DESEGNO-TINKTURADO

La laboristoj de la desegnogravura laborejo de la Desegno-tinktura Fabriko de Vuhi, alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, kuraĝas pensi, agi kaj revolucii kaj rompinte la malhelpojn de burĝaj teknikaj "aŭtoritatuloj" kaj kun helpo de frataj fabrikoj de Ŝanhajo ili sukcesis eltrovi novan teknikon ŝpruc-gliptiko (ŝpruc-gravurado) por tinkturaj desegno-cilindroj trovitan nur en nia lando.

Antaŭe la tinkturaj desegno-cilindroj estis mane gravuritaj de la laboristoj. La rapideco estis tre malalta. Poste enkondukigis fotogliptiko. Tio multe altigis la rapidecon kaj la teknikan nivelon de la desegnopresado. Sed la ŝprucgliptiko iniciatita de la laboristoj kaj funkciuloj de la Desegno-tinktura Fabriko de Vuhi atingis pli altan nivelon en gravurado de malfacilaj desegnoj ol la fotogliptiko.

Nun 95% el la desegnoj, kiuj antaŭe devis esti faritaj per fotogliptiko, estas farataj anstataŭe per la nova tekniko ŝprucgliptiko. La ĉirkaŭduonjara praktiko pruvis, ke la nova tekniko havas grandan superecon.

KONTINUA DISVOLVIĜO DE PORKOBREDADO EN ŜANDONG-PROVINCO

En septembro de 1966, la nombro de instalaj porkoj bredataj de la kamparaj popolaj komunumoj de Ŝandong estis je 40% pli granda ol tiu en la sama monato de la lasta jaro, kaj estis je 5.4-oblo pli granda ol la nombro en 1949. En la gubernio Lin-gju ĉiu familio bredis, meznombro, du porkojn en la pasinta jaro. Antaŭ ses jaroj, la tuta Hongŝiguanĝuang-brigado de Sanma-komunumo en Jiŝuj-gubernio havis nur unu porkon, sed nun ĉiu homo bredas du meznombro. La disvolviĝo de porko-bredado sekvigis, ke la kampoj ricevis videble pli multan sterkon ol en la pasintaj jaroj. Tio forte akcelis la pliprodukton en agrokulturo kaj ludas tre gravan rolon en livero de viando, plibonigo de la popola vivo en urboj kaj vilaĝoj, pliigo de eksportoj kaj subteno al la konstruado de la lando.

Tiu ĉi sportkunveno plene manifestis la novan spiriton de la aziaj popoloj de "pliigo de amikeco, reciproka akcelado por kuna progresado kaj unuiĝo kontraŭ imperiismo". La diverslandaj sportistoj montris sian stilon de unuiĝo, interhelpo kaj frateco, en drasta kontrasto kun la aĉaj kutimoj de la imperiismaj sportaj rondoj: profito el alies malutilo, reciproka superruzo kaj artifiko per spekulacio.

Post 11-taga tre intensa konkursado, kiu tamen estis plena de interkomprenemo, amikeco kaj frateco, la sportistoj de diversaj landoj kreis bonajn rekordojn kaj faris pozitivajn kontribuojn por la afero de unuiĝo de la aziaj popoloj por oponi kontraŭ la imperiismo. Ĉinaj sportistoj Ĉen Manlin kaj Hiaŭ Minghiang rompis respektive en tiu ĉi sportkunveno la mem tenitajn mondrekordojn de bantampeza puŝlevo kaj plumpeza svinglevo. La altsaltisto Ni Ĝikin de Ĉinio atingis la plej bonan rezultaton pri altsalto en la mondo de la pasintaj tri jaroj. Aliaj gesportistoj de diversaj landoj ankaŭ rompis 59 rekordojn de la Sportkunveno de Nove Emerĝintaj Fortoj kaj grandan nombron da rekordoj de siaj propraj landoj kaj tiel akiris riĉan rikolton en la afero de fizika kulturo de la popolo de aziaj nove emergintaj fortoj.

Kun ĝojekscitiĝo la vjetnama sportistino akceptas de la ĉina kamarado la plej karan donacon — medalo kun la portreto de Prezidanto Maŭ.




Caj Jonghiang

— Komunisma

Batalanto



1. Caj Jonghiang estas alia granda komunisma batalanto elkulturita de la granda epoko de Maŭ Zedong. Li oferis sian junan vivon por savi la Kiantangiang-pontegon kaj ruĝajn gvardianojn.



2. Caj Jonghiang naskiĝis en familio de malriĉ-kamparano. Li arde amas Prezidanton Maŭ jam de sia infanaĝo. Kiam li lernis en elementa lernejo, li plej ŝatis kanti la kanton *Ruĝas la Oriento*, kaj la tekston de tiu kanto li ankaŭ plej ŝatis legi.



3. La 8-an de februaro 1966, li eniris en la Popolan Liberigan Armeon, la grandan lernejon de la penso de Maŭ Zedong. Li decidis ĉiam esti bona batalanto de Prezidanto Maŭ, same kiel la veteranaj kamaradoj.




4. Li venkis la malfacilon de malalta klereco kaj multfoje legis la "Tri Malnovajn Artikolojn". Li diris: "Mi jam faris decidon, ke mi legos la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj sekvos lin revolucii dum la tuta vivo!"



5. Li kreskis rapide sub la nutrado de la penso de Maŭ Zedong. Li diris: "Mi dediĉos mian junecon al la pontego." Iunokte li informiĝis pri tio ke io suspektinda troviĝas ĉe piliero de la pontego. Li eliris por fari traserĉon kune kun la subplotonestro. Jen li kuraĝe kuras antaŭ la aliaj armeanoj....




6. Caj Jonghiang senlime varme amas Prezidanton Maŭ. La 5-an de oktobro 1966, t. e., kvin tagojn antaŭ lia martiriĝo, profitante la ripozhoron en tagmezo li eniris la urbon kaj aĉetis tri portretojn de Prezidanto Maŭ kun ruĝe radianta vizaĝo. Li diras: "Jen estas mia plej bona donacaĵo al nia subplotono por la Nacia Tago."



7. La 10-an de oktobro, frumatene je 34 minutoj post la 2-a, Caj Jonghiang deĵoris ĉe la pontego. Tiam alkuris al li trajno speciala por ruĝaj gvardianoj. Subite li trovis, ke granda lignopeco kuŝas sur la trako, pli ol 40 metrojn sude de sia posteno. Tio estas subfoso de klasa malamiko. Li tuj galopas al la trajno sen konsidero pri sia sekuro.



8. En la vagono la junaj ruĝaj gvardianoj estas lernantaj la *Cititajn Vortojn de Prezidanto Maŭ*. Kiel ili deziras tuj fluge atingi Pekinon por vidi la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ!



9. "Sturmu! Eĉ se falus la ĉielo kaj fendigus la tero!" En tiu kriza momento, Caj Jonghiang kuraĝe forigis la baraĵon sur la trako, garantiis la sekurecon de la ruĝaj gvardianoj kaj la Kiantanggiang-pontego. La juna Caj Jonghiang heroe oferis sian vivon.



10. La heroea figuro de Caj Jonghiang ĉiam vivas en nia koro. Miloj kaj miloj da junaj ruĝaj gvardianoj de diversaj lokoj alvenis al la Kiantanggiang-pontego por montri sian respekton al Caj Jonghiang kaj lerni de li. Ili ĵuras, ke ili ĉiam restos fidelaj al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong same kiel Caj Jonghiang.

Kultura Vivo

LA ARMEA KANTA KAJ DANCA ENSEMBLO DE RUMANIO EN ĈINIO

La Armea Kanta kaj Danca Ensemblo de la Socialisma Respubliko de Rumanio alvenis al Ĉinio laŭ nia invito kaj faris rondvizitadon kaj prezentadon.

Dum sia restado en nia lando, la Ensemblo vizitis unu post la alia Pekinon, Ŝanhajon, Vuhan-on, Kantonon, Ĉangŝa-on k. a. por fari prezentadon. La prezentitaj programeroj riĉaj je nacia kaj folkloraj koloroj kaj la ĉinaj kantoj kaj dancoj, kiel ekzemple *Talioŝambura Danco* kaj *Abundrikolta Danco*, luditaj de rumanaj artistoj, ricevis varman aplaŭdon de la spektantaro de nia lando. En Hunan-provinco, la Ensemblo speciale vizitis Ŝaŝan, la hejmlokon de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kaj ankaŭ la Unuan Pedagogian Lernejon de Hunan-provinco kaj Kingŝujtang, kie Prezidanto Maŭ entreprenis revoluciajn agadojn en siaj fruaj jaroj. La gastoj estis varme bonvenigitaj de tieaj popolanoj kaj de revoluciaj amasoj kaj ruĝaj gvardianoj el diversaj partoj de nia lando, kiuj ĝuste faris tie viziton.

Dum ili faris viziton kaj prezentadon en Pekino, la rumanaj artistoj spektis la modernan pekinan operon *La Ruĝan Signal-lanternon* kaj la baledon *Ruĝan Virinan Taĉmenton* luditajn de la artistoj de nia ĉefurbo kaj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj krome la larĝekranan filmon *Ruĝas la Oriento* (grandtipa muzika kaj danca epopeo). Ili ankaŭ rigardis la argilajn skulptaĵojn *Terrentan Kolektejon* kaj vizitis la Militan Muzeon de Ĉina Popola Revolucio kaj aliajn lokojn. La rumanaj artistoj tre laŭdis kaj aprezis la prezentadon de ĉinaj artistoj. Ili diris: "Viaj prezentadoj montras, ke via granda kultura revolucio forbalais ĉiujn malnovaĵojn kaj alportis multe da novaj enhavoj. Tio estas tre bona afero." Kaj ili daŭrigis: "Ĉinio certe atingos pli grandajn sukcesojn pere de la granda kultura revolucio."

La 2-an de januaro, Ĝoŭ Enlaj kaj aliaj gvidantaj kamaradoj rigardis la prezentadon de la Armea Kanta kaj Danca Ensemblo de Rumanio kaj akceptis ĝiajn gvidantojn kaj parton el ĝiaj membroj. La Komitato por Kulturaj Interrilatoj kun Fremdaj Landoj de la Ĉina Popola Respubliko kaj la Ĝenerala Politika Departemento de la Ĉina Popola Liberiga Armeo aranĝis unu post la alia bankedon kaj grandan akceptkunvenon por varme bonvenigi kaj adiaŭi la gastojn.

Rakonto pri Brakhorloĝo

LASTTEMPE en Japanio vaste cirkulis kortuŝa rakonto, kiu entuziasme kantis la komunisman stilon de la ĉina popolo armita de la penso de Maŭ Zedong kaj laŭdis la profundan amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj Japanio.

Jen la rakonto:

En junio de 1966, la komunumanoj de la unua produktbrigado Lju Giaĝuang de Maju-komunumo de Gin-gubernio, Hebej-provinco aĉetis sakojn da kemia sterko el proviza kaj venda kooperativo. Kiam ili malfermis unu sakon, ili neatendite trovis porvirinan brakhorloĝon inter la plasta sako kaj la interna pakpapero. Laŭ la sako ili juĝis, ke ĝi estas importita el Japanio. Ili pensis, ke la posedanto de la brakhorloĝo certe estas japano. La komunumanoj de la nova Ĉinio armitaj de la penso de Maŭ Zedong, antaŭ tio unue konsideris: Kiel maltrankvila estas la horloĝ-perdinto! Ili senprokraste komisiis al sia brigadestro, ke li sendu la brakhorloĝon kune kun la paka sako al la partia komitato de la komunumo, kaj proponis ke oni transsendu la trovitan objekton al la superaj instancoj por ĝin redoni al ĝia posedanto.

La partia komitato de la komunumo sendis al la gubernio la brakhorloĝon, kiu estis transsendita unue al la subprovinco kaj poste al la provinco. Fine la enketo de la Tutlanda Ĝenerala Proviza kaj Venda Kooperativo konstatis, ke la kemia sterko estis importita el Japanio en marto de 1966. Tial ili transsendis la brakhorloĝon al la Liaŭ Ĉengĝi-a Oficejo postenanta en Japanio. Post multflanka enketo de la koncernataj organizoj de la japan-ĉina komerco de Japanio, la posedanto de la brakhorloĝo Ŝizue Maĉunaga estis fine trovita.

Ŝizue Maĉunaga estas paklaboristino de la Ube Kosan-a Azotsterka Fabriko de Japanio. Dum enpakado de la kemia sterko neatentite ŝia brakhorloĝo falis en la paksakon. Ŝi ĉie serĉis ĝin, sed vane, kaj jam delonge perdis la esperon por ĝin trovi. Ŝi neniam pensis, ke ŝia brakhorloĝo revenis el Ĉinio post duonjara "vojaĝo". Kiam ŝi ricevis la brakhorloĝon resenditan de la ĉinaj amikoj, ŝi tre emociite diris: "Tio estas vere songo! Mi konservas la brakhorloĝon kiel memorigaĵon dum mia tuta vivo." Ŝi tuj skribis leteron plenan je entuziasmo al la Maju-komunumo de Gin-gubernio de nia lando por esprimi sian koran dankon. En la letero ŝi varme laŭdis la noblan kvaliton de la komunumanoj kaj bondeziris al la popola komunumo progreson.

Novaj homoj, novaj aferoj kaj novaj moroj aperas en la nova Ĉinio de la epoko de Maŭ Zedong. La rakonto pri la brakhorloĝo, kiu enkorpigis la novajn morojn de la ĉina popolo, cirkulas nun en la vasta japana popolo.

Kanto pri Oŭjang Haj

9-a Ĉapitro: Sturmo kontraŭ Flamanta Fajrego

(daŭrigo)

ĈE KRITIKADO

EN la horo de vespermanĝo Hjue Hinven diris al la deĵoranta plotonestro, ke li sciigu la aliajn plotonestrojn kaj subplotonestrojn, ke ili venu al la sidejo de la roto post vespermanĝo por kunveni. La supera instanco asignis provizoran taskon, ke la trupo ĉesigu ekzercadon por unu semajno kaj repretigu ŝoseon. Por plifruigi la finkonstruadon de la akvokonservejo de la gubernio oni devis plilarĝigi kaj plisolidigi la simplan ŝoseon kondukantan al la granda digo, tiel ke la ekipaĵoj kaj materialoj necesaj por konstruado povis esti pli rapide transportataj. Por subteni socialisman konstruadon kaj agrikulturon la trupo tiun ĉi taskon iniciate prenis de la sekretario de la gubernia partia komitato.

Kiam ĉiuj alvenis, Hjue Hinven klarigis al la plotonestroj kaj subplotonestroj la gravan signifon de la tasko, la postulon kaj direktivon de la supera instanco, kaj je la fino li diris:

“Morgaŭ rotestro Guan iros al la sidejo de la divizio por partopreni mallongperiodan trejnadon, kaj li revenos post dek tagoj. Tial la roto decidis, ke mi respondecu pri la konstruo por la nuna tempo. Mi havas nesufiĉan sperton, do mi esperas, ke ni ĉiuj kune klopodu per la tuta forto kaj bone plenumu tiun ĉi taskon.”

La subplotonestroj lakone esprimis sian decidemon respektive. Hjue Hinven trovis, ke inter tiuj parolantoj ne estis la estro de la sepa subplotono. Traserĉinte la ĉambron per sia rigardo, li konstatis, ke Oŭjang Haj ja ne ĉeestis la kunvenon.

“Kie estas la estro de la sepa subplotono?” demandis Hjue Hinven.

“Li . . . li eliris,” leviĝis vicestro Vej Vujue kaj respondis, “kaj ankoraŭ ne revenis.”

Skuante sian kapon Hjue Hinven ne parolis. En la antaŭtagmezo Oŭjang Haj faris garantion al la roto, ke ili “plifortigos la organizecon kaj disciplinecon” kaj “modele observos ĉiujn regulojn kaj sistemojn de la roto”. Do, kial li, kiel subplotonestro, kuraĝis fari iniciaton rompi sian promeson reveni ĝusthore eĉ en la tago, kiam la garantiskribo estis alsendita? Tio, kio pli gravas, estis, ke en la pasinteco Oŭjang Haj kompare bone observis la sistemon pri komuna vivo, sed nun kiam li akiris sukceson en la laboro, li jam ne havas rudimentan koncepton pri organizeco kaj disciplineco! Fojon post fojo li konsideris la lasttempajn agojn de Oŭjang Haj kaj diris en si mem, “Ve! Tiu bona kamarado tiel abrupte ŝanĝiĝis. Estas tempo, ke oni ne povas ne kritiki lin.”

Ĉiuj kamaradoj jam foriris de la kunveno. Hjue Hinven elprenis la garantiskribon de Oŭjang Haj kaj denove ĝin legis kun atento. Li ree pripensis tion, pri kio li disputis kun Oŭjang Haj hieraŭ, kaj grumblis en si mem, “Tio estas mia kulpo! Mi havis tro multe da konsideroj, kaj ne akre kritikis lian fierecon. Jen, finfine okazis akcidento. Delonge mi jam sentas, ke oni ne devas preterlasi lian memkontentecon! . . .”

“Ne! Mi ne devas ree agi liberalisme. Ĝuste pro tio, ke vi estas bona kamarado, mi ne povas ne plenumi mian respondecon por vi. Nur se la Partio tenas min sur la nuna posteno kaj kiam ajn se mi trovas ion ne en ordo, tion mi nepre reĝustigos, ĉu vi ne konsentas kun mi, aŭ ĉu vi opinias, ke mi estas kadro kun malalta nivelo. Mi nepre tiros vin sur la ĝusta vojo, kaj mi ne devas permesi vin deflankiĝi de la korekta vojo.”

Brila lunlumo verŝis sin sur la ekzercejo. Hjue Hinven estis parolanta al la tuta roto. Lia parolo jam daŭris kelkan tempon.

“... En la roto ni plurfoje emfazis la plifortigon de organizeco kaj disciplineco, sed iuj kamaradoj ne atentis tion en sia penso. Precipe la sepa subplotono devas esti kritikata.”

La batalantoj de la sepa subplotono ĉiuj klinis siajn kapojn. Du kamaradoj en la roto ne revenis tiutage je promesita horo, kaj tiuj du estis anoj de la sepa subplotono. Juna Liu revenis nur post la komenco de vespermanĝo, kaj Oŭjang Haj eĉ nun ankoraŭ ne revenis.

Apude Guan Jingkuj iris tien kaj reen. Li sentis, ke la hodiaŭa parolo de Hjue Hinven ne estas sufiĉe ĝusta kelkloke. Sed li konsideris, ke li venis al la tria roto ne tre longe, kaj eble li baldaŭ reiros al la originala organizo, tial li ne interrompis lian parolon streĉe kunpremante siajn lipojn.

“Iuj kamaradoj,” Hjue daŭrigis, “komprenas la racion kaj konas la gravecon de organizeco kaj disciplineco. Tamen, ili agas tute alie. Ĝuste tia estas Oŭjang Haj, estro de la sepa subplotono. Li ne revenis eĉ nun!... Vicestro de la sepa subplotono, ĉu Oŭjang Haj revenis aŭ ne?”

“Ne,” mallaŭte respondis Vej Vujue.

“Vi ĉiuj pripensu, ĉu la gvidantaro ne maltrankviligas pro li, se li agas plue tiel? Vere, Oŭjang Haj estas bona kamarado. Li estas rime-dohava kaj energiplena en la laboro. Pro tio la sepa subplotono multe progresis. Sed kial li ŝanĝiĝis abrupte? Tion kaŭzas liaj fiereco kaj memkontenteco. Mi pensas, ke ni ĉiuj devas ĉerpi el tio instruon. La Partio ĉiam esperas, ke ni faros nian laboron bone kaj pli bone, kaj la vojo de progreso ne havas finon. Sed iuj kamaradoj ne konas tion. Ili ne volas iri antaŭen, kiam ili akiris iom da sukceso. Kiel tio ne povus kaŭzi akcidenton? Kamaradoj, ni estas revolucia armeo, kaj armeo devas batali. Ni devas tuj ekiri, kiam ajn la situacio tion postulas. Kompreneble, la tasko, kiun ni prenis hodiaŭ, estas nur rekonstruado de ŝoseo. Se la tasko estus batalo kaj ĉiuj foriris tiel malzorgemaj kaj ne revenus je ĝusta horo, per kio do ni garantios la venkon de batalo? Kaj kiel ni plenumos nian taskon?”

“Ra... raporto...,” Oŭjang Haj rapidis reveni apenaŭ povante daŭrigi sian spiradon.

“Kial vi apenaŭ revenis?” demandis Hjue Hinven.

“Mi... mi revenis malfrue.”

“En la vicojn,” rigardante lin Hjue diris. “Vicestro de la sepa subplotono transdiru al vi post momento. Oŭjang Haj, estu atenta. Ĉifoje vi sepa subplotono devas serioze kunveni kaj klopodu trovi la originon.”

“Jes,” Oŭjang Haj respondis, sed li ne bone komprenis la signifon de la vortoj de la anstataŭanta vicdirektanto.

“Ĉiu el ni devas ĉiam postuli al si laŭ alta normo. Neniu devas konsideri sin sufiĉe bona, des malpli li devas fariĝi fiera aŭ memkontenta pro tio, ke li atingis ian sukceson en sia laboro. Mi ripetu: Se iu ne estos singardema pri tio, mi estas certa, ke...”

Guan Jingkuj sentis, ke la kritiko iras tro foren de la temo. Li paŝis antaŭen kaj flustris al Hjue ĉe la orelo. Momenton hezitante Hjue diris:

“Bone, mi finas ĉitie por hodiaŭ.”

La lastaj vortoj de ekstertema kritiko fare de Hjue Hinven komprenigis Oŭjang Haj: “Evidentiĝis, ke laŭ la opinio de la anstataŭanta vicdirektanto, ĉiuj problemoj estas elmontriĝo de miaj ‘fiereco kaj memkontenteco’.”

La sepa subplotono kunvenis ĉe la rando de la ekzercejo. Guan Jingkuj alportis benketon kaj sidis apude. Maltrankvilo montriĝis sur liaj lipoj kun klaraj konturoj. Eble la hodiaŭa kritikado de Hjue Hinven ne estis tre ĝusta. Tamen, kiel oni korekte konsideris tion kiel subuloj? Ĉu Oŭjang Haj kun sia eksplodema karaktero povis sin reteni?... Jen kio maltrankviligis lin.

Apenaŭ juna Vej finis al Oŭjang Haj la transciigon pri la tasko por morgaŭ kaj la kritiko de la anstataŭanta vicdirektanto, Liu Janŝeng eksaltis.

“Mi havas nenion por memkritiko,” lian grasdikan vizaĝon kovris mieno de miskulpigito. “Mi revenis ĝuste kiam komenciĝis la vespermanĝo. Maksimume... maksimume je du minutoj mi malfruiĝis.”

Tio, kion Liu Janŝeng diris, estis vero. Li revenis ĝuste kiam la aliaj kamaradoj finis kanti kaj eniris la manĝejon, do li malfruiĝis nur je momento.

“K-do juna Liu,” Vej Vujue diris. “Ne kalkulu, kiel longe vi malfruiĝis. Eĉ se vi malfruiĝis je duon-minuto, tio signifas, ke vi ne revenis je promesita horo.”

“Vicestro, vi ne scias, kiel okupita mi estis kiam mi iris al la urbo hodiaŭ. Kiam mi estis sendanta monon en la poŝtofacejo, mi plenigis la poŝtmandaton por maljunulino, kiu ne scipovis skribi. Kaj

poste mi okupiĝis pri miaj aferoj. La librejo estis svarmita de kelkdek junpioniroj kiuj estis aĉetantaj *Rakonton pri Lej Feng*, do mi devis lasi ilin aĉeti unuaj. Oni devis surkudri kvar grandajn pecojn antaŭe kaj malantaŭe sur la pantalono, kiun Gaŭ Jiĝong komisiis al mi flikigi. Hazarde la tajloro en la kudrejo estis maljunulo kaj lia kudromaŝino, japana produkto, estis eĉ pli grandaĝa ol mia patro, krak-krak — ofte rompiĝis la fadeno... Mi klopodis kaj rapidis, kaj apenaŭ sukcesis plenumi dudek du el la dudek tri aferoj... Mi urĝe kaj seninterrompe hastis returnen. Pri kio mi... mi memkritiku?"

"Kio? Por dudek tri aferoj vi iris al la urbo?" lin interrompis Guan Jingkuj.

"Ne inkluzive mian grenadĵetan ekzercon sur la regimenta ekzercejo," diris juna Liu kun sento de miskulpigito.

"Ehe!" ridetis Guan Jingkuj. "Estas bone, ke vi sukcesis plenumi dudek du aferojn. Diru al mi, kion vi ne plenumis?"

Liu Janŝeng silentis.

"Nu daŭrigu. Via familio skribis por via foto. Ĉu vi jam fotiĝis?"

"Mi eĉ ne transpaŝis la sojlon de la fotografejo, la suno tamen jam subiris 'fulmorapide' ĝis la montpinto," diris Liu Janŝeng ankoraŭ pli malgaje.

La aliaj kamaradoj estis klinantaj siajn kapojn kaj pripensantaj la kritikon de la anstataŭanta vicdirektanto, sed aŭskultinte lian parolon, ĉiuj kaj emociiĝis kaj povis apenaŭ reteni sian ridon. "Estas vere," ĉiuj diris en si, "ke juna Liu praktikis grenadĵetadon helpe de grenadĵetaj modeloj de la regimento sur la regimenta ekzercejo dum pli ol unu horo, antaŭ ol li venis al la urbo. Kiam li atingis tien, li tuttempe klopodis por aliaj, kaj iujn komisionojn li ankoraŭ plenumis por la kamaradoj de la oka kaj naŭa subplotonoj. Li mem eĉ ne trovis tempon por fotiĝi, kaj li revenis nur iom malfrue. Do pro kio li memkritiku?"

"Mi opinias," diris Gaŭ Jiĝong, "ke tio estas mia kulpo. Se juna Liu ne flikigis por mi tiun malbenitan pantalonon, li ne malfruiĝis du minutojn. En difinita tempo li povis plenumi nur difinitan kvanton da aferoj. Tio estas scienca sinteno."

La vortoj de Gaŭ Jiĝong kaŭzis memkritikon de la aliaj. Unu diris, ke li ne devis peti junan Liu aĉeti por li libron, alia diris, ke la kritiko devas esti atribuita al ili ĉiuj... "Pri kio kulpas juna Liu," preskaŭ ĉiuj kamaradoj unuvoĉe diris.

"En fakto, li iris nur por plenumi servon por la tuta plotono!" Oŭjang Haj estis pripensanta, ĉu li parolos pri la estingo de fajrego aŭ ne. La kritiko de Hjue Hinven iom malplaĉis al li, kaj li volis fari klarigon. Sed post la ĵusaj paroloj de ĉiuj aliaj venis al li en la kapon nova ideo: Se ĉiuj emfazas objektivajn kaŭzojn, la hodiaŭa kunveno sendube malsukcesos, kaj estos des pli malfacile akcepti la kritikon de la gvidantaro. Krome, rotestro iros al trejnado morgaŭ, kaj la anstataŭanta vicdirektanto respondecos pri la aferoj de la roto. Se la afero cirkulos pere de kamaradoj, tio malutilos al la prestiĝo de vicdirektanto kaj lia laboro ne iros glate. Ĉe tiu konsidero li ekstaris kaj diris:

"Mi ne konsentas kun vi. Juna Liu faris multon por helpi al la aliaj kaj ankaŭ al la maljunulino kaj junpioniroj. Tio estas rezulto de lia lernado de k-do Lej Feng, kaj estas lia devo. La gvidanto kritikis min kaj junan Liu pro nia malfruiĝo el la vidpunkto de organizeco kaj disciplineco kaj de bezono de la batalo. Tio estas tute korekta. Prezidanto Maŭ diris, ke ni estas servantoj de la popolo, kaj ĉio, kion ni faras, estas en servo al la popolo. Do, kvankam ni iom helpis al la aliaj kamaradoj, ĉu tio rajtigas nin malpermesi la gvidantaron kritiki niajn mankojn? Se estus tiel, ĉu ni povus esti nomataj 'servantoj'?"

Vidinte, ke neniu refutis, Oŭjang Haj daŭrigis post pripensado:

"Ni hodiaŭ kunvenas ne por malaprobi, ke ni faris bonojn, sed por priekzameni, kial ni ne revenis je promesita horo. Kio pli gravas, la fliko de la pantalono, la riparo de la fontplumo aŭ la batalo? Ĉiu diros, ke gravas la batalo. Laŭ tiu punkto la anstataŭanta vicdirektanto kritikis nin, do ni devas pripensi, ĉu ni havas klaran ideon pri nia batala preteco. Preni min kiel ekzemplon, mi ne estas sufiĉe singardema kontraŭ milito, kaj en penso mi ne estas ĉiam preta iri al batalejo. Kiel batalanto kiu defendas sian patruon, mi sentas, ke la kritiko fare de la vicdirektanto estas korekta kaj ĝusttempa. Ni devas kontroli nin mem."

"Jes, prava estas subplotonestro," Vej Vujue diris. "Ni ne devas neigi la bonajn flankojn, nek preterlasi la malbonajn. Juna Liu multege helpis al kamaradoj, li estis tiel okupita, ke li eĉ forgesis fotiĝi. Oni devas laŭdi lin en la subplotono. Koncerne la malfruiĝon, li devas esti kritikata, eĉ se li malfruiĝas je unu aŭ duon-minuto. En la antaŭtagmezo ni emfazis, ke ni devas postuli de ni mem laŭ alta normo kaj lerni de k-do Lej Feng. Nun estas tempo, la plej grava tempo por ni kontroli nian penson per garantio."

“Do . . . do vi diru, kion mi devas fari?” demandis juna Liu.

“Oni nepre devas reveni je ĝusta horo, eĉ se li ne finfaras ĉion,” diris Oŭjang Haj. “Kion vi ne sukcesis fari, tion vi faros la venontan fojon. Reveni ne en ĝusta horo estas demando de organizeco kaj disciplineco, kaj kontraŭ tio ekzistas neniu rimedo en okazo de urĝa situacio.”

Liu Janŝeng malrapide levis sian kapon. Moviga gardostaranto iris tien kaj reen ĉe la fino de la ekzercejo. En la lunlumo ties bajoneto briletis antaŭ liaj okuloj. Li ekmemoris kion lia patro iam diris al li: Des pli gravas singardemo, ju pli oni troviĝas en paca situacio. Kiam la obusoj flugas super la kapoj, kompreneble ĉiu konscie plivigliĝas sian singardemon. Tion pensinte, li diris malkaŝeme:

“Mi konsentis kun vi ĉiuj. En mia penso mi ne estas preta por milito, kiu povos okazi en iu ajn tempo. En la urbo mi sentis maltrankvilon, sed mi pensis, ke momenta malfruiĝo ja ne gravas. Tio estas mia neglektemo. Mi akceptas la kritikon de la gvidanto.”

“Mi devas preni sur min la tutan respondecon pri tio, ke la anstataŭanta vicdirektanto hodiaŭ faris kritikon,” Oŭjang Haj diris. “Mi ne havas objektivan kaŭzon. Mia malfrua reveno estas nur elmontriĝo, kaj la radiko kuŝas en tio, ke mi ne havas solidan komprenon pri disciplino kaj batalpreteco. Kiel subplotonestro mi kutime ne atentigis vin ĉiujn pri ĉio ĉi. Tio ankaŭ montras mian neakran singardemon. La vicdirektanto prave diris, ke la devo de armeo estas batali. Se vere okazus urĝa akcidento hodiaŭ, mia malfruiĝo alportus malbonan sekvon al la tuta roto, aŭ almenaŭ nia sepa subplotono ne povus ekagi ĝusttempe. Kia batalanto li estas, se li ne povas sinĵeti en batalon okaze de neceso? Mi faras memkritikon antaŭ rotestro kaj ĉiuj kamaradoj de nia subplotono kaj garantias, ke mi ne plu faros la saman eraron. Mi esperas, ke vi donos al mi pli multe da opinioj. Rilate al mia fiereco . . . mi denove konsideros ĝin.”

La aliaj kamaradoj ne elmetis multajn opiniojn pri Oŭjang Haj. Ĉiu priekzamenis sin mem laŭ la kritiko de Hjue Hinven, kaj la temo de la kunveno transiris al “singardemo”. La kamaradoj unuanime opiniis, ke organizeco kaj disciplineco konformiĝas al bezono de la batalo kaj estas necesaj kvalitoj de batalanto, kiu gardostaras por la 600-miliona popolo kaj socialisma patrio. Laŭ tiu ĉi punkto oni konstatis, ke tute korekta estas la kritiko de la anstataŭanta vicdirektanto. Sub ia ajn cirkonstanco ni devas reveni je promesita

horo. Ĉu estas iu objektiva kaŭzo, kiu pli gravas ol la sekureco de la patrio!

Ĉe tiuj vortoj malaperis la maltrankvilo, kiu montriĝis ĉe la lipoj de Guan Jingkuj. Li ekstaris, vokis Oŭjang Haj apuden kaj demandis:

“Kien do vi iris hodiaŭ?”

“Mi. . . .” Oŭjang Haj pripensis kaj sentis, ke estas nebone paroli pri la estingo de fajrego en tiu ĉi momento. La fakto estis, ke al li mankas sufiĉe da singardemo, kaj ia parolo kiel tia servas nur kiel pledo por lia manko.

“Rotestro, mi diros pri tio en alia tago.”

“Kiel vi opinias pri la hodiaŭa kritiko?” demandis Guan Jingkuj.

“Mi akceptis ĉion esencan. Sed mi havas alian opinion, kaj pri tio mi delonge intencis paroli kun la partia filio. Nun mi ankoraŭ ne bone konsideris, kiujn mankojn kaj erarojn mi havas, kaj kiun respondecon mi devas preni sur min. Vi foriros al la trejnado morgaŭ frumatene, kaj mi ne povas klarigi ĉion en kelkaj vortoj. Mi raportos al vi kiam vi revenos.”

Guan Jingkuj pensis kaj diris, “Oŭjang Haj, mi jam aŭdis ion pri tio, mi opinias, ke via nuna sinteno estas prava. En la revolucia armeo oni kelkfoje renkontas malagrablaĵojn, ni devas fidi al la organizo kaj konsideri ĉion laŭ la komunaj intereso. Mi ja volis kore interparoli kun vi, sed ne troviĝis tempo por hodiaŭ. Estas bone, ke la komitatoj de nia partia filio pretas kunveni en la nokto por unuecigi niajn konojn. Oŭjang Haj, pri vi mem, malgraŭ ĉio vi ne devas permesi, ke via problemo malbone efiku al la nuna tasko!”

“Rotestro, estu plej, plej trankvila. Mi garantias, ke la sepa subplotono kaj mi mem bone plenumos la taskon sen ia ajn akcidento.”

“Nu bone,” diris Guan Jingkuj etendante sian manon. “Ni reintervidiĝos post dek tagoj.”

Oŭjang Haj haste kaŝis sian manon post la dorson kaj diris ŝerce:


“Tio ne estas necesa, rotestro. Disiĝo por mallonga tempo kiel dek tagoj ja ne necesigas manpremon,” li rapide foriris salutinte.

La kunveno finiĝis. Ĉiuj kamaradoj iris al la dormejo. Vej Vujue venis antaŭ Oŭjang Haj.

“Subplotonestro, mi havas opinion.”

“Diru, do.”

“Kiu volas kritiki, tiu kritiku. Kial oni tuŝis la demandon de la fiereco? Mi opinias, ke tio ne



estas sufiĉe ĝusta. Se oni volas helpi kamaradon, tio, kio plej, plej gravas, estas fari konkretan analizon pri konkreta problemo. Poste, oni elmetas konsilon konforme al la aktualeco. Alie”

“Pri kiu vi temas?” demandis Oŭjang Haj.

“La anstataŭanta vicdirektanto. Antaŭ ol vi revenis, li”

Oŭjang Haj interrompis lin kaj diris, “Se vi havas opinion kontraŭ la anstataŭanta vicdirektanto, vi devas turni vin al li persone, aŭ raportu laŭ la sistemo de organizo. Hodiaŭ mi estis kritikita, ne decas, se ni interparolos tiamaniere. Kiam ni konsideras kritikon, ni taksu ĝin laŭ pozitivaj flankoj. Tio utilos al ni kaj al la laboro”

Juna Vej ankoraŭ deziris diri ion, sed Oŭjang Haj intence ŝanĝis la temon kaj diris, “Rotestro ĵus donis instrukcion, ke ni nepre bone plenumu la taskon de ŝoseo-rekonstruado en subteno al agrikulturo. Vi iru kaj kontrolu la ilaron kaj sciigu al kamaradoj enlitiĝi pli frue.”

“Ankaŭ vi iru ripozi. Via manĝo estas rezervita en la kuirejo.”

“Mia . . . mia cerbo estas en malordo, nun mi ne deziras manĝi. Lasu, ke mi restu ĉi tie sola kaj pripensu.”

Tuj post la foriro de juna Vej, Gaŭ Jigong nerimarkite venis al Oŭjang Haj.

“Subplotonestro, jen por vi.”

“Kio?” demandis Oŭjang Haj.

“Biskvitoj,” diris Gaŭ. “La fornofajro en la kuirejo jam estis kovrita, kaj provizisto ĵus remalfermis la fornon por varmigi vian manĝon. La anstataŭanta vicdirektanto timis, ke la pretigo de la manĝo estos tro malfrua, kaj li venigis min kun liaj biskvitoj por iom mildigi vian malsaton.”

Oŭjang Haj prenis la biskvitojn kaj diris dan-keme, “Mi ne estas tre malsata. Juna Gaŭ, rapidu al via lito.”

En tiu ĉi sama momento Guan Jingkuj kaj Hjue Hinven estis interbabilantaj en la ĉambro. Guan Jingkuj konigis kelkajn detalojn pri la pasinteco de Oŭjang Haj, kaj opiniis, ke ekzistas certa kaŭzo por lia malfrua reveno. Oni devas fidi al tiu kamarado, kvankam li mem ne faris klarigon. “Pripensu, li ja ne estas tiel malprudenta.”

“Rotestro,” diris Hjue Hinven. “Mi ne samopiniis kun vi. Mi estas bedaŭranta, ke hieraŭ mi ne pli serioze atentigis lin pri lia problemo. Tiu juna subplotonestro estas kompare fiero nun.”

“Fiero?” Guan Jingkuj ne komprenis lin.

“Jes, li estas fiero. Tiutage mi diris, ke ili okazigu subplotonan kunvenon kunlige kun la problemo de juna Liu por plivigli la singardemon de la tuta subplotono. Sed li ne serioze klopodis pri tio. Se ni ne serioze prizorgis, tio malutilos al li!”

“Ej, vi ne komprenas lin.” Guan Jingkuj serĉinte elprenis kelkajn leterojn transsenditajn de la Partia Komitato de Guĵjang-gubernio kaj diris, “Post kiam li faris ian laboron aŭ ion utilan, li neniam volis paroli kun la aliaj pri tio. En la pasinta jaro, post lia reveno de sia hejmo, li parolis nenion al la organizo. Sed la gubernia partikomitato kaj la komunumo skribis al ni kaj sciigis, ke li partoprenis fizikan laboron en sia hejma loko, faris batalon kontraŭ tiuj spontaneaj ideoj pri irado sur vojo de kapitalismo, saltis en puton por savi infanon...”

“Jes, tio estas fakto. Aliflanke, mi sentas, ke li nun fariĝas fiero ĝuste pro tio, ke ni tro emfazis liajn bonajn kvalitojn en la pasinteco. Sekve okazis la hodiaŭa akcidento, ke li malfruiĝis je kelkaj horoj. Se ni ne avertus lin, mi estas certa, okazus io pli serioza!”

Vidinte, ke li tute ne konsideris alies opinion, Guan Jingkuj diris, “Kritiko estas ĉiam permesita, sed eble vi deflankiĝis tro malproksimen.”

“Rotestro, mi jam kelkfoje koliziis kun li. Tiu kamarado estas iom obstina. Oni atingas

neniun rezulton, se oni interparolas kun li en trankvila humoro. Mi opinias, ke, nur se ni agas kiel mi agis hodiaŭ, ni povas tuŝi la radikon de lia problemo. Komprenable, la kulpo estas ĉefe mia. Oni asignis al mi respondecon pri la aferoj de la tria plotono, sed mi ne tre bone laboris ĝusttempe laŭ la instrukcio de la partia filio. Por mi tio jam estas leciono!”

“Do kiel ni devas taksii la progreson de la sepa subplotono? Ĉu al ili mankas solida bazo?”

“Mi ankoraŭ ne bone pripensis tion, kaj tial mi ne devas paroli libere. Sed laŭ lia ago dum la lastaj tagoj mi estas certa, ke li ankoraŭ havas multajn problemojn nesolvitajn. Almenaŭ li ne ĝuste taksas la atingojn de lia laboro.”

“Ne, mi ne tiel opinias,” Guan Jingkuj ekstaris kaj diris kun profunda sento. “De la lastaj unu aŭ du jaroj mi precipe forte sentis, ke niaj batalantoj nun faras solidan progreson, kaj ĉe ili ĉiam ĝermas io nova. Mi pensis kaj pensis kaj venis al la konkludo, ke tio estas nova fenomeno rezulte de la alvoko de la Komisiono pri Militaj Aferoj kaj k-do Lin Biao, ke ni vere mastru la penson de Maŭ Zedong. Maljuna Hjue, kiam mi estis batalanto, ĉe diskutkunveno ni de tempo al tempo parolis tiajn vortojn kiaj ‘la direktanto diris’, ‘la rotestro diris’. Sed nun la batalantoj ĉerpas rekte el la verkoj de Prezidanto Maŭ movforton por sia progreso. Krome, ili spertis tiajn grandajn ŝanĝojn kiaj kooperativigo kaj komunumigo, estis kulturitaj kaj edukitaj en la nova socio dum dekelkaj jaroj. Tio estas tute malsama kompare kun la tempo, kiam ni aliĝis al la armeo por gardi niajn kampojn kaj hejmojn. Ekzemple, se iu batalanto nun eldiras al vi sian opinion, li certe povas fari laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ detalan kaj nerefuteblan analizon. Tio signifas, ke la nivelo de politika konscio kaj teorio de niaj batalantoj multe plialtiĝis. Mi havas tian senton ĉiufoje, kiam mi interparolas kun Oŭjang Haj. Tio estas tute alia afero kompare kun la ŝvelparolo de kelkaj aliaj junaj intelektuloj.”

Palpebrumante Hjue Hinven sentis, ke estas vero en la parolo de Guan Jingkuj.

“Maljuna Hjue,” daŭrigis Guan Jingkuj. “En nia armeo aperis Lej Feng kaj sennombraj batalantoj kun kvin bonoj¹, kiuj sekvis la ekzemplon de Lej Feng, kaj aperis la Bona Oka Roto² kaj sennombraj rotoj kun kvar bonoj³, kiuj sekvis la ekzemplon de la Bona Oka Roto. Tio tute ne estas hazarda. Tio atribuas al la kompleta serio da revoluciigaj aranĝoj elmetitaj dum tiuj ĉi kelkaj jaroj de la Komisiono pri Militaj Aferoj kaj k-do

Lin Biaŭ laŭ la longdaŭra instruo de Prezidanto Maŭ kaj la aktualaj kondiĉoj de nia armeo. Kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ, persistado ĉe la kvar unuaj⁴, starigo de la 'tri-ok'-stilo⁵, disvolvo de la tri grandaj demokratiaj principoj⁶, disvastigo de la movado de rotoj kun kvar bonoj — ĉio ĉi tio jam multege antaŭen-saltigis nian armeon sur la vojo de eksterordinara revoluciigo kaj eksterordinara batalspiritizo. La plej ĉefa tasko antaŭ ni — kadroj en la bazaj organizoj — estas kiel komandi ilin laŭ la bezonoj de la liberiga afero de la proletaro, kaj kiel realigi en nia laboro la flegadon de la Partio. La ĝusta taksado pri la progreso de ĉiu batalanto estas demando, kiu intime ligiĝas kun nia propra ideologia remuldo. La nekutimiĝo kaj nekomprene pri kelkaj novaj aferoj ofte kaŭziĝas de la ekzisto de kutimaj fortoj kaj malnova ideologio en nia cerbo. Por vi kaj por mi tio estas nova provo.”

Hjue Hinven diris, “Pri viaj opinioj mi konsentas. Sed pri la agoj de Oŭjang Haj en la lastaj tagoj mi . . .” Li haltis.

Vidinte, ke li ĉesis paroli, Guan Jingkuj diris, “Nu, maljuna Hjue, ni tiel aranĝu la aferon. Morgaŭ matene mi foriros al la trejnado, sed tiu ĉi problemo ne povas esti plu prokrastata. Kiel taksi tiun kamaradon kaj kompreni kelkajn el liaj opinioj, tio restas demando. Mi proponas, ke ni okazigu komitatitan kunvenon de la partia filio en hodiaŭa nokto, tiel ke ni unuecigu niajn konojn. Ĉu vi konsentas tion?”

“Bone, por helpi tiun kamaradon estas necese ankaŭ por mi interŝanĝi opiniojn kun la aliaj.”

En la oficejo de la roto disvolviĝis intensa disputo inter la parti-filiaj komitatanoj. Oŭjang Haj sola ankoraŭ iradis tien kaj reen sur la ekzercejo. Liaj brulvunditaj manoj sentigis al li varmegan suferon. Li pensis, “Eble ili ne inflamos. Bole iras la laboro, do mi devas trovi rimedon por . . .” Post kelkaj paŝoj li repensis, “Mi ja ne devos paroli pri la estingo de la fajrego, alie mi ne povos partopreni la taskon helpi al la konstruado de la akvokonservejo . . . Estas evidente, ke la anstataŭanta vicdirektanto havas antaŭjuĝon pri mi. Tamen mi faros klarigon pli poste, nun ne estas tempo por konsideri tian aferon. La rotestro prave diris, ke ni devas konsideri laŭ la komunaj interesoj. Kiom da laboroj nun kuŝas antaŭ ni! Ju pli rapide ni finkonstruos socialismon, des pli frue realiĝos la monda revolucio. La ĵurnaloj raportas, ke la usona imperiismo ĉiutage, ĉiuhore kaj eĉ ĉiuminute klopodas masakri la popolojn en suda Vjetnamio, Kongolando kaj Latinameriko per diversaj kruelaj rimedoj! Sekve,

kiel valora la nuna tempo estas! Jen estas la ŝlosilo de la decida faktoro! Se oni povas ne paliĝi nek senti korbatojn je ofero de sia vivo por la idealo de komunismo, ĉu gravas do, se mi nun ricevis iom da kritiko?” Kun ekscito li mallaŭte kriis:

“Eklaboru! Mi dediĉos min tutanime al laboro por plifruigi la produktadon de elektra energio ĉe la akvokonservejo! Eklaboru por la revolucio, por la sklavigitaj homoj en la tuta mondo kaj por plifruigi la venkon de komunismo!”

La lunlumo speguliĝis en la profundaj okuloj de Oŭjang Haj kvazaŭ du fajreroj. Kun firma volo li paŝis al la dormejo.

La disputo ĉe la komitata kunveno de la partia filio ankoraŭ bole iras . . .

(daŭrigota)

1. *Batalanto kun kvin bonoj: La Ĉina Popola Liberiga Armeo disvolvas en si la movadon de kvin bonoj, t. e., bona politika ideologio, bona “tri-ok”-stilo, bona milita tekniko, bona plenumo de taskoj kaj bona plenumo de korpa ekzerco. Batalanto, kiu posedas la diritajn kondiĉojn, povas esti taksita kiel “batalanto kun kvin bonoj”.*

2. *La Bona Oka Roto: Ĝi estas modela roto, kiu restadas sur Nankina Strato de Ŝanhajo kaj respondecas pri gardo. Tuj post la liberigo de Ŝanhajo en 1949 tiu ĉi roto estis sendita al Nankina Strato por plenumi la taskon gardi la grandan Ŝanhajon. Dum dekelkaj jaroj ili estas ege fidelaj, ĉiam diligentaj, neniam malkontentaj, modestaj, atentemaj, nek fieraj, nek malpaciencaj. Ili ĉiam tenas proletaran revolucionan spiriton kaj frakasis la provon de la malamiko, kiu intencis defaligi kaj korupti ilin politike, ideologie kaj en ĉiutaga vivo. Tiel ili restas nekorupteblaj malgraŭ tio, ke ili loĝas en komerca centro. Ili estas ŝparemaj, observas principon de rigoreco en laboro, ĉiam metas sur la unuan lokon la interesojn de la partio kaj la popolo, ĉiam kuniĝas kun la popolamaso, kaj estas fidelaj servantoj de la popolo. En la longa daŭro de dekelkaj jaroj ili tenas kaj disvolvas la gloran tradicion de la Popola Liberiga Armeo kaj starigas brilan ekzemplon por la tuta armeo.*

3. *Roto kun kvar bonoj: Roto kiu posedas bonan politikan ideologion, bonan “tri-ok”-stilon, bonan trejnadon en militaj aferoj kaj bonan prizorgon de ĉiutaga vivo.*

4. *Kvar unuaj: La homo kiel faktoro estas la unua, la politika laboro estas la unua, la ideologia laboro estas la unua, kaj la aktuala penso estas la unua.*

5. *“Tri-ok”-stilo: Legu piednoton 2 de la artikolo “Nova ‘Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato’ Hodiaŭ” en tiu ĉi numero.*


6. *Tri grandaj demokratioj: La Ĉina Popola Liberiga Armeo efektivas interne de la armeo politikan demokration, ekonomian demokration kaj militan demokration, kaj realigas, pere de demokratia movado sub la gvido de koncentrigo, la tri grandajn celojn: altgradan unuiĝon en politiko, plibonigon de ĉiutaga vivo kaj plialtigon de tekniko kaj taktiko en militaj aferoj.*



Elektroŝargilo

Tiu ĉi malnov-tipa elektroŝargilo estis uzata de ĉinaj revoluciaj batalantoj en la daŭro de ĉirkaŭ dudek jaroj.

En 1931 la Ĉina Laborista kaj Kampana Ruĝa Armeo batalakiris de la malamiko tiun ĉi elektroŝargilon en la dua milito kontraŭ la "sieĝatako", kaj ĝi estis disponigita al la Unuafanka Trupo de tiu armeo. La laborantoj de la ruĝarmeaj radiostacio ĉiel zorgis ĝin. En la sinsekvaj bataloj, ili ĉiam klopodis transporti la elektroŝargilon en sekureco, eĉ se ili devis forlasi siajn proprajn pakajojn. Dum la 25,000-lia Longa Marŝo ili kunportis ĝin dum transpaso de la neĝa montaro kaj traŭro de la sovaĝa herbejo. El la multaj homoj, kiuj portis la elektroŝargilon sur la vojo, iuj vundiĝis en gloro kaj aliaj heroe oferis sian vivon, sed ĝi restis en bona stato kaj estis uzata en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la periodo de la Tria Enlanda Revolucia Milito.



Karaj legantoj:

Ni ĝoje sciigas vin ke sub la gvido de la granda penso de Maŭ Zedong kaj la stimulo de la senprecedenca, granda proleta kultura revolucio kaj en aktiva respondo al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ pri teno de revolucio kaj stimulo de produkto, ni decidis aperigi nian gazeton ĉiumonate ekde la unua numero de 1967. Tio ebligas ke la raportoj de nia gazeto fariĝos pli riĉaj kaj pli aktualaj. Ni elkore atendas vian plenan subtenon.

El Popola Ĉinio

EL Popola ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 2 (104) 1967

Ĉefa Enhavo

Konduku la Grandan Proletan Kulturalan Revolucion ĝis la Fino (*aldono*)

Prezidanto Maŭ Senlime Zorgas Junan Generacion

Iri la Vojon de Malnova Ruĝa Armeo

Caj Jonghiang — Komunisma Batalanto en Fidela Gardo de Granda Kultura Revolucio

Ŝultro ĉe Ŝultro Batalas kun Ni la Fremdlandaj Amikoj en Pekino

Ekspozicio pri la Historio de Kanga Multe Vizitata de Revolucia Amaso

Nova "Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato" Hodiaŭ

Kondamno kontraŭ la Bombado al Hanojo Fare de la Usona Imperismo kaj Celebro pri la 6-a Datreveno de la Fondiĝo de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio

Kurantaj Aferoj

La Sudvjetnamaj Armeo kaj Popolo Kreis Bonegan Situacion per Sia Luktado

Sinsekvaj Venkoj de Ĉinio sur Industria Fronto

Plej Abunda Rikolto de Grenoj en Ĉinio deponit Liberiĝo

La Kemia Cementa Tekniko de Ĉinio Atingis la Progresintan Nivelon de la Mondo

Ekonomia kaj Komerca Ekspozicio de Ĉinio en Japanio

Granda Venko de la Aziaj Popoloj, Kiuj Disvolvas Memstare Sian Fizikan Kulturon

Caj Jonghiang — Komunisma Batalanto (*Bildrakonto*)

Rakonto pri Brakhorloĝo

Kanto pri Oŭjang Haj

Sur la Kovrilo — Lerni de veterana kamparano

Sur la dorskovrilo — Muldo de ŝtalaj ingotoj



En 1966 ĝenerale plialtiĝis la produktado de kotonon en la sudo kaj nordo de Ĉinio. La vasta membraro de la popolaj komunumoj amase vendis novan kotonon al la ŝtato por subteni la patrian konstruadon kaj mondan revolucion. La bildo montras la grandegan kvanton de kotonon, kiun la komunumanoj de Junceng-gubernio, Ŝangdong-provinco, liveris al la aĉet-stacio.

Revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Anŝan-a Ŝtala kaj Fera Kompanio forigis la tabuojn kaj regulojn starigitajn de la burĝaj "specialistoj" kaj "aŭtoritatuloj" kaj efektivigis ĉiuf flankan antaŭensalton en produktado en 1966. Jen laboristoj de la Unua Ŝtala Fandejo enblovigas oksigenon en la martin-fornejon.



